

Frederiko Engelso
Pri la loĝejproblemo

Frederiko Engelso

Pri la loĝejproblemo

Monda Asembleo Socia (MAS)

Frederiko Engelso

Pri la loĝejproblemo

Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

2014

ISBN 978-2-918300-98-4

Tiun ĉi libreton la tradukinto dediĉas al

Gerardo Hernández Nordelo,
Ramón Labañino Salazar,
Antonio Guerrero Rodríguez,
Fernando González Llort kaj
René González Sehwerert¹

-
- 1 *La Kvin Kubanoj* – aŭ *la Kuba Kvinopo* –, kiuj estis sin enŝovintaj en la teroristajn grupojn de Miamo, Usono, por neŭtraliigi ilin. La Kvin sukcesis malhelpi cent sepdek atencojn kontraŭ Kubo per tio, ke ili ĝustatempe alarmis la instancojn en Havano. La kuba registaro informis tiam la usonajn instancojn kaj, en junio 1998, delegacio de la FBI vojaĝis al Kubo, kie ĝi ricevis kompletan dokumentaron pri la agadoj de la ekstremistoj de Miamo.

Post konatiĝi kun la informoj kaj la nerefuteblaj pruvoj pri la kontraŭleĝaj kaj danĝeraj agadoj de tiuj grupoj, la FBI, anstataŭ agi kontraŭ tiuj krimuloj, arestigis la kvin informantojn, kiuj, riske de siaj vivoj, estis barintaj tiujn teroraĵojn. Ili estis en Miamo kondamnitaj al longaj jaroj de malliberejo, ekz-e Gerardo al pli ol duoble vivolonga malliberejo.

Pri tiu justicskandalo vidu en Esperanto Salim Lamrani (komp.): *La terorismo de Usono kontraŭ Kubo; La Kuba Kvinopo*. Esperantigoj el la hispana kaj la franca lingvoj de diversaj MAS-anoj, Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

Enhavo

Frederiko Engelso: Pri la loĝejproblemo.....	7
Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon.....	7
Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon.....	26
1.....	26
2.....	38
3.....	53
Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo....	57
1.....	57
2.....	62
3.....	70
4.....	75

Frederiko Engelso: Pri la loĝejproblemo

Verkita en la tempo de junio 1872 ĝis februaro 1873. Unuafoje publikigita en la gazeto „Der Volksstaat”, Lepsiko, 1872, n-roj 51-53, 103 kaj 104 kaj en 1873, n-roj 2, 3, 12, 13, 15, 16. Laŭ la eldono de 1887. Esperantigo el la germana verkaro de Markso kaj Engelso Marx-Engels Werke (MEW), (Karl) Dietz Verlag, Berlino, volumo 18, 5-a eldono 1973, senŝanĝa represo de la 1-a eldono 1962, Berlino (GDR), p. 209-287.²

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

En la numero 10 kaj la sekvaj de la „*Volksstaat*” troviĝas serio de ses artikoloj pri la loĝejproblemo, kiuj meritas atenton pro la sola kialo ke ili – senkonsidere kelkajn longe forgesitajn beletraĵojn de la 1840-aj jaroj – estas la unua provo transplanti la skolon de Prudono al Germanio. Tio estas tiom giganta malprogreso kontraŭ la tuta evoluo de la germana socialismo, kiu ĝuste donis al la prudentaj ideoj jam antaŭ 25 jaroj la decidan baton³, ke valoras la penon tuj kontraŭpaŝi al tiu provo.

La tiel nomata loĝejmizero, kiu en la gazetaro ludas nuntempe tiom grandan rolon, ne konsistas en tio, ke la laborista klaso entute vivas en malbonaj, tro ŝarĝitaj, malsanfavoraj loĝejoj. Tiu ĉi loĝejmizero tute ne karakterizas la nuntempon; ĝi eĉ ne estas unu el la suferoj, kiuj estas propraj al la moderna proletaro, kompare kun ĉiuj antaŭaj subpremataj klasoj; male, ĝi koncernis ĉiujn subprematajn klasojn de ĉiuj tempoj sufiĉe egale. Por ĉesigi *tiun* loĝejmizeron ekzistas nur *unu* rimedo: forigi la ekspluatadon kaj subpremadon de la laboranta klaso fare de la reganta klaso entute. – Tio, kion oni hodiaŭ komprenas sub loĝejmizero, estas la aparta akriĝo, kiujn eksuferis la malbonaj loĝadkondiĉoj de la laboristoj per la subita alvenego de la loĝantaro al la grandaj urboj; kolosa altiĝo de la luprezoj; ankoraŭ pli forta kunpremadado de la loĝantoj en la unuopaj domoj, por kelkaj la neeblo entute trovi tegmenton. Kaj *tiu ĉi* loĝejmizero estas multe preparolata nur ĉar ĝi ne limiĝas al la laborista klaso, sed kunfrapas ankaŭ la etburĝaron.

-
- 2 La piednotaj indikoj en la germana originalo pri ŝanĝoj de la libra eldono kompare kun la gazeta eldono estas ĉi tie, en la Esperanta eldono, forlasitaj. La ne signifaj piednotoj estas de la aŭtoro (kelkfoje tamen signifaj per lia siglo -fe), la notoj de la germana eldonejo estas signifaj per la siglo -mew, tiuj de la tradukinto per -vl.
 - 3 En Karlo Markso: Mizero de la filozofio (ktp, librofina librolisto n-ro 17. (-fe) -vl

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

La loĝejmizero de la laboristoj kaj de parto de la etburĝoj de niaj modernaj grandaj urboj estas unu el la sennombraj malgrandaj, duarangaj malbonaĵoj, kiuj devenas el la nuntempa kapitalisma produktadmaniero. Ĝi tute ne estas rekta sekvo de la ekspluatado de la laboristo, *kiel* laboristo, fare de la kapitalisto. Tiu ekspluatado estas la baza malbono, kiun la socia revolucio volas forigi per tio, ke ĝi forigas la kapitalisman produktadmanieron. Sed la fundamento de la kapitalisma ekspluatado estas la fakto: ke nia nuna sociordo ebligas al la kapitalisto aĉeti la laborforton de la laboristo je ĝia valoro, sed elpreni el ĝi multe pli ol ĝian valoron, per tio ke li igas la laboriston labori pli longe ol necesas por la rekreo de la prezo pagita por la laborforto. La tiel produktita plusvaloro estas dispartigata inter la tuta klaso de la kapitalistoj kaj grundposedantoj, kune kun iliaj pagataj servistoj, de la papo kaj imperiestro ĝis la noktgardisto kaj ankoraŭ pli malalte. Kiel tiu dispartigo fariĝas, tio ĉi tie ne koncernas nin; certas nur, ke ĉiuj, kiuj ne laboras, povas vivi nur per la defalaĵoj de tiu plusvaloro, kiuj iel aŭ alie alfluas al ili. (Komparu Karlo Markso: La kapitalo, kie tio estas unue klarigita.⁴

Da dispartigo de la plusvaloro inter la ne laborantaj klasoj, produktita de la laborista klaso kaj forprenita sen ĝia pago, okazas sub plej edifaj kvereloj kaj reciproka trompado; en la mezuro en kiu tiu dispartigo okazas per aĉeto kaj vendo, unu el ĝiaj ĉefaj leviloj estas la trompado de la aĉetanto fare de la vendanto, kaj tiu trompado en la etkomerco, precipe en la grandaj urboj, fariĝis nun kompleta vivkondiĉo por la vendanto. Sed se la laboristo estas trompata de sia ĉiovendisto aŭ bakisto pri la prezo aŭ pri la kvalito de la varo, tiam tio okazas al li ne en lia specifa eco kiel laboristo. Male, ĉar certa mezuma kvanto de trompado fariĝas la socia regulo en ia ajn loko, tial ĝi devas kun la tempo trovi sian kompenson en same alta altiĝo de la salajro. La laboristo alpaŝas la ĉiovendiston kiel aĉetanto, do kiel posedanto de mono aŭ de kredito, kaj pro tio tute ne en sia eco kiel laboristo, t.e. kiel vendanto de laborforto. La trompado povas trafi lin, kiel entute la malriĉan klason, pli akre ol la riĉajn sociajn klasojn, sed ĝi ne estas malbonaĵo kiu trafas lin ekskluzive aŭ kiu estas apartaĵo de lia klaso.

4 Karlo Markso: La kapitalo ... (-fe) (librofina librolisto n-ro 68); vd ankaŭ Georgo Fulberto: „La kapitalo” kompakte (librofina librolisto n-ro 75), p. 9 – 36; krome: Jozefo Ŝlejffštejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino (librofina librolisto n-ro 41), p. 144 – 181). -vl

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

Same statas pri la loĝejmizero. La ampleksiĝo de la grandaj urboj donas en certaj lokoj, speciale en centre situantaj, al la grundo artefaritan, ofte kolose kreskantan valoron; la konstruaĵoj sur ĝi, anstataŭ altigi tiun valoron, male premas ĝin malalten, ĉar ili jam ne kongruas kun la ŝanĝiĝintaj kondiĉoj; oni malkonstruas ilin kaj anstataŭigas ilin per aliaj. Tio okazas precipe al centre situantaj loĝejoj de laboristoj, kies luprezo, eĉ dum plej granda troloĝado, tamen povas neniam aŭ nur ekstreme malrapide transiri certan maksimumon. Oni malkonstruas ilin kaj konstruas en ilian lokon vendejojn, varstokejojn, publikajn konstruaĵojn. La bonapartismo, per sia Haussmann en Parizo, plej ekstreme ekspluatis tiun tendencon por trompado kaj privata riĉiĝo; sed ankaŭ tra Londono, Manĉestro, Liverpulo paŝis tiu spirito de Haussmann, kaj en Berlino kaj Vieno ĝi ŝajnas senti sin same hejme. La rezulto estas, ke la laboristoj estas forŝovataj el la centro de la urboj al la periferio, ke laboristaj kaj entute pli malgrandaj loĝejoj fariĝas maloftaj kaj pli multekostaj kaj ofte tute ne haveblas, ĉar sub tiaj kondiĉoj la konstruindustrio, al kiu pli multekostaj loĝejoj donas multe pli bonan kampon por spekulado, konstruas ĉiam nur esceptokaze laboristajn loĝejojn.

Tiu lumizero trafas la laboriston do certe pli akre ol ĉiun pli bonstatan klason; sed, same kiel la trompado de la ĉiovendisto, ĝi ne estas malbonaĵo premanta ekskluzive la laboristan klason kaj, koncerne la laboristan klason, ĝi devas, ĉe certa alteco kaj certa daŭro, ankaŭ trovi certan ekonomian kompensaĵon.

Estas precipe tiuj komunaj suferoj de la laborista klaso kun aliaj klasoj, nome la etburĝaro, pri kiuj la etburĝa socialismo, al kiu apartenas ankaŭ Prudono, prefere okupiĝas. Kaj do tute ne estas hazardo, ke nia germana prudonisto alproprigas al si ĉefe la loĝejproblemon, kiu, kiel ni vidis, tute ne estas ekskluzive laborista problemo, kaj ke li, male, deklaras ĝin ekskluziva laborista problemo.

„Kio la *dunlaboristo* estas kontraŭ la *kapitalisto*, tio la *luprenanto* estas kontraŭ la *domposedanto*.”

Tio estas totale malĝusta.

En la loĝejdemando staras du partioj unu kontraŭ la alia, la luprenanto kaj la ludonanto aŭ domposedanto. La unua volas de la dua aĉeti la portempan uzadon de loĝejo; li havas monon aŭ krediton – eĉ se li devas ankaŭ

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

aĉeti tiun krediton de la domposedanto mem je uzura prezo, aldoni al la luprezo. Temas pri simpla varaĉeto; ne estas komerco inter proleto kaj burĝo, inter laboristo kaj kapitalisto; la luprenanto – eĉ se li estas laboristo – aperas kiel *monhavulo*, li devas jam esti vendinta la varon al li propran, la laborforton, por povi aperi ĉi tie kun ĝia vendmono kiel aĉetanto de uzado de loĝejo, aŭ li devas povi doni garantiojn por la tuj okazonta vendo de tiu sia laborforto. La apartaj rezultoj, kiujn havas la vendo de la laborforto al la kapitalisto, tute mankas ĉi tie. La kapitalisto igas la aĉetitan laborforton unue reprodukti sian valoron, sed due plusvaloron, kiu provizore kaj rezervite por sia dispartigo inter la kapitalista klaso, restas en liaj manoj. Ĉi tie do produktiĝas plusa valoro, la ĉioma sumo de la ekzistanta valoro estas pliigita. Tute alie ĉe la lukomerco. Kiom ajn la ludonanto povas tro multe preni de la luprenanto, ĉiam temas nur pri transdono de jam *ekzistanta*, antaŭe *produktita* valoro, kaj la ĉioma sumo de la valoroj posedataj de la luprenanto kaj de la ludonanto *kune*, restas poste kiel antaŭe la sama. La laboristo, egale ĉu lia laboro estas de la kapitalisto pagata sub, super aŭ je ĝia valoro, estas ĉiam trompata je parto de sia laborprodukto; la luprenanto nur tiam, kiam li devas pagi la loĝejon super ĝia valoro. Estas do totala distordo de la kondiĉoj inter luprenanto kaj ludonanto, se oni volas prezenti ĝin egala al tiu inter laboristo kaj kapitalisto. Male, temas pri tute ordinara varkomerco inter du civitanoj, kaj tiu komerco okazas laŭ la ekonomiaj leĝoj, kiuj reguligas la varvendon entute, kaj speciale la vendon de la varo grundposedo. La kostoj por konstruado kaj vartado de domo aŭ de la koncerna domparto estas unue kalkulataj; la grundvaloro, kondiĉita de la pli aŭ malpli favora situo de la domo, kalkuliĝas duavice; la momenta stato de la rilato inter postulo kaj ofero decidas fine. Tiu simpla ekonomia rilato esprimiĝas en la kapo de nia prudonisto jene:

„La konstruita domo servas kiel eterna rajto je certa ondo de la socia laboro, eĉ se la reala valoro de la domo estas jam pli ol sufiĉe pagita en la formo de lupago al la posedanto. Tiel okazas, ke domo, kiu ekz-e estas konstruita antaŭ 50 jaroj, dum tiu tempo en la enspezo de ĝia lupago kovris du-, tri-, dek-ktp-oble la originan kostoprezon.”

Ĉi tie ni havas tuj la tutan Prudonon. Unue li forgesas, ke la luprezo por la domo devas ne nur kovri la interezojn de la kostoj de la domkonstruo, sed ankaŭ riparojn kaj la mezuman sumon de malbonaj ŝuldoj, nepagitaj luprez-

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

oj kaj la okazan neokupatecon de la loĝejo kaj fine devas amortizi en jaraj partopagoj la konstrukapitalon investitan en domo, kiu kun la paso de la tempo fariĝas senvalora. Due li forgesas, ke la loĝej-luprezo devas ankaŭ kunpagi la interezojn la plivaloriĝon de la grundo sur kiu la domo staras, ke do parto de ĝi konsistas en grundrento. Nia prudonisto ja tuj deklaras, ke tiu plivaloriĝo, ĉar ĝi okazas sen ia ago de la grundproprietulo, laŭrajte apartenas ne al li, sed al la socio; sed li pretervidas, ke per tio li envere postulas la forigon de la grundproprietulo, punkton, kiun detale pritrakti kondukus nin ĉi tie tro malproksimen. Fine li pretervidas, ke ĉe tiu tuta komerco tute ne temas pri aĉeto de la domo al la proprietulo, sed nur pri aĉeto de ties uzado por certa tempo. Prudono, kiu neniam okupiĝis pri la realaj, faktaj kondiĉoj, sub kiuj ia ajn ekonomia fenomeno okazas, kompreneble ankaŭ ne povas al si klarigi, kiel la origina kostprezo de domo en formo de lupago en kvindek jaroj eble estas dekoble pagata. Anstataŭ ekonomie esplori tiun tute ne malfacilan demandon kaj konstati, ĉu kaj kial ĝi reale estas en kontraŭdiro kun la ekonomiaj leĝoj, li elturniĝas per aŭdaca salto el la ekonomio en la juristan kampon: „la konstruita domo servas kiel eterna rajto” je certa jara pago. Kiel tio estiĝas, *kiel* la domo *fariĝas* jura rajto, pri tio Prudono silentas. Kaj tamen tio estas ĝuste tio, kion li devintus klarigi. Se li estus esploriginta tion, li trovintus, ke ĉiuj juraj rajtoj en la mondo, kaj se ili estas ajne eternaj, ne donas al domo la povon ricevi en kvindek jaroj sian kostprezon dekoble en formo de lupago, sed ke nur ekonomiaj kondiĉoj (kiuj ja povas esti socie agnoskataj en formo de juraj rajtoj) povas okazigi tion. Kaj ĉe tio li estus ree en la sama loko kiel komence.

La tuta prudona instruo baziĝas sur tiu sava salto el la ekonomia realo en la juran frazon. Kie ajn la brava Prudono perdas la ekonomian kuntekston – kaj tio okazas al li ĉe ĉiu serioza demando – li fuĝas en la kampon de la juro kaj alvokas la *eternan justecon*.

„Prudono ĉerpas unue sian idealon de justeco, el la jurrilatoj kongruaj kun la varproduktado, per kio, preterpase dirite, liveriĝas ankaŭ la pruvo tiom konsola por ĉiuj filistoj, ke la formo de varproduktado estas same eterna kiel la justeco. Poste inverse li volas laŭ tiu idealo modifi la realan varproduktadon kaj la kun ĝi kongruan realan juron. Kion oni pensus pri ĥemiisto kiu, anstataŭ studi la realajn leĝojn de metabolo kaj sur tiu bazo solvi certajn taskojn, volas modifi la metabolon per la 'eternaj

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

ideoj' de la 'natureco' kaj de la 'parenceco'? Ĉu oni scias vere ion pli pri 'uzuro', se oni diras ke ĝi kontraŭdiras la 'eternan justecon' kaj la 'eternan reciprokecon' kaj aliajn 'eternajn verojn', ol sciis la ekleziaj patroj kiam ili diris ke ĝi kontraŭdiras la 'eternan gracon', la 'eternan kredon', la 'eternan volon de dio'?"⁵

Al nia prudonisto ne okazas pli bone ol al lia majstro:

„La lukontrakto estas unu el la mil transformoj, kiuj en la vivo de la moderna socio estas same necesaj kiel la cirkulado de la sango en la korpo de la animaloj. Estus kompreneble en la intereso de la socio, se ĉiuj tiuj transformoj estus trapenetrataj de *ideo de rajto*, t.e. okazigataj ĉie laŭ la striktaj postuloj de la justeco. Per unu vorto, la ekonomia vivo de la socio devas, kiel Prudono diras, alten svingiĝi al la alteco de *ekonomia rajto*. Envere, kiel konate, okazas ĝuste la malo.”

Ĉu kredi, ke kvin jarojn, post kiam Markso, ĝuste pri tiu decida flanko tiom koncize kaj trafe batis la prudonismen, ankoraŭ eblas presigi tian konfuzaĵon en germana lingvo? Kion do signifas tiu galimatio? Nenion ol ke la praktikaj efikoj de la ekonomiaj leĝoj, kiuj reguligas la nuntempan socion, frapas en la vizaĝon de la aŭtoro kaj ke li flegas la pian deziron ke la afero povu esti aranĝebla tiel, ke tio ĉesu. – Jes, se la bufoj havus voston, tiam ili simple jam ne estus bufoj! Kaj ĉu la kapitalisma produktadmaniero eble ne estas „trapenetrata de ideo de rajto”, nome de sia propra rajto je ekspluatado de la laboristoj? Kaj kiam la aŭtoro diras al ni, ke tio ne estas *lia* ideo de rajto, ĉu ni tiam estas eĉ nur unu paŝon antaŭen?

Sed reen al la loĝejdemando. Nia prudonisto nun donas liberan kuron al sia „ideo de rajto” kaj prezentas al ni jenan kortuŝan deklamaĵon:

„Ni ne hezitas aserti, ke ne ekzistas pli terura primoko de la tuta kulturo de nia glorata jarcento, ol la fakto, ke en la grandaj urboj 90 elcentoj kaj pli de la loĝantaro ne havas lokon kiun ili povas nomi sia propraĵo. La vera nodo de la morala kaj familia ekzistado, domo kaj hejmo, estas forŝirata de la socia kirlovento ... En tiu rilato ni staras multe sub la sovaĝuloj. La kavernloĝanto havas sian kavernon, la aŭstraliano havas sian terkabanon, la indiano sian propran hejmon – la moderna proleto

5 Karlo Markso: La kapitalo (-fe) (librofina librolisto n-ro 68), p. 85, pn 3. -vl

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

pendas fakte en la aero” ktp.

En tiu lamentaĵo ni havas la prudonismen en ĝia tuta reakcia formo. Por krei la modernan revolucian klason de proletaro, absolute necesis ke la umbilika ŝnuro estu tratanĉita, kiu ankoraŭ ligis la laboriston de la pasinteco al la grundo. La manteksisto, kiu havis sian dometon, ĝardeneton kaj kampeton apud sia teksilo, ĉe ĉia mizero kaj ĉe ĉia politika premo estis trankvila kontentulo „en tuta dibeateco kaj honoro”, demetis la ĉapelon antaŭ la riĉulo, la pastro kaj la ŝtatoficisto kaj estis interne ĝisoste sklavo. Ĝuste la moderna granda industrio, kiu faris el la laboristo katenita ĉe la grundo komplete senposedan, senigitan je ĉiaj tradiciaj katenoj tute senrajtan proleton, ĝuste tiu ekonomia revolucio kreis la kondiĉojn, sub kiuj sole la ekspluatado de la laboranta klaso en ĝia lasta formo, en la kapitalisma produktado, renverseblas. Kaj nun venas tiu larmriĉa prudonisto kaj lamentas, kvazaŭ pri granda malprogreso, pri la elpelo de la laboristoj el domo kaj hejmo, kiu estis ĝuste la tute unua premiso por ilia spirita emancipiĝo.

Antaŭ 27 jaroj mi priskribis en ĝiaj ĉefaj trajtoj („Situacio de la laboranta klaso en Anglio”)⁶ ĝuste tiun procezon de elpelado de la laboristoj el domo kaj hejmo, tiel kiel ĝi okazis en la 18-a jarcento en Anglio. La fiaĵoj, kiujn la grundposedantoj kaj fabrikistoj faris ĉe tio, la materie kaj morale malutilaj efikoj, kiujn tiu elpelado unue havis por la koncernataj laboristoj, estas tie ankaŭ laŭmerite prezentitaj. Sed ĉu mi povintus kaprici, vidi en tiu historia evoluprocezo, kiu sub la cirkonstancoj estis tute necesa, malprogreson „malantaŭ la sovaĝulojn”? Neeble. La angla proleto de 1872 staras senfine pli alte ol la kampara teksisto kun „domo kaj hejmo” de 1772. Kaj ĉu la kaverno kun sia kaverno, la aŭstraliano kun sia terkabano, la indiano kun sia propra hejmo iam ajn prezentos junian ribelon kaj Parizan Komunumon?

Ke la situacio de la laboristoj ekde la starigo de la grandskala kapitalisma produktado en sia tutaĵo fariĝis materie pli malbona, tion pridubas nur la burĝo. Sed ĉu ni pro tio sopire retrorigardu al la (ankaŭ tre magraj) vian-dopotoj de Egiptujo, al la kampara etindustrio, kiu edukis nur servutajn

6 *Friedrich Engels: Die Lage der arbeitenden Klasse in England. Nach eigener Anschauung und authentischen Quellen* [Frederiko Engelson: La situacio de la laboranta klaso en Anglio. Laŭ propra rigardo kaj aŭtentaj fontoj], (verkita de novembro 1844 ĝis marto 1845), MEW, vol. 2, p. 225-506. -v1

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

animojn, aŭ al la „sovaĝulo”? Male. Nur la proletaro, kreita per la moderna granda industrio, liberigita el ĉiaj hereditaj katenoj, ankaŭ el tiuj, kiuj ligis ĝin al la grundo, kaj kunpelita en la grandaj urboj, kapablas plenumi la grandan socian transformadon, kiu ĉesigos ĉian klasan ekspluatadon kaj ĉian klasan regadon. La malnovaj kamparaj manteksistoj kun domo kaj hejmo estus neniam kapablaj je tio, ili neniam povintus pensi tian penson, kaj eĉ malpli voli ties plenumadon.

Por Prudono, male, la tuta industria revolucio de la lastaj cent jaroj, la vaporforto, la granda fabrikado, kiu anstataŭigas la manlaboron per maŝinoj kaj milobligas la produktadforton de la laboro, estas plej naŭza evento, io, kio envere ne devintus okazi. La etburĝo Prudono postulas mondon, en kiu ĉiu pretigas apartan, memstaran produkton, kiu estas tuj konsumebla kaj merkate interŝanĝebla; se tiam nur ĉiu ricevas la plenan valoron de sia laboro en alia produkto, tiam la „eterna justeco” estas kontentigita kaj la plej bona mondo produktita. Sed tiu prudona plej bona mondo estas jam en burĝona stato distretita de la piedo de la progresanta industria evoluo, kiu jam delonge neniigis la unuopan laboron en ĉiuj grandaj industrianĉoj kaj en la pli kaj plej malgrandaj branĉoj ĉiutage neniigas ĝin pli; kiu en ĝian lokon metas la socian laboron, subtenatan de maŝinoj kaj de servigitaj naturfortoj, kies preta, tuj interŝanĝebla aŭ konsumebla produkto estas la komuna faro de multaj unuopuloj, tra kies manoj ĝi devis iri. Kaj ĝuste per tiu ĉi industria revolucio la produktadforto de la homa laboro atingis tian alton, ke la ebleco estas donita – por la unua fojo, de kiam homoj ekzistas –, ĉe saĝa distribuado de la laboro inter ĉiuj, produkti ne nur sufiĉe por la abunda konsumado de ĉiuj socianoj kaj por abunda rezervfonduso, sed ankaŭ lasi al ĉiu sufiĉe da libertempo, por ke tio, kio inter la historie heredita klereco – scienco, arto, rilatmanieroj ktp – vere valoras, estu ne nur konservata, sed el monopollo de la reganta klaso transformata en komunan havaĵon de la tuta socio kaj plu disvolvata. Kaj ĉi tie estas la decida punkto. Ekde kiam la produktadforto de la homa laboro evoluis ĝis tiom alta grado, ĉia preteksto por ekzisto de reganta klaso malaperas. Ĉar la lasta kialo por defendi la klasan diferencon estis ĉiam: Necesas ke estu klaso, kiu ne devas laboregi por produkti sian ĉiutagan vivtenadon, por ke ĝi havu tempon prizorgi la spiritan laboron de la socio. Al tiu babilado, kiu ĝis nun havis sian grandan historian signifon, la industria revolucio de la lastaj cent jaroj unu fojon por ĉiam fortranĉis la radikojn. La ekzisto de reganta klaso fariĝas

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

Ĉiutage pli granda malhelpo por la disvolvado de la industria produktadforto kaj same por tiu de la scienco, de la arto kaj precipe de la kleraj rilatformoj. Pli grandaj kruduloj ol niaj modernaj burĝoj neniam ekzistis.

Ĉio ĉi tute ne tuŝas la amikon Prudono. Li volas la „eternan justecon” kaj nenion pli. Interŝanĝe por sia produkto ĉiu ricevu la plenan laborsumon, la plenan valoron de sia laboro. Sed elkalkuli tion en produkto de la moderna industrio, estas komplika afero. La moderna industrio ĝuste malklarigas la apartan parton de la unuopulo je la fina produkto, kiu en la malnova unuopa manlaboro prezentiĝis per si mem en la farita produkto. Krome, la moderna industrio pli kaj pli forigas la unuopan interŝanĝon, sur kiu la tuta prudona sistemo estas bazita, nome la rektan interŝanĝon inter du produktistoj, el kiuj ĉiu interŝanĝas la produkton de la alia por konsumi ĝin. Pro tio, tra la tuta prudonismo iras reakcia trajto, abomeno kontraŭ la industria revolucio, kaj la emo, esprimanta sin jen pli malkaŝe, jen pli kaŝe, forĵeti el la templo la tutan modernan industrion, vapormaŝinojn, ŝpinmaŝinojn kaj aliajn fiaĵojn kaj reveni al la malnova, solida manlaboro. Ke ni tiam perdis naŭcent naŭdek naŭ elmilojn da produktadforto, ke la tuta homaro estus kondamnita al la plej akra laborsklaveco, ke la malsatmizero fariĝus ĝenerala regulo – ĉu tio gravas, se ni nur sukcesas aranĝi la interŝanĝon tiel, ke ĉiu ricevas la „plenan laborsumon” kaj ke la „eterna justeco” estas plenumata? *Fiat justitia, pereat mundus!* – Fariĝu justeco, eĉ se pereas la mondo!

Kaj la mondo ja pereus ĉe tiu prudona kontraŭrevolucio, se tiu entute estus plenumebla.

Cetere estas memkomprenebla, ke ankaŭ ĉe la socia produktado, kondiĉita de la moderna industrio, eblas certigi al ĉiu la „plenan rezulton de sia laboro”, se tiu frazo havas sencon. Kaj ĝi havas sencon nur, se oni etendas ĝin per tio, ke ne ĉiu unuopa laboristo fariĝas posedanto de tiu „plena rezulto de sia laboro”, sed ja la tuta socio, konsistanta nur el laboristoj, fariĝas posedanto de la tuta produkto de sia laboro, kiujn ĝi parte disdonas por konsumado inter siaj membroj, parte akumulas por anstataŭigo kaj pliigo de siaj produktadrimedoj kaj parte kiel rezervfonduso por produktado kaj konsumado.

*

Laŭ la ĝis nun dirito ni povas jam anticipe scii, kiel nia prudonisto

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

solvos la grandan loĝejdemandon. Unuflanke ni havas la postulon, ke ĉiu laboristo devas havi sian propran loĝejon, apartenantan al li, por ke ni ne staru pli longe sub la sovaĝuloj. Aliflanke ni havas la aserton, ke la du-, tri-, kvin- aŭ dek-obla pago de la origina kostprezo de domo en formo de lupago, kiel ĝi efektive okazas, baziĝas sur *jura rajto* kaj ke tiu jura rajto troviĝas en kontraŭdiro kun la „*eterna justeco*”. La solvo estas simpla: Ni forigu la juran rajton kaj deklaras, kaŭze de la eterna justeco, la pagitan lupagon kiel partan pagon por la prezo de la loĝejo mem. Se oni tiel aranĝis siajn kondiĉojn, ke ili jam entenas en si la konkludon, tiam kompreneble jam ne necesas por ĝi pli da lerteco ol kiun ĉiu ĉarlatano posedas por tiri la antaŭe preparitan rezulton preta el la sako kaj insisti pri la neskuebla logiko, kies produkto ĝi estas.

Kaj tiel okazas ĉi tie. La forigo de la luloĝejo estas proklamita kiel neceso, kaj nome en tiu formo, ke oni postulas la transformon de ĉiu luprenanto en proprietulon de sia loĝejo. Kiel ni faras tion? Tute simple:

„La luloĝejo estas kvitigata ... Al la ĝisnuna domposedanto oni pagas la valoron de lia domo ĝis la lasta groŝo. Anstataŭ ke, kiel ĝis nun, la pagata lupago estas la tributo, kiun la luprenanto pagas al la eterna rajto de la kapitalo, anstataŭ tio, ekde la tago, en kiu la kvitigo de la luloĝejo estas proklamita, la sumo precize pagita de la luprenanto fariĝas la jara partopago por la loĝejo transirinta en lian posedon ... La socio ... sur tiu vojo transformiĝas en tutaĵon de sendepende *liberaj* posedantoj de loĝejoj.”

La prudonisto opinias krimo kontraŭ la eterna justeco en tio, ke la domproprietulo sen laboro povas eltiri grundrenton kaj interezon el la kapitalo investita en la domo. Li dekretas, ke tio devas ĉesi; ke la kapitalo investita en domojn jam ne enspezigu interezon, kaj, se ĝi reprezentas aĉetitan grundposedon, ankaŭ ne grundrenton. Nu, ni vidis, ke per tio la kapitalisma produktadmaniero, la bazo de la nuna socio, tute ne tuŝiĝas. La ĉefa punkto, ĉirkaŭ kiu la ekspluatado de la laboristo turniĝas, estas la vendo de la laborforto al la kapitalisto kaj la uzo, kiun la kapitalisto faras en tiu negoco, per tio ke la devigas la laboriston produkti multe pli ol la pagitan valoron de la laborforto. Tiu negoco inter kapitalisto kaj laboristo estas tio, kio produktas ĉian plusvaloron, kiu poste dividiĝas en formo de grundrento, komerca profito, kapitalinterezo, impostoj ktp al la diversaj subspecoj de kapitalistoj

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

kaj ties servistoj. Kaj nun venas nia prudonisto kaj kredas, ke se oni malpermesas fari profiton resp. interezojn al *unu sola subspeco* de kapitalistoj, kaj pli precize al tiuj kapitalistoj, kiuj rekte tute ne aĉetas laborforton, do ankaŭ ne produktigas plusvaloron, oni estus paŝon antaŭe! La amaso da nepagata laboro forprenata de la laborista klaso restus precize la sama, ankaŭ se oni morgaŭ forprenus al la domposedantoj la eblecon pagi al si grundrenton kaj interezojn, kio ne malhelpas nian prudoniston deklari:

„La forigo de la luloĝejo estas do unu el la *plej fruktodonaj kaj plej grandiozaj strebaĵoj*, kiu devenas el la sino de la revolucia ideo kaj devas fariĝi *unuaranga postulo* de la sociala demokratio.”

Jen tute la bazarkriado de la majstro Prudono mem, ĉe kiu la klukado estas ankaŭ ĉiam en inversa proporcio al la grandado de la metitaj ovoĵoj.

Sed nun imagu la belan staton, kiam ĉiu laboristo, etburĝo kaj burĝo estas trudata, per jaraj partopagoj fariĝi unue parta, poste kompleta proprietulo de sia loĝejo! En la industriadistriktoj de Anglio, kie ekzistas granda industrio, sed malgrandaj laboristaj domoj kaj kie ĉiu edziĝinta laboristo prilogaĵas domon por si, la afero havus ankoraŭ eblan sencon. Sed la malgranda industrio de Parizo kaj de la plej multaj grandaj urboj de la kontinento estas kompletigata de grandaj domoj, en kiuj kune loĝas dek, dudek, tridek familioj. En la tago de la mondliberiga ordono, kiu proklamas la partopagan kvitigadon de la luloĝejo, Petro laboras en maŝinfabriko en Berlino. Post fino de unu jaro li estas proprietulo, ekzemple de la dekkvina parto de sia loĝejo konsistanta el kamero de la kvina etaĝo ie ĉe la Hamburga Pordego. Li perdas sian laboron kaj baldaŭ poste troviĝas en simila loĝejo, kun brila vido al la korto, en la tria etaĝo ĉe la *Pothof* en Hanovro, kie li post kvinmonata restado ĵus akiris trideksesonon de la proprieto, kiam striko venigas lin al Munkeno kaj devigas lin, per dekunumonata restado, ŝarĝi sin per precize ¹¹/₁₈₀ de la proprieta rajto pri sufiĉe malluma teretaĝa loko, malantaŭ la *Ober-Angergasse*. Kromaj transloĝiĝoj, kiuj hodiaŭ ofte okazas al laboristoj, aldone alkroĉiĝas al li: ⁷/₃₆₀ de ne malpli rekomendinda loĝejo en *St. Gallen*, ²³/₁₈₀ de alia en *Leeds* kaj ³⁴⁷/_{56.223}, precize kalkulite, tiel ke la „eterna justeco” ne povas plendi, de tria en *Seraing*. Kion nia Petro havas nun de ĉiuj ĉi loĝejpartoj? Kiu donas al li la ĝustan valoron por tio? Kie li trovi la proprietulo(j)n de la ceteraj partoj je siaj diversaj iamaj loĝejoj? Kaj kiel statas eĉ pri la proprietrilatoj de ajna granda domo, kies etaĝoj entenas

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

ekz-e dudek loĝejojn kaj kiu, post fino de la templimo de kvitigo kaj kiam la luloĝeja reĝimo estas forigita, apartenas eble al tricent partaj proprietuloj dissemitaj en ĉiuj mondpartoj? Nia prudonisto respondos, ke ĝis tiam ekzistos la prudona interŝanĝbanko, kiu ĉiam pagos al ĉiu por ĉiu labor-produkto la plenan laborrezulton, do ankaŭ por loĝejparto la plenan valoron. Sed la prudona interŝanĝbanko ĉi tie tute ne koncernas nin, ĉar ĝi mem estas nenie menciita en la artikoloj pri la loĝejdemando; ĝi due baziĝas sur la stranga eraro, ke, se iu volas vendi varon, li ankaŭ nepre trovas aĉetanton por ĝia plena valoro, kaj trie, antaŭ ol Prudono inventis ĝin, ĝi jam en Anglio sub la nomo *Labour Exchange Bazaar* pli ol unufoje bankrotis.

La tuta ideo, ke la laboristo devas *aĉeti* sian loĝejon, siavice baziĝas sur la jam emfazita prudona reakcia baza koncepto, ke la kondiĉoj kreitaj de la moderna granda industrio estas malsanaj elkreskaĵoj kaj ke la socio estas perforte – t.e. kontraŭ la fluo, kiun ĝi de cent jaroj sekvas – kondukenda al stato, en kiu la malnova stabila manlaboro de la unuopulo estas la regulo kaj kiu estas entute nenio alia ol idealigita restarigo de la pereinta kaj ankoraŭ pereanta etindustria entrepreno. Ekde kiam la laboristoj estas reĵetitaj en tiujn stabilajn kondiĉojn, se la „sociala tumulto” estas feliĉe forigita, tiam la laboristo kompreneble povas ankaŭ ree uzi proprieton je „domo kaj hejmo” kaj la supre menciita kvitigo aperas malpli absurda. Sed Prudono forgesas, ke, por tion plenumi, oni devas unue retrometi la horloĝon de la mondhistorio je cent jaroj kaj ke li per tio reduktus la hodiaŭajn laboristojn ree al same mensbaritaj, servaĉantaj, obeemaj sklavmensuloj kiaj estis iliaj prapraavoj.

Sed en tiu mezuro, en kiu en tiu prudona solvo de la loĝejdemando kuŝas racia, praktike uzebla enhavo, en tiu mezuro ĝi estas nuntempe jam praktikata, kaj tiu praktikado ne devenas el la „sino de la revolucia ideo”, sed – el la grandaj burĝoj mem. Ni aŭdu pri tio elstaran hispanan gazeton, *La Emancipación* de Madrido, de la 16-a de marto 1872:

„Ekzistas ankoraŭ alia rimedo solvi la loĝejdemandon, kiu estas proponita de Prudono kaj kiu unuavide ŝajnas brila, sed ĉe pli detala ekzameno senvaliĝas sian tutan senpovecon. Prudono proponis transformi la luprenantojn en aĉetantojn je parta pago, tiel ke la jare pagata lumono estu kalkulata kiel parta pago je la valoro de la loĝejo kaj ke la luprenanto post certa tempo fariĝus proprietulo de tiu loĝejo. Tiu rimedo, kiun Prudono konsideris tre revolucia, estas nuntempe praktikata en ĉiuj

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

landoj de societoj de spekulistoj, kiuj tiel per altigo de la luprezo pagigas al si la valoron de la domoj du- ĝis tri-oble. S-ro Dollfus kaj aliaj grandaj fabrikistoj de la nordorienta Francio realigis tiun sistemon, ne nur por enpoŝigi monon, sed krome kun politika nedirita celo.

La plej saĝaj gvidantoj de la regantaj klasoj ĉiam direktis siajn klopodojn al pliiĝo de la nombroj de etaj proprietuloj, por eduki por si armeon kontraŭ la proletaro. La burĝaj revolucioj de la 18-a jarcento dividis la grandan grundposedon de la nobelaro kaj de la eklezio en etan parcelproprieton, kiel hodiaŭ la respublikanoj volas fari kun la ankoraŭ ekzistanta granda grundposedo, kaj tiel kreis klason de malgrandaj grundproprietuloj, kiuj de tiam fariĝis la plej reakcia elemento de la socio kaj la konstanta obstaklo kontraŭ la revolucia movado de la urba proletaro. Napoleono la 3-a intencis, per malgrandigo de la unuopaj partoj de la ŝtatŝuldoj krei en la urboj similan klason, kaj s-ro Dollfus kaj liaj kolegoj, per tio ke ili vendis al siaj laboristoj malgrandajn loĝejojn pagendajn per jaraj kvotoj, provis sufoki en la laboristoj ĉian revolucionan spiriton kaj samtempe ligi ilin per ilia grundposedo al la fabriko, en kiu ili laboris; tiel ke la plano de Prudono ne nur ne kreis pli facilan vivon por la laboristoj – ĝi turnis sin eĉ rekte kontraŭ ili.”⁷

Kiel la loĝejdemando nun solveblas? En la nuntempa socio, tiel kiel ĝuste ĉia alia socia demando estas solvata: per la iom-post-ioma ekonomia kompensado de postulo kaj oferto, solvo, kiu mem ĉiam denove reproduktas la demandon, do kiu ne estas solvo. Kiel sociala revolucio solvus tiun demandon, tio dependas ne nur de la respektivaj cirkonstancoj, sed ankaŭ

7 Kiel tiu solvo de la loĝejdemando fariĝas sponteca per la ligado de la laboristoj al propra „hejmo” proksime de grandaj aŭ kreskantaj usonaj urboj, pri tio jena teksto el letero de Eleanor Marx-Aveling, *Indianapolis*, 28-a de novembro 1886: „En aŭ pli ĝuste apud *Kansas City* ni vidis kompatindajn malgrandajn lignajn barakojn, kun proksimume tri ĉambroj, ankoraŭ tute en la sovaĝejo; la grundo kostis 600 dolarojn kaj estus ĝuste sufiĉe granda por meti sur ĝin la dometon; tiu mem kostis kromajn 600 dolarojn, do entute 4.800 markojn por mizera etaĵo, ĉe horo da vojo de la urbo, en ŝlima solecejo.” Tiel la laboristoj devas fari pezajn hipotekajn ŝuldojn por ricevi tiujn loĝejojn kaj nun estas des pli sklavo de siaj pandonantaj mastroj; ili estas ligitaj al siaj domoj, ili ne povas foriri kaj devas toleri ĉiajn al ili proponitajn laborkondiĉojn. [Noto de Engelso al la eldono de 1887.]

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

kune kun ili de multaj aliaj demandoj, inter kiuj la forigo de la kontraŭeco de urbo kaj kamparo estas unu el la plej esencaj. Ĉar ni ne devas fari utopi-ecajn sistemojn por la disvolvado de estonta socio, estus pli ol senutila okupiĝi pri tio. Sed unu afero certas, ke jam nun en la grandaj urboj ekzistas sufiĉe da loĝdomoj por tuj ĉesigi ĉian realan „loĝejmizeron” per racia uzado de tiuj domoj. Tio povas okazi kompreneble nur per senproprietigo de la nunaj posedantoj respektive per enloĝigo en iliaj domoj de senhejmaj aŭ en iliaj ĝisnunaj loĝejoj tro kunpremataj laboristoj, kaj ekde kiam la proletaro konkeris la politikan potencon, tia dispono, necesa por la publika bono, estos same facile plenumbla kiel ĉia alia senproprietigo kaj enloĝigo fare de la nuntempa ŝtato.

Sed nia Prudono ne kontentiĝas pri siaj ĝisnunaj atingoj en la loĝej-problemo. Li devas levi ĝin de la plata tero en la regionon de la pli alta socialismo, por ke ĝi ankaŭ tie pruviĝu taŭga kiel esenca „ono de la socia problemoj”.

„Ni supozu nun, ke oni vere kaptas la produktivon de la kapitalo ĉe la kornoj, kio pli aŭ malpli frue devos okazi, ekz-e per transira leĝo, kiu fiksas la interezon por ĉiaj kapitaloj al unu procento, notu bone, kun la tendenco ankaŭ tiun procentaĵon ĉiam pli proksimigi al nulo, tiel ke fine estos pagata nenio ol nur la laboro necesa por transformo de la kapitalo. Kiel ĉiuj aliaj produktoj, kompreneble ankaŭ domo kaj loĝejo estos entenata en tiu leĝo. [...] La posedanto estos la unua kiu proponas sian domon al vendo, ĉar alie ĝi estus ne uzata kaj la kapitalo en ĝi investita simple senutila.”

Tiu frazo entenas unu el la ĉefaj kredkonfesoj de la prudona kateĥismo kaj donas frapantan ekzemplon de la en ĝi reganta konfuzo.

La „produktivo de la kapitalo” estas sensencaĵo, kiun Prudono senri-garde transprenas de la burĝaj ekonomikistoj. La burĝaj ekonomikistoj ja ankaŭ komencas per tiu frazo, ke la laboro estas la fonto de ĉia riĉaĵo kaj la mezuro de la valoro de ĉiuj varoj; sed ili devas ankaŭ klarigi, kiel okazas, ke la kapitalisto, kiu pagas kapitalon por industria aŭ metia negoco, ne nur rricevas sian pagitan kapitalon fine de la negoco, sed krome ankaŭ profit-on. Ili devas do implikiĝi en diversaj kontraŭdiroj kaj atribui ankaŭ al la kapitalo ian produktivon. Nenio pruvas pli bone, kiom profunde Prudono

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

estas ankoraŭ implikita en la burĝa pensmaniero, ol la fakto, ke li alproprigas al si tiun dirmanieron pri la produktivo de la kapitalo. Jam dekomence ni vidis, ke la tiel nomata „produktivo de la kapitalo” estas nenio alia ol ĝia kapablo (sub la nuntempaj sociaj kondiĉoj, sen kiuj ĝi ja ne estus kapitalo) alproprigi al sia la nepagatan laboron de dunglaboristoj.

Sed Prudono distingiĝas de la burĝaj ekonomikistoj per tio, ke li ne aprobas tiun „produktivon de la kapitalo”, sed male malkovras en ĝi rompon de la „eterna justeco”. Ĝuste tiu „produktivo de la kapitalo”, laŭ li, malebligas, ke la laboristo ricevas la plenan rezulton de sia laboro. Ĝi estas do forigenda. Kaj kiel? Per tio, ke oni per devigaj leĝoj malaltigas la *interzkvoton* kaj fine reduktas ĝin al nulo. Tiam, laŭ nia prudonisto, la kapitalo ĉesas esti produktiva.

La interezo de la pruntita *monkapitalo* estas nur parto de la profito; la profito, ĉu de industria, ĉu de komerca kapitalo, estas nur parto de la plusvaloro forprenita de la laborista klaso fare de la kapitalista klaso en la formo de nepagita laboro. La ekonomiaj leĝoj, kiuj reguligas la interzkvoton, estas de la speco de tiuj, kiuj reguligas la kvoton de la plusvaloro, tiom sendependaj kiom tio entute povas okazi inter leĝo de unu sola socia formacio. Sed koncerne la distribuadon de tiu plusvaloro inter la unuopaj kapitalistoj, klaras, ke por indusstriuloj kaj komercistoj, kiuj havas multe da kapitalo antaŭpagita de aliaj kapitalistoj en sia komerco, la kvoto de ilia profito devas kreski en la sama mezuro kiel – se ĉiuj aliaj cirkonstancoj restas senŝanĝaj – la interzkvoto falas. La malaltigo kaj fina forigo de la interzkvoto do tute ne „kaptus la produktivon de la kapitalo” vere „ĉe la kornoj”, sed nur alie reguligus la distribuadon de la plusvaloro – forprenita al la laborista klaso kaj nepagita – inter la unuopaj kapitalistoj kaj certigus avantaĝon ne al la laboristoj kontraŭ la industria kapitalisto, sed al la industria kapitalisto kontraŭ la rentulo.

Prudono, el sia jurista vidpunkto, klarigas la interzkvoton, kiel ĉiujn ekonomiajn faktojn, ne per la kondiĉoj de la socia produktado, sed per la ŝtataj leĝoj, en kiuj tiuj kondiĉoj ricevas ĝeneralan esprimon. El tiu vidpunkto, al kiu mankas ĉia ideo pri la interrilato de la ŝtataj leĝoj kun la produktadkondiĉoj de la socio, tiuj ŝtataj leĝoj ŝajnas nepre esti pure arbitraj ordonoj, ĉiumomente ankaŭ anstataŭigeblaj per ilia rekta malo. Estas do nenio pli facila por Prudono ol fari dekreton – ekde kiam li havas la povon

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

por tio – , per kiu la interezkvoto estas fiksita al unu elcento. Kaj se ĉiuj aliaj sociaj cirkonstancoj restas senŝanĝaj, tiu prudona dekreto ekzistos simple nur sur la papero. La interezkvoto kiel antaŭe orientiĝos laŭ la ekonomiaj leĝoj, al kiuj ĝi estas hodiaŭ submetita, spite al ĉiaj dekretoj; kreditkapablaj homoj laŭ la cirkonstancoj prenos monon je 2, 3, 4 kaj pli da elcentoj, same kiel antaŭe, kaj la nura diferenco estos, ke la rentuloj estos tre singardaj kaj pruntos monon nur al homoj, ĉe kiuj ili ne devas atendi proceson. Preterpase dirite, tiu grandioza plano, preni al la kapitalo ĝian „produktivon” estas prae malnova, tiom malnova kiel la – uzurleĝoj, kiuj celas nenion alian ol mal-altigi la interezkvoton kaj kiuj estas nun ĉie forigitaj, ĉar en la praktiko estis ĉiam rompataj aŭ ĉirkaŭrataj kaj la ŝtato devis rekoni sian senpovecon kontraŭ la leĝoj de la socia produktado. Kaj la reenkonduko de tiu mez-epokaj, neplenumblaj leĝoj devas „kapti la produktivon de la kapitalo ĉe la kornoj”? Ni vidas, ju pli detale oni esploras la prudonismon, des pli reakcia ĝi aperas.

Kaj kiam poste la interezkvoto estas reduktita al nulo, la kapitalinterezo do forigita, tiam estos „nenio pagata ol la laboro necesa por la transformo de la kapitalo”. Per tio li celas: la forigo de la interezkvoto egalas al la forigo de la profito kaj eĉ de la plusvaloro. Sed se eblus, *reale* forigi la interezon per dekreto, kio estus la sekvo? Ke la klaso de rentuloj jam ne havus kialon por prunti sian kapitalon en formo de antaŭpagoj, sed investus ĝin mem industrie en akciaj societoj por propra konto. La kvanto de la plusvaloro forprenata al la laborista klaso fare de la kapitalista klaso restus la sama, nur ĝia distribuado ŝanĝiĝus, kaj ankaŭ tio ne konsiderinde.

Fakte nia prudonisto pretervidas, ke ankaŭ jam nun, en la varaĉeto de la burĝa socio, mezume estas ne pli pagata ol „la laboro necesa por la transformo de la kapitalo” (li celas, por produktado de certa varo). La laboro estas mezuro de la valoro de ĉiuj varoj, kaj en la nuntempa socio – senrigarde la osciladojn de la merkato – estas simple malebla, ke en la ĉioma mezumo por la varoj estas pagata pli ol la laboro necesa por ilia produktado. Ne, ne, kara prudonisto, la hoko en la ezoko troviĝas tute aliie: Ĝi kuŝas en tio, ke la „laboro necesa” por „la transformo de la kapitalo” (por uzi Vian konfuzan esprimmanieron) ĝuste *ne estas plene pagata!* Kiel tio okazas, tion vi povas legi ĉe Markso, en lia „Kapitalo”, p. 128-160.⁸

8 En Esperanto: Karlo Markso: La kapitalo, 1-a libro ... (librofina librolisto n-ro

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

Sed krome. Se la kapitalinterezo estas forigita, tiam per tio estas forigita ankaŭ la luinterezo⁹. Ĉar „kiel ĉiuj aliaj produktoj, kompreneble ankaŭ domo kaj loĝejo estos entenata en tiu leĝo”. Tio estas tute laŭ la spirito de la maljuna majoro, kiu venigas sian unujarulon: „Mi aŭdas, vi estas doktoro – do venu de tempo al tempo ĉe mi, se oni havas edzinon kaj sep infanojn, tiam estas ĉiam io por flicki.”

La unujarulo: „Sed pardonu min, s-ro Majoro, mi estas doktoro pri filozofio.”

Majoro: „Pri tio mi fajfas, kesto estas kesto.”

Tiel okazas ankaŭ al nia prudonisto: luinterezo aŭ kapitalinterezo, pri tio li fajfas, interezo estas interezo, kesto estas kesto. – Ni vidis supre, ke la luprezo, vulgare luinterezo, konsistas: 1-e el parto de grundrento; 2-e el parto de interezo pri la konstrukapitalo inkluzive de la profito por la konstruentreprenisto; 3-e el parto por kostoj de riparado kaj asekuro; 4-e el parto, kiu amortizas la konstrukapitalon inkluzive de la profito en jaraj partopagoj en la proporcio, en kiu la domo iom post iom eluziĝas.

Kaj nun ankaŭ la plej blinda blindulo devas vidi:

„La posedanto estos la unua kiu proponas sian domon al vendo, ĉar alie ĝi estus ne uzata kaj la kapitalo en ĝi investita simple senutila.”

Kompreneble. Se oni forigas la interezon por kapitalo, tiam neniu domposedanto povas plu ricevi eĉ groŝon por sia domo, nur ĉar oni povas por luprezo ankaŭ diri luinterezo kaj ĉar la luinterezo inkludas parton, kiu estas reala kapitalinterezo. Kesto restas kesto. Se la uzurleĝoj pri la ordinara kapitalinterezo povis fariĝi senefikaj nur per ilia ĉirkaŭirado, ili neniam eĉ nur iomete tuŝis la altecon de la doma luprezo. Nur al Prudono restis rezervita iluzii, ke lia nova uzurleĝo senpere reguligus ne nur la simplan kapitalinterezon, sed ankaŭ la komplikan luprezon por loĝejoj kaj iom post iom forigus ĝin. Kial tiam oni ankoraŭ aĉetu per multa mono de la domposedanto la domon fariĝintan „simple senutila”, kaj kial sub tiuj cirkonstancoj la domposedanto ne ankoraŭ aldonas monon por seniĝi je tiu „simple senutila” domo, por ke li ne bezonu pagi kostojn por riparado, pri tio oni lasas nin en

68), p. 111-140.

9 En la germana, la ekvivalento de *luprezo* estas *Mietzins*, laŭvorte *luinterezo*. -vl

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

la nebulo.

Post tiu triumfa atingo sur la kampo de la pli alta socialismo (majstro Prudono nomis tion suprasocialismo) nia prudonisto opinias sin rajta flugi ankoraŭ iom pli alten.

„Temas nun jam nur pri tio, tiri ankoraŭ kelkajn konkludojn, por ĵeti plenan lumon de ĉiuj flankoj sur nian gravan temon.”

Kaj kiaj estas tiuj konkludoj? Aferoj, kiuj sekvas el la antaŭaĵoj same malmulte kiel la senvaloreco de la loĝdomoj el la forigo de la interezkvoto kaj kiuj, senigitaj je la pompaj kaj solenaj dirmanieroj de la aŭtoro, signifas nenion pli ol ke por pli bona okazigo de la kvitiga proceduro de la luloĝejoj estas dezirinda: 1-e preciza statistiko pri la temo, 2-e bona sanpolico kaj 3-e kooperativoj de konstrulaboristoj, kiuj povas transpreni la novkonstruadon de domoj – ĉio aferoj, kiuj estas certe tre belaj kaj bonaj, sed kiuj, malgraŭ ĉia bazarkria vualado per frazaĵoj, tute ne ĵetas „plenan lumon” en la mal-lumon de la prudona penskonfuziĝo.

Kiu plenumis ion tiel grandiozan, havas nun ankaŭ la rajton direkti seriozan averton al la germanaj laboristoj:

„Tiaj kaj similaj demandoj, ŝajnas al ni, ja meritas la atenton de la socia-demokratia [...]. Ĝi provu akiri klarecon, kiel ĉi tie pri la loĝejproblemo, tiel ankaŭ pri la ceteraj gravaj demandoj, kiel kredito, ŝtatŝuldoj, privatŝuldoj, imposto ktp” ktp.

Ĉi tie nia prudonisto anoncas do tutan serion da artikoloj pri „similaj demandoj”, kaj se li pritraktas ilin ĉiujn tiel detale kiel la nunan „tiom gravan temon”, tiam la „*Volksstaat*” havos sufiĉe da manuskriptoj por tuta jaro. Tamen ni povas anticipi tion – ĉio havas la saman rezulton: La kapital-interezo estas forigota, per tio neniiĝas la pagenda interezo por ŝtatŝuldoj kaj privatŝuldoj, la kredito fariĝos senkosta ktp. La sama sorĉvorto estas aplikata al ĉiu ajn objekto, kaj ĉe ĉiu unuopa kazo la miriga rezulto elvenas kun senkompata logiko: ke, kiam la kapitalimposto estas forigita, oni ne bezonas plu pagi interezojn por depruntita mono.

Cetere estas belaj demandoj, per kiuj nia prudonisto minacas nin: *Kredito!* Kian krediton bezonas la laboristo, ol tiun de semajno al semajno aŭ la krediton de la lombardejo? Ĉu tiu estas al li disponigata senkoste aŭ kun

Unua sekcio: Kiel Prudono solvas la loĝejproblemon

interezoj, eĉ lombard-uzuraj interezoj, kian diferencon tio faras por li? Kaj se li, ĝenerale, havus avantaĝon per tio, do se la produktadkostoj de la laborforto fariĝus pli malmultekostaj, ĉu tiam la prezo de la laborforto devus fali? – Sed por la burĝo kaj speciale la etburĝo – por tiuj la kredito estas grava demando, kaj por la etburĝo speciale estus bela afero, se li povus ricevi la krediton ĉiumomente, kaj krome sen pago de interezoj. – „Ŝtatŝuldoj”! La laborista klaso scias, ke ĝi ne faris ilin, kaj kiam ĝi enpotenciĝos, ĝi lasos la repagon al tiuj, kiuj deprenis ilin. – „Privatŝuldoj”! – vidu pri kredito. – „Impostoj”! Aferoj, kiuj tre interesas la burĝaron, sed la laboriston nur tre malmulte: Tio, kion la laboristo pagas je impostoj, tio kun la fluo de la tempo eniras la produktadkostojn de la laborforto, do, devas esti kunkompensotaj de la kapitalisto. Sed ĉiuj ĉi punktoj, kiujn oni prezentas ĉi tie kiel ege gravajn demandojn por la laborista klaso, havas en la realo esencan intereson nur por la burĝo kaj ankoraŭ pli por la etburĝo, kaj ni asertas, spite al Prudono, ke la laborista klaso ne estas alvokita zorgi pri la intereso de tiuj klasoj.

Nia prudonisto diras eĉ ne vorton pri la granda demando, kiu reale koncernas la laboriston, pri la rilato inter kapitalisto kaj dunglaboristo, pri la demando: kiel okazas, ke la kapitalisto povas riĉiĝi per la laboro de siaj laboristoj. Lia mastro kaj majstro tamen ja okupiĝis pri tio, sed absolute ne alportis klarecon en la demandon, kaj ankaŭ en siaj lastaj verkaĵoj li ne estas esence pli progresinta ol en la „*Philosophie de la Misère*” (Filozofio de la mizero), kiun Markso jam en la jaro 1847 tiel frape dissolvigis en ĝian tutan nenion.¹⁰

Estas sufiĉe malbona, ke la latinide parolantaj laboristoj de dudek kvin jaroj havis preskaŭ nenian alian socialisman spiritan nutraĵon ol la skribaĵojn de tiu „socialisto de la dua imperio”; estus duobla malfeliĉo, se la prudonisma teorio inundus nun ankaŭ Germanion. Sed kontraŭ tio estas antaŭzorgite. La teoria starpunkto de la germanaj laboristoj estas progresinta je kvindek jaroj antaŭ la prudonista, kaj sufiĉos starigi avertan ekzemplon en tiu ĉi sola loĝejproblemo, por ne plu bezoni okupiĝi pri tio.

10 Vd Karlo Markso: La mizero de la filozofio ... (librofina librolisto n-ro 17). -vl

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

1

En la sekcio pri la prudenisma solvo de la loĝejproblemo ni montris, kiom multe la etburĝaro estas rekte interesita pri tiu demando. Sed ankaŭ la grandburĝaro havas tre gravan, kvankam malrekta intereson pri ĝi. La moderna naturscienco pruvis, ke la tiel nomataj „malbonaj kvartaloj”, en kiuj la laboristoj estas kunpremitaj, estas la kovejoj de ĉiuj tiaj epidemioj, kiuj de tempo al tempo atakas niajn urbojn. Ĥolero, tifo kaj tifa febro, variole kaj aliaj teruraj malsanoj disvastigas siajn ĝermojn en la poluita aero kaj la venenigita akvo de tiuj laboristaj kvartaloj; ili tie preskaŭ neniam formortas, ili evoluas, ekde kiam la cirkonstancoj ebligas tion, al epidemioj kaj tiam el siaj kovejoj ankaŭ penetras en la pli aerumitajn kaj pli sanfavorajn kvartalojn priloĝatajn de la sinjoroj kapitalistoj. La kapitalista moŝtaro ne povas permesi al si senpune produkti epidemiajn malsanojn inter la laborista klaso; la sekvoj refalas al ĝi mem, kaj la anĝelo-sufokisto furiozas inter la kapitalistoj same senindulge kiel inter la laboristoj.

Ekde kiam tio estis science konstatita, la homamaj burĝoj ekardis en nobla konkuro por la sano de siaj laboristoj. Oni fondis societojn, verkis librojn, faris proponojn, debatis pri leĝoj kaj dekretis ilin, por ŝtopi la fontojn de la ĉiam revenantaj epidemioj. Oni esploris la loĝkondiĉojn de la laboristoj kaj faris provojn por forigi la plej akrajn malbonaĵojn. Precipe en Anglio, kie ekzistis la plej multaj grandaj urboj kaj pro tio la problemoj plej brulas por la grandburĝoj, oni disvolvis grandan agadon: oni nomumis registarajn komisionojn por esplori la sankondiĉojn de la laboranta klaso; ĝiaj raportoj, kiuj rilate al precizeco, kompleteco kaj senpartieco glorie elstaras antaŭ ĉiuj kontinentaj fontoj, liveris la bazojn por novaj, pli aŭ malpli intervenantaj leĝoj. Kvankam tiuj leĝoj ne estas senmankaj, ili tamen senfine superas ĉion, kio ĝis nun en tiu senco okazis sur la kontinento. Kaj tamen la kapitalisma sociordo produktas la malbonaĵojn, pri kies kuracado temas, ĉiam denove kun tia nepreco, ke eĉ en Anglio la kuracado apenaŭ faris unu solan paŝon antaŭen.

Germanio bezonis, kiel kutime, multe pli longan tempon, ĝis kiam ankaŭ ĉi tie la kronike ekzistantaj fontoj de epidemioj evoluis al la alteco necesa por skue vekti la dormeman grandburĝaron. Tamen, kiu iras malrapide, iras sekure, kaj tiel estiĝis fine ankaŭ ĉe ni burĝa literaturo pri la publika sano kaj pri la loĝejproblemo, akveca eltiraĵo el siaj eksterlandaj, precipe anglaj antaŭuloj, al kiu oni per plenvoĉaj, solenaj ŝvelparoloj almenaŭ la ŝajnon de pli alta moralo. Al tiu literaturo apartenas: D-ro Emil Sax: „La loĝkon-diĉoj de la laborantaj klasoj kaj ilia reformo”, Vieno, 1869.¹¹

Por prezenti la burĝan traktadon de la loĝejproblemo mi elektas tiun libron nur ĉar ĝi provas resumi la burĝan literaturon pri la temo. Kaj kiom bela esta la literaturo, kiu servas al nia aŭtoro kiel „fonto”! El la anglaj parlamentaj raportoj, la realaj ĉeffontoj, li nomas nur tri el la plej malnovaj; la tuta libro pravas, ke la aŭtoro *rigardis neniam eĉ nur unu el ili*; sed li prezentas al ni tutan serion da banale burĝaj, bonintence filistraj kaj hipokrite filantropaj skribaĵoj: Ducpétiaux, Roberts, Hole, Huber, la diskutojn de la anglaj socisciencaj (aŭ pli ĝuste sensencaĵaj) kongresoj, la revuon de la Asocio por la bono de la laborantaj klasoj en Prusujo, la aŭstran oficialan raporton pri la pariza mondespozicio, la oficialajn bonapartistajn raportojn pri tiu sama, la „Ilustritan londonan gazeton”, „Tra lando kaj maro” kaj fine „rekonatan aŭtoritaton”, viron de „sagaca, praktika kompreno”, de „konvin-ka emfazo de la parolo”, nome – Julius Faucher! Mankas en tiu fontolisto nur la „Gartenlaube” [„Ĝardenlaŭbo”], la „Kladderadatsch” kaj la fusilisto Kutschke.

Por eviti miskomprenon pri la starpunkto de s-ro Sax, li klarigas sur la paĝo 22:

„Ni nomas socialekonomio la politikan ekonomion en ĝia aplikado al la socialaj demandoj, pli precize esprimate, al la esenco de la rimedoj kaj vojoj, kiujn tiu scienco disponigas al ni, por surbaze de ĝiaj ‘feraj’ leĝoj ene de la kadro de la nuntempe reganta sociordo levi la tiel nomatajn (!) senposedajn klasojn al la nivelo de la posedantaj.”

Ni ne okupiĝos pri la konfuza imago, ke la politika ekonomio entute okupiĝas pri aliaj ol „socialaj” demandoj. Ni aliras tuj la ĉefan punkton. D-

11 Originale: Dr. Emil Sax: „*Die Wohnungszustände der arbeitenden Classen und ihre Reform*”, Vieno, 1869. -vl

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

ro Sax postulas, ke la „feraj leĝoj” de la burĝa ekonomio, la „kadro de la nuntempe reganta sociordo”, per aliaj vortoj, la kapitalisma produktadmaniero, senŝanĝe daŭru, kaj tamen la „tiel nomataj senposedaj klasoj” estu levataj „al la nivelo de la posedantaj”. Nu, estas nepra kondiĉo de la kapitalisma produktadmaniero, ke ekzistas ne nomita, sed reale senposeda klaso, kiu simple havas nenion por vendi ol sian laborforton, kaj kiu estas pro tio devigata vendi tiun laborforton al la industriaj kapitalistoj. La tasko de la nova scienco de socialekonomio, inventita de s-ro Sax, konsistas do en tio: trovi la rimedojn kaj vojojn, kiel ene de socia stato bazita sur la kontraŭeco de kapitalistoj, posedantoj de krudmaterialoj, de produktadinstrumentoj kaj vivrimedoj unuflanke, kaj de senposedaj dunglaboristoj aliflanke, kiel ene de tiu stato de la socio ĉiuj dunglaboristoj transformeblas en kapitalistojn, sen ĉesi esti dunglaboristoj. S-ro Sax opinias, ke li solvis tiun problemon. Eble li havos la bonecon montri al ni, kiel oni povas transformi ĉiujn soldatojn de la franca armeo, pri kiuj la malnova Napoleono ja diris, ke ĉiu portas en sia tornistro sian bastonon de marŝalo, en marŝalojn, sen ke ili ĉesu esti simplaj soldatoj. Aŭ kiel oni sukcesas transformi ĉiujn 40 milionojn da subuloj de la Germana Imperio al germanaj imperiestroj.

Estas la karakteriza trajto de la burĝa socialismo, ke ĝi volas konservi ĉiujn malbonaĵojn de la hodiaŭa socio kaj samtempe forigi tiujn malbonaĵojn. La burĝaj socialistoj volas, kiel jam la „Komunista manifesto” diras, „forigi la sociajn mankojn, por certigi la ekziston de la burĝa socio”, ili volas „la burĝaron sen la proletaro”. Ni vidis, ke s-ro Sax metas la demandon precize same. Li trovas ĝian solvon en la solvo de la loĝejproblemo; li opinias, ke

„per plibonigo de la loĝejoj de la laborantaj klasoj la priskribita korpa kaj spirita mizero estus sukcese forigebla kaj per tio – per ampleksa plibonigo de la loĝejaj kondiĉoj sole – la plej granda parto de tiuj klasoj leveblas el la marĉo de sia ofte apenaŭ homdigna ekzistado al la puraj altecoj de materia kaj spirita bonfarto” (paĝo 14).

Preterpase dirite, estas en la intereso de la burĝaro prisilenti la ekziston de proletaro kreita de la burĝaj produktadkondiĉoj kies ekzistadon ĝi premisas. Pro tio s-ro Sax rakontas al ni sur la paĝo 21, ke sub laborantaj klaso oni komprenu ĉiujn „senhavajn sociajn klasojn”, „malgrandajn homojn entute, kiel metiistojn, vidvinojn, pensiulojn (!), malaltajn oficistojn ktp”

apud la proprasencajn laboristojn. La burĝa socialismo streĉas la manon al la etburĝa.

De kie do venas tiu loĝejmizero? Kiel ĝi estiĝis? S-ro Sax kiel bona burĝo ne rajtas scii, ke ĝi estas nepra produkto de la burĝa sociformo; ke socio ne povas ekzisti sen loĝejmizero, en kiu la granda laboranta amaso dependas ekskluzive de laborsalajro, do de la sumo de vivrimedoj necesa por ĝia ekzistado kaj generado; en kiu novaj plibonigoj de la maŝinaro ktp senĉese senlaborigas amasojn da laboristoj; en kiu fortaj, regule revenantaj industriaj fluktuadoj unuflanke bezonas la ekziston de multnombra rezerv-armeo de senlaboraj laboristoj, aliflanke portempe pelas la grandan amason de la laboristoj senlabore surstraten; en kiu laboristoj estas amase kunpremataj en la grandaj urboj, pli rapide ol en la ekzistantaj kondiĉoj estiĝas loĝejoj por ili, en kiu do por la plej fiaj porkostaloj devas ĉiam troviĝi luantoj; en kiu fine la domposedanto, en sia eco kiel kapitalisto, havas ne nur la rajton, sed pro la konkurenco, ankaŭ certarilate la devon elpremi el sia domproprieto senindulge la plej altajn luprezojn. En tia socio la loĝejmizero ne estas hazardo, ĝi estas necesa institucio, ĝi kune kun siaj sekvoj al la sano ktp forigeblas nur se la tuta sociordo, el kiu ĝi fontas, estas profunde transformata. Sed tion la burĝa socialismo ne rajtas scii. Ĝi *ne rajtas* klarigi al si la loĝejmizeron el la kondiĉoj. Do, restas al ĝi nenia alia rimedo ol klarigi ĝin per moralaj ŝvelparoloj kiel: fontanta el la malboneco de la homoj, por tiel diri el la prapeko."

„Kaj ne estas miskonebla – kaj sekve ne negebla” (aŭdaca konkludo!) –, „ke la kulpo [...] estas parte *ĉe la laboristoj mem*, kiuj deziras havi loĝejon, sed je la alia kaj pli granda parto ĉe tiuj, kiuj transprenas la kontentigon de tiu deziro, aŭ, kvankam ili disponas pri la necesaj rimedoj, ankaŭ ne transprenas ĝin, *ĉe la posedantaj, pli altaj sociaj klasoj*. La kulpo de la lastaj [...] konsistas en tio, ke ili ne klopodas por zorgi pri sufiĉa oferto de bonaj loĝejoj.”

Kiel Prudono transmetas nin el la ekonomio en la juristan kampon, ĉi tie nia burĝa socialisto transmetas nin el la ekonomio en la moralon. Kaj nenio estas pli natura. Kiu deklaras la kapitalisman produktadmanieron, la „ferajn leĝojn” de la hodiaŭa burĝa socio kiel netuŝeblaj kaj tamen volas forigi iliajn neprajn sekvojn, al tiu restas nenio alia ol fari moralpredikojn al la kapitalistoj, moralpredikojn, kies kortuŝa efiko tuj forvaporigaŝ pro la

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

privata intereso kaj, se necese, pro la konkurenco. Tiuj moralpredikoj precize egalas al tiuj de la kokino *ĉerande de lago*, sur kiu ĝiaj elkovitaj anasidoj gaje naĝas. La anasidoj iras sur la akvon, kvankam tiu ne havas plankon, kaj la kapitalistoj ĵetas sin sur la profiton, kvankam tiu ne havas koron. „En monafero la bonkoreco *ĉesas*”, diris jam la olda Hansemann, kiu sciis tion pli bone ol s-ro Sax.

„La bonaj loĝejoj havas tiom altajn prezojn, ke al la plej granda parto de la laboristoj *estas absolute malebla* uzi ilin. La granda kapitalo [...] timeme retenas sin pri loĝejoj por la laborantaj klasoj [...]. Tiel tiuj klasoj kun sia bezono je loĝejoj plejparte fariĝas viktimoj de la spekulado.”

Naŭza spekulado – la granda kapitalo kompreneble spekulas neniam! Sed ne la malica volo, nur la nescio malebligas al la granda kapitalo spekulati pri laboristaj domoj:

„La domposedantoj tute ne *scias*, kiom grandan rolon ludas normala kontentigo de la loĝebezono [...], *ili tute ne scias, kion ili faras al la homoj*, se ili, kio estas la regulo, senrespondece ofertas al ili malbonajn, malutilajn loĝejojn, kaj ili fine ne *scias*, kiom ili per tio malutilas al si mem.” (paĝo 27).

Sed la nescio de la kapitalistoj bezonas la nescion de la laboristoj, por produkti per ĝi la loĝejmizeron. Post kiam s-ro Sax koncedis, ke la „plej malsupraj tavoloj” de la laboristoj, „por ne resti tute senhejmaj, estas devigataj serĉi tranoktejon ie kaj iel ajn kaj tiurilate estas komplete sendefendaj kaj senhelpaj”, li rakontas al ni:

„Ĉar estas delonge konata fakto, ke multaj el ili” (la laboristoj) „pro facilanimeco, sed precipe pro nescio, forprenas el sia korpo la kondiĉojn de natura evoluo kaj de sanfavora ekzistado, oni preskaŭ emus diri: virtuoze, per tio ke *ili ne havas la plej etan ideon* pri racia sanflegado, sed speciale pri tio, kian eksterordinaran gravecon havas pri tio la loĝejoj.” (paĝo 27).

Sed nun aperas la burĝa azenorelo. Dum ĉe la kapitalistoj la „kulpo” forvaporiiĝas en nescion, ĉe la laboristoj la nescio estas nur la kaŭzo de la kulpo. Ni aŭdu:

„Tiel okazas” (nome per la nescio), „ke ili, kiam ili nur iomete ŝparas

ion ĉe la luprezo, ili transloĝiĝas en loĝejojn mallumajn, malsekajn, nesufiĉajn, kiuj, mallonge dirite, primokas ĉiajn postulojn de higieno [...], ke ofte pluraj familioj kune luprenas por si unu solan loĝejon, eĉ unu solan ĉambron –, ĉion por elspezi kiom eble plej malmulte por la loĝejo, dum ili apude *por drinkaĵoj kaj diversaj vantaj amuzaĵoj en vere peka maniero forĵetas siajn enspezojn.*”

La mono, kiun la laboristoj „malŝparas por brando kaj tabako” (paĝo 28), la „gasteja vivo kun ĉiuj siaj lamentindaj sekvoj, kiu kvazaŭ plumba pezo tiras la laboristaron ĉiam denove malsupren en la marĉon,” efektive pezas al s-ro Sax kiel plumbo en la stomako. Ke sub la donitaj kondiĉoj la drinkmanio inter la laboristoj estas nepra produkto de iliaj vivkondiĉoj, same nepra kiel tifo, krimo, fiinsektoj, ekzekuciisto kaj aliaj sociaj malsanoj, tiom nepraj, ke oni povas anticipi kalkuli la mezuman nombron de alkoholmaniuloj, tion s-ro Sax ankaŭ ne rajtas scii. Cetere jam mia iama bazlerneja instruisto diris: „La vulgaruloj iras en la brandaĉodomon, kaj la distingitoj iras en la klubon”, kaj ĉar mi estis en ambaŭ, mi povas atesti ke li pravis.

La tuta babilado pri la „nescio” de ambaŭ partoj kondukas al la malnovaj diroj pri la harmonio de la interesoj de kapitalo kaj laboro. Se la kapitalistoj konus sian veran intereson, tiam ili liverus al la laboristoj bonajn loĝejojn kaj entute traktus ilin pli bone; kaj se la laboristoj komprenus sian veran intereson, ili ne strikus, ne okupiĝus pri socialdemokratio, nek pri politiko, sed bele obeus al siaj ĉefoj, la kapitalistoj. Bedaŭrinde ambaŭ partoj trovas siajn interesojn tute aliloke ol en la predikoj de s-ro Sax kaj de liaj sennombraj antaŭuloj. La evangelio pri la harmonio inter kapitalo kaj laboro estas nun predikita jam kvindek jarojn; la burĝa filantropio pagis pezan monon por pruvi tiun harmonion per modelaj institucioj, kaj kiel ni vidos poste, ni estas hodiaŭ ne pli antaŭe ol antaŭ kvindek jaroj.

Nia aŭtoro aliras nun la praktikan solvon de la demando. Kiom malmulte revolucia estis la propono de Prudono fari la laboristojn proprietuloj de siaj loĝejoj, tio rezultas jam el la fakto, ke la burĝa socialismo jam antaŭ li provis kaj daŭre provas praktike plenumi ĝin. Ankaŭ s-ro Sax deklaras, ke la loĝejproblemo komplete solveblas nur per transdono de la propio de la loĝejo al la laboristoj (p. 58 kaj 59). Eĉ pli, li falas en poetan ekstazon ĉe tiu ideo kaj entuzisamiĝas jene:

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

„Estas io aparta pri la sopiro de la homo je grundposedo, instinkto, kiun eĉ la *febre pulsanta varvivo* de la nuntempo ne kapablis malfortigi. Tio estas la nescia sento pri la graveco de la ekonomia atingo, kiu estas la grundposedo. Per ĝi la homo ricevas sekuran apogon, li kvazaŭ firme enradikiĝas en la grundo, kaj ĉia ekonomio (!) havas en ĝi la plej daŭr-eman bazon. Sed multe trans tiuj materiaj avantaĝoj atingas la benforto de la grundposedo. Kiu estas tiom feliĉa ke li povas nomi grundon sia, tiu atingis la plej altan penseblan ŝtupon de ekonomia sendependeco; li havas lokon, en kiu li povas fari kion li volas, li estas *sia propria mastro*, li havas certan povon kaj *sekuran rezervon* en tempo de bezono; lia memkonscio kreskas kaj kun ĝi lia morala forto. Pro tio la profunda graveco de la proprieto en tiu ĉi demando [...]. La laboristo, hodiaŭ senhelpe elmetita al la sortoŝanĝoj de la konjunkturo, en konstanta dependeco de la dungisto, per tio certagrade elirus el tiu malfacila situacio, li fariĝus kapitalisto kaj estus sekurigita kontraŭ la danĝeroj de senlaboreco aŭ de nekapablo labori, per la realkredito, kiu sekve estus por li alirebla. *Per tio li estus levita el la senposeda klaso en tiun de la posedantoj.*” (paĝo 63)

S-ro Sax ŝajnas premi, ke la homo estas esence kampulo, alie li ne imputus al la laboristoj de niaj grandaj urboj sopiron je grundposedo, kiun neniu alia malkovris ĉe ili. Por niaj grandurbaj laboristoj libereco de moviĝo estas unua vivkondiĉo, kaj grundposedo povas al ili esti nur kateno. Provizu ilin per propraj domoj, rekatenu ilin je la grundo, kaj vi rompas ilian rezistoforton kontraŭ la malaltigo de salajro fare de la fabrikistoj. La unuopa laboristo okaze eble povas vendi sian dometon, sed ĉe serioza striko aŭ ĉe ĝenerala industri-krizo ĉiuj domoj apartenantaj al la koncernataj laboristoj estus merkate vendotaj, do trovus neniun aĉetanton aŭ vendiĝus multe sub la kostprezo. Kaj se ĉiuj trovus aĉetantojn, tiam la tuta granda loĝejreformo de s-ro Sax dissolviĝus ja en nenio, kaj li povus rekomenci. Tamen, poetoj vivas en la mondo de imagoj, kaj tiel ankaŭ s-ro Sax, kiu imagas, ke la grundposedanto „atingis la plej altan ŝtupon de ekonomia sendependeco”, ke li havas „sekuran rezervon”, ke „li fariĝus kapitalisto kaj estus sekurigita kontraŭ la danĝeroj de senlaboreco kaj de nekapablo labori, per la realkredito, kiu estus pro tio al li disponebla” ktp. S-ro Sax foje rigardu la francajn kaj niajn rejnlandajn etkampulojn; ties domoj kaj kampoj estas komplete ŝarĝitaj per hipotekoj, ilia rikolto apartenas al iliaj kreditoroj eĉ antaŭ ol esti

rikoltita, kaj sur ilia „tereno” agas kaj suverene decidas ne ili, sed la uzuristo, la advokato kaj la ekzekuciisto. Tio ja estas la penseble plej alta ŝtupo de ekonomia sendependeco – por la uzuristo! Kaj por ke la laboristoj metu sian dometon kiom eble plej rapide sub la suverenecon de la uzuristo, la favorema s-ro Sax antaŭzorge indikas al ili la realkrediton, pri kiu ili disponeblas, kiun ili en situacio de senlaboreco kaj nekapablo labori povas uzi, anstataŭ fariĝi ŝarĝo de la malriĉul-flegado.

Ĉiukaze s-ro Sax nun solvis la komence metitan demandon: la laboristo „*fariĝas kapitalisto*” per akiro de propra dometo.

Kapitalo estas komando super la nepagata laboro de aliuloj. La dometo de la laboristo fariĝas do kapitalo nur, se li luas ĝin al iu tria kaj en la formo de luprezon alproprigas al si parton de la laborprodukto de tiu tria. Per tio, ke li mem prilogaĝas ĝin, la domo estas ĝuste malhelpata fariĝi kapitalo, same kiel la jako ĉesas esti kapitalo en la sama momento, en kiu mi aĉetas ĝin de la tajloristo kaj surmetas ĝin. La laboristo, kiu posedas dometon en la valoro de mil taleroj, tamen jam ne estas proleto, sed oni devas esti s-ro Sax por nomi lin kapitalisto.

Sed la kapitalisteco de nia laboristo havas ankoraŭ alian flankon. Ni supozu, ke en donita industrioregiono fariĝis regulo ke ĉiu laboristo posedas sian propran dometon. En tiu kazo la laborista klaso de tiu regiono logas senpage; elspezoj por loĝado jam ne eniras en la valoron de ilia laborforto. Ĉia malpliigo de la produktadkostoj de la laborforto, t.e. ĉia daŭra malaltiĝo de la prezo de la vivbezonoj de la laboristo, „laŭ la feraj leĝoj de la ekonomio” egalas al malaltiĝo de la valoro de la laborforto kaj pro tio sekvigas proporcian falon de la salajro. La salajro do malaltiĝus en la mezuro de la ŝparita mezuma sumo de la lupago, t.e. la laboristo pagus la luprezon por sia propra domo, sed ne, kiel antaŭe, per mono al la domposedanto, sed en la formo de nepagata laboro al la fabrikisto, por kiu li laboras. Tiamaniere la ŝparaĵoj de la laboristo investitaj en la dometo ja certasence fariĝus kapitalo, sed kapitalo ne por li, sed por la kapitalisto, kiu laborigas lin.

S-ro Sax do eĉ ne surpapere sukcesas transformi sian laboriston en kapitaliston.

Preterpase dirite, la supre dirito validas pri ĉiuj tiel nomataj socialaj reformoj, kiuj rezultigas ŝparadon aŭ malaltiĝon de la vivrimedoj de la

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

laboristo. Aŭ ili fariĝas ĝeneralaj, kaj tiam sekvas al ili proporcia malaltigo de la salajro, aŭ ili restas tute izolitaj eksperimentoj, kaj tiam ilia nura ekzisto kiel unuopa escepto pravas, ke ilia grandskala praktikado ne kongruas kun la ekzistanta kapitalisma produktadmaniero. Ni supozu, ke en ia regiono oni sukcesas, per ĝenerala enkonduko de konsumasocioj, malplikostigi la vivrimedojn de la laboristoj je 20 elcentoj; tiam la salajro devus tie por la daŭro fali je proksimume 20 elcentoj, t.e. en la sama proporcio, laŭ kiu la koncernaj vivrimedoj eniras la vivtenadon de la laboristoj. Se la laboristo uzas ekz-e mezume tri kvaronojn de sia semajna salajro por tiuj vivrimedoj, tiam la salajro fine falas je $\frac{1}{4} \times 20 = 15$ elcentoj. Mallonge, ekde kiam tia ŝparreformo fariĝis ĝenerala, la laboristo ricevas en la sama proporcio malpli da salajro, en kiu liaj ŝparaĵoj ebligas al li vivi malpli koste. Donu al ĉiu laboristo ŝparitan, sendependan enspezon de 52 taleroj, kaj lia semajna salajro devas fine malaltiĝi je unu talero. Do: ju pli li ŝparas, des malpli da salajro li ricevas. Li ŝparas do ne en sia propra intereso, sed en tiu de la kapitalisto. Kio necesas pli, por plej forte instigi en li „la unuan ekonomian virton, la ŝparemon ...”? (p. 64)

Cetere s-ro Sax diras al ni ankaŭ tuj poste, ke la laboristoj fariĝu domposedantoj ne tiom en sia propra intereso ol en la intereso de la kapitalistoj:

„Sed ne la laboristaro, ankaŭ la tuta socio havas la plej altan intereson vidi kiom eble multaj da siaj membroj kunligitaj (!) kun la grundo” (mi ŝatus foje vidi s-ron Sax en tia pozo) „[...] Ĉiuj sekretaj fortoj, kiuj flamigas la vulkanon, nomatan la sociala demando, kiu ardas sub niaj piedoj, la proleta amariĝo, la malamo [...] la danĝeraj nocikonfuzoj [...] ili devas disvaporiĝi kiel nebulo antaŭ la matena suno, se [...] la laboristoj mem tiuvoje transiras en la klason de la posedantoj.” (p. 65)

Per aliaj vortoj: S-ro Sax esperas, ke la laboristoj per deŝovo de sia proleta pozicio, kiun la domakiro efektive devus alkonduki, perdas ankaŭ sian proletan karakteron kaj refariĝas obeemaj malkuraĝuloj kiel iliaj same domposedaj antaŭuloj. La prudonistoj regalu sin per tio.

Per tio s-ro Sax kredas esti solvinta la socialan demandon:

„*La pli justa distribuado de la havaĵoj*, la sfinksa enigmo, kies solvon provis jam multaj vane, ĉu ĝi ne kuŝas kiel palpebla fakto antaŭ ni, ĉu ĝi per tio ne estas veninta el la regionoj de la idealoj kaj enpaŝinta en la

sferon de la realo? Kaj se realigita, ĉu per tio ne estas atingita unu el la plej altaj celoj, kiun eĉ la *socialistoj de la plej ekstrema tendenco prezentas kiel la pintan punkton de siaj teorioj?*” (p. 66)

Estas vera feliĉo, ke ni tralaboris la libron ĝis ĉi tie. Ĉar tiu jubila krio estas la „pinta punkto” de la Sax-a libro, kaj ekde nun ni estas kondukataj iom post iom desupre, el „la regionoj de la idealoj” al la plata realo, kaj kiam ni sube alvenas, ni trovos, ke nenio, vere nenio ŝanĝiĝis dum nia foresto.

La unuan paŝon desupren nia gvidanto igas nin fari, instruante nin, ke ekzistas du sistemoj de laboristaj loĝejoj: la *cottage*-sistemo, kie ĉiu laborista familio havas sian propran dometon kaj eble ankaŭ ĝardeneton, kiel en Anglio, kaj la kazerna sistemo de la grandaj konstruaĵoj entenantaj multajn laboristajn loĝejojn, kiel en Parizo, Vieno ktp. Inter ambaŭ staras la sistemo kutima en norda Germanujo. La *cottage*-sistemo estas laŭ li ja la sole ĝusta, kaj la sola ĉe kiu la laboristo povas akiri la proprieton de sia domo; krome la kazernsistemo havas tre grandajn malavantaĝojn por la sano, moraleco kaj la doma paco – sed tre bedaŭrinde, la *cottage*-sistemo ĝuste en la centroj de la loĝejmizero, en la grandaj urboj, pro la altaj grundprezoj, estas ne-realigebla, kaj oni povas ankoraŭ esti feliĉa, se oni tie, anstataŭ grandajn kazernojn, konstruas domojn kun 4 ĝis 6 loĝejoj aŭ forigas la ĉefajn mankojn de la kazernsistemo per diversaj konstruaj artaĵoj. (p. 71 – 92)

Ĉu ne, ni jam bonan pecon desupris? La transformado de la laboristoj en kapitalistojn, la solvo de la sociala demando, la domproprietato de ĉiu laboristo – ĉio ĉi restis supre en „la regionoj de la idealoj”; ni devas jam nur enkonduki la *cottage*-sistemon en la kamparo, kaj en la urboj aranĝi la laboristajn kazernojn tiel ke ili estu kiom eble plej elteneblaj.

La burĝa solvo de la loĝejproblemo estas do koncedite fiaskinta – fiaskinta ĉe la kontraŭeco de urbo kaj kamparo. Kaj ĉi tie ni estas ĉe la kerna punkto de la demando. La loĝejproblemo estas solvebla nur tiam, kiam la socio estas sufiĉe transformita por entrepreni la forigon de la kontraŭeco de urbo kaj kamparo, kiun la nuna kapitalisma socio puŝis ĝis la ekstremo. La kapitalisma socio, kiu tute ne kapablas forigi tiun kontraŭecon, male devas ĉiutage pliakraĝi ĝin. Sed tion ĝuste ekkonis jam la unuaj modernaj utopiaj

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

socialistoj, Oveno kaj Furiero¹². En iliaj modelaj konstruaĵoj la kontraŭeco de urbo kaj kamparo jam ne ekzistas. Okazas do la malo de tio, kion s-ro Sax asertas: ne la solvo de la loĝejproblemo solvas samtempe la socialan demandon, sed nur per la solvo de la sociala demando, t.e. per la forigo de la kapitalisma produktadmaniero, samtempe ebligas la solvo de la loĝejproblemo. Voli solvi la loĝejproblemon kaj voli konservi la modernajn grandajn urbojn, estas kontraŭseno. Sed la modernaj grandaj urboj estas forigataj nur per la forigo de la kapitalisma produktadmaniero, kaj kiam oni komencas tiun forigon, tiam temos pri tute aliaj aferoj ol provizi ĉiun laboriston per propra domproprieto.

Sed unue ĉia sociala revolucio devos preni la aferojn tiaj kiaj ĝi trovas ilin, kaj forigi la plej kriaajn malbonaĵojn per la ekzistantaj rimedoj. Kaj tie ni jam vidis, ke eblas forigi la loĝejmizeron tuj per senproprietigo de parto de la luksaj loĝejoj apartenantaj al la posedaj klasoj kaj per enloĝigo en la cetera parto.

Kiam nun s-ro Sax en la sekvo revenas el la grandaj urboj kaj longe kaj larĝe babilas pri laboristaj kolonioj, kiuj konstruendas *apud* la urboj, kiam li priskribas la belecojn de tiaj kolonioj, kun iliaj komuna „akvotubo, gasprilumado, aera aŭ varmakva hejtado, lavejoj, sekigejoj, banĉambroj ktp” kun „infanetvartejo, lernejo, preĝsalonego (!), legoĉambro, biblioteko [...], vinejo kaj bierejo, dancejo kaj muzikejo tuthonore”, kun vaporforto kondukata en ĉiujn domojn kaj kiu povas „reloki la produktadon en certa amplekso el la fabrikoj en la hejman laborejon”, – tiam tio ŝanĝas neniom pri la afero. La kolonio, tia kia li priskribas ĝin, estas de s-ro Huber rekte pruntita el la socialistoj Oveno kaj Furiero kaj nur per demeto de ĉio socialisma komplete burĝigita. Sed per tio ĝi fariĝas des pli utopieca. Neniu kapitalisto havas intereson konstrui tiajn koloniojn, kiel ankaŭ nenie en la mondo

12 Roberto Oveno (orig. *Robert Owen* [róbet óúven] (1771 – 1858), angla utopia socialisto. Profesie fabrikisto. La praktikaj spertoj kolektitaj en liaj fabrikoj kondukis lin al la komunista teorio. Li rifuzis ĉian perforton. Por skizi sian planon de la estonteco, li uzis la realajn konojn akiritajn en sia industria praktiko. Kiam li engaĝiĝis por la komunismo, la oficiala socio disiĝis de li. -lak Furiero (orig. François Charles Fourier [frasúá ŝárl furjé] (1772 – 1837), franca utopia socialisto. „En Furiero ni renkontas akran kritikon, aŭtente francan, sed pro tio ne malpli tranĉan, de la ekzistantaj sociaj institucioj. Li senkompatate nudigas la materian kaj moralan mizeron de la burĝa mondo.” (Engelso) -lak

ekzistas iu tia, krom en *Guise* en Francio; kaj tiu estas konstruita de furier-isto, ne kiel profitiga spekuladobjekto, sed kiel socialisma eksperimento.¹³ Same bone s-ro Sax povintus – favore al sia burĝa projektado – citi la komunisman kolonion *Harmony Hall* – fondita komence de la 1840-aj jaroj de Oveno en Hampŝiro kaj de longa tempo pereinta.

Tamen ĉio ĉi babilado pri kolonioj estas nur lama provo ree flugi supren al la „regiono de la idealoj”, kiu ankaŭ estas tuj forlasita. Ni iras do denove rapide desupre. La plej simpla solvo estas nun tiu,

„ke la dungistoj, la fabrikmastroj, helpas al la laboristoj akiri konvenajn loĝejojn, ĉu per tio, ke tiuj konstruas ilin mem, ĉu per tio, ke ili instigas la laboristojn al propra konstruagado kaj subtenas ilin per tio ke ili disponigas al ili grundon, antaŭpagas la konstrukapitalon ktp.” (p. 106)

Per tio ni estas ree elirintaj el la grandaj urboj, kie pri ĉio ĉi jam ne povas temi, kaj revenintaj al la kamparo. S-ro Sax pruvas nun, ke ĉi tie estas en la intereso de la fabrikisto mem disponigi al siaj laboristoj elteneblajn loĝejojn, unuflanke kiel bonan kapitalinveston, aliflanke, ĉar la el tio senmanke

„rezultanta altiĝo de la laboristoj [...] devas sekvi kreskon de ilia korpa kaj mensa laborforto, kio kompreneble [...] ne malpli [...] utilas al la dungisto. Sed per tio estas ankaŭ donita la ĝusta vidpunkto por la partopreno de la dungisto en la loĝejdemando: Ĝi aperas kiel rezulto de la *latenta asociiĝo*, de la plej ofte sub la vesto de homamaj strebadoj kaŝita zorgo de la dungisto por la korpa kaj ekonomia, spirita kaj morala bono de liaj laboristoj, kiu per siaj sukcesoj, edukado kaj sekurado de kapabla, lerta, servema, kontenta kaj *sindona* laboristaro per si mem sin mone kompensas..” (p. 108)

La frazaĵo de „latenta asociiĝo”, per kiu Huber provis atribui al la burĝa-filantropa babilado „pli altan sencon”, ŝanĝas nenion pri la afero. Ankaŭ sen tiu frazo la grandaj kamparaj fabrikistoj, precipe en Anglio, delonge komprenis, ke la konstruo de laboristaj loĝejoj ne nur estas neceso, peco de la fabrika instalaĵo mem, sed ke ĝi ankaŭ tre bone profitigas. En Anglio tiel

13 Kaj ankaŭ tiu fariĝis fine nura loko de laborist-ekspluatado. Vd la parizan *Socialiste*, jaro 1886. [Noto de Engelso por la eldono de 1887.]

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

estiĝis tutaj vilaĝoj, el kiuj kelkaj poste evoluis al urboj. Sed la laboristoj, anstataŭ esti dankemaj al la homama kapitalisto, faris de ĉiam tre gravajn objektojn kontraŭ tiu „*cottage*-sistemo”. Ne nur, ke ili devas pagi monopolajn prezojn por la domoj, ĉar la fabrikisto ne havas konkurencon; ili estas ĉe ĉiu striko tuj senhejmaj, ĉar la fabrikisto senpere elpelas ilin kaj per tio malfaciligas ĉian rezistadon. Pli detale legeblas pri tio en mia „Situacio de la laboranta klaso en Anglio”, p. 224 kaj 228.¹⁴ Sed s-ro Sax opinias, ke io tia „ja apenaŭ meritas refuton”. (p. 111) Kaj ĉu li ne volas provizi la laboriston je la proprieto de lia domo? Jes ja, sed ĉar „la dungistoj devus esti kapablaj ĉiam disponi pri la loĝejo, por, kiam ili maldungas laboriston, havi spacon por la anstataŭanto”, tial – nu ja, tial oni devus por tiaj kazoj antaŭzorgi „per interkonsento pri revokeblo de la proprieto”! (p. 113)¹⁵

Ĉi-foje ni desupris surprize rapide. Unue ni aŭdis: Proprieto de la laboristo je sia dometo; poste ni ekscias, ke tio en la urboj maleblas kaj nur en la kamparo fareblas; nun oni deklaras al ni, ke tiu proprieto ankaŭ en la kamparo devas esti nur „per interkonsento revokebla”! Per tiu ĉi de s-ro Sax nove malkovrita speco de proprieto por la laboristoj, per tiu ilia transformo al „per interkonsento revokeblaj” kapitalistoj, ni feliĉe revenis al la plata tero kaj ĉi tie devas esplori tion, kion la kapitalistoj kaj ceteraj filantropoj *reale* faris por solvi la loĝejproblemon.

2

Se ni povas kredi nian s-ron Sax, tiam flanke de la s-roj kapitalistoj jam

14 Originale: „*Lage der arbeitenden Klasse in England*”. -vI

15 Ankaŭ en tio la anglaj kapitalistoj jam delonge ne nur plenumis ĉiujn kordezirojn de s-ro Sax, sed ege superis ilin. London, la 14-an de oktobro 1872, en *Morpeht* la tribunalo, por fiksi la listojn de la parlament-elektoj, devis decidi pri mocio, en kiu 2.000 minejlaboristoj petis enskribon de siaj nomoj en la liston. Montriĝis, ke la plej granda parto de tiuj homoj laŭ la regulado de la minejo, en kiu ili laboris, ne estis konsiderebla kiel luantoj de la domoj, kiujn ili priloĝis, sed nur kiel en tiuj domoj toleratoj kaj do sen ajna denonco elĵetebaj. (Minejposedanto kaj domproprieto estis kompreneble la sama persono.) La juĝisto decidis, ke tiuj homoj ne estas luantoj, sed servistoj kaj kiel tiaj ne rajtigataj enskribiĝi. (*Daily News*, 15-a de oktobro 1872).

nun io grava estas farita por forigi la loĝejmizeron kaj estas pruvite, ke la loĝejproblemo estas solvebla surbaze de la kapitalisma produktadmaniero.

S-ro Sax citas al ni antaŭ ĉio – la bonapartisman Francion! Louis Bonaparte, kiel konate, en la tempo de la pariza mondekspozicio nomumis komisionon, ŝajne por raporti pri la situacio de la laborantaj klasoj de Francio, efektive por, je la pli granda gloro de la imperio, priskribi tiun situacion kiel vere paradizan. Kaj s-ro Sax referencas la raporton de tiu komisiono konsistanta el la plej koruptitaj instrumentoj de la bonapartismo, speciale ankaŭ ĉar la rezultoj de ilia laboro „*laŭ la propra eldiro* de la pri tio taskita komitato por Francio estas sufiĉe kompletaj”! Kaj kiuj estas tiuj rezultoj? El 89 grandindustriistoj respektive akcisocietoj, kiuj donis informojn, 31 konstruis neniajn laboristajn loĝejojn; la konstruitaj loĝejoj gastigas laŭ la propra takso de s-ro Sax maksimume 50.000 ĝis 60.000 homojn, kaj la loĝejoj konsistas preskaŭ ekskluzive nur el du ĉambroj por ĉiu familio!

Estas memkomprenebla, ke ĉiu kapitalisto, kiun la kondiĉoj de lia industrio – akvoforto, situo de la karbminejoj, ferŝtonkuŝejoj kaj ceteraj minejoj ktp – firme ligas lin al certa kampara loko, devas konstrui loĝejojn por siaj laboristoj, se loĝejoj ne ekzistas. Vidi en tio pruvon de ekzisto de „latenta asociiĝo”, „vivan ateston por pliiĝo de la kompreno de la afero kaj de ĝia alta atingopovo”, „multpromesan komencon” (p. 115), por tio oni bezonas forte evoluintan kutimon mensogi ion al si mem. Cetere la industriistoj de la diversaj landoj ankaŭ en tio malsamas laŭ sia respektiva nacia karaktero. Ekz-e s-ro Sax rakontas al ni (p. 117):

„En *Anglio nur lastatempe* rimarkiĝas pli forta agado de la dungistoj en tiu direkto. Speciale estas la izolitaj vilaĝetoj en la kamparoj [...]. La cirkonstanco, ke la laboristoj alie devas iri longan vojon al la fabriko kaj, alvenante tie jam elĉerpitaj, faras nesufiĉan laboron, estas plejparte tiu, kiu donas al la dungistoj *la motivon por konstrui* novajn loĝejojn por siaj laborfortoj. Tamen pliiĝas ankaŭ la nombro de tiuj, kiuj, en pli profunda kompreno de la kondiĉoj, metas kun la loĝejreformo ankaŭ pli aŭ malpli ĉiujn ceterajn elementojn de la latenta asociiĝo, kaj al tiuj la florantaj kolonioj dankas sian estiĝon [...]. Pro tio, oni konas en la Unuiĝinta Reĝlando la nomojn de Ashton en *Hyde*, Ashworth en *Turton*, Grant en *Bury*, Greg en *Bollington*, Marshall en *Leeds*, Strutt en *Belper*, Salt en *Saltair*, Ackroyd en *Copley* ktp.”

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

Kia naiveco kaj eĉ pli granda nescio! „Nur lastatempe” la anglaj kamp-
araj fabrikistoj konstruis laboristajn loĝejojn! Ne, kara s-ro Sax, la anglaj
kapitalistoj estas veraj grandindustriuloj, ne nur laŭ la monujo, sed ankaŭ
laŭ la kapo. Longe antaŭ ol en Germanio oni posedis vere grandan industri-
on, ili jam komprenis, ke ĉe kampara fabrikado la elspezo por laboristaj
loĝejoj estas necesa, rekte kaj malrekte tre profitiga parto de la tuta invest-
kapitalo. Longe antaŭ ol la batalo inter Bismarko kaj la germanaj burĝoj
donacis al la germanaj laboristoj la koalici-liberecon [la rajton je sindikat-
oj], la anglaj fabrikistoj, minej- kaj uzin-posedantoj estis jam praktike
spertintaj, kian premon ili povas fari al strikantaj laboristoj, se ili estas
samtempe la ludonantoj de tiuj laboristoj. „La florantaj kolonioj” de iu
Greg, Ashton, de iu Ashwort apartenas tiom al la „plej lasta tempo”, ke la
burĝaro distrumpetis ilin jam antaŭ 40 jaroj kiel modelojn, kion mi mem
jam antaŭ 28 jaroj priskribis („Situacio de la laboranta klaso”, paĝoj 228-
230, noto). Preskaŭ same malnovaj estas tiuj de Marshall kaj Akroyd (tiel
skribiĝas lia nomo), kaj ankoraŭ pli malnova – ĝiaj komencoj okazis en la
lasta jarcento – estas tiu de Strutt. Kaj ĉar en Anglio la mezuma daŭro de
laborista loĝejo estas supozata je 40 jaroj, s-ro Sax povas mem ĉe siaj
fingroj kalkuli, en kia stato de pereco tiuj „florantaj kolonioj” nun troviĝas.
Krome la plejparto de tiuj kolonioj nun jam ne estas en la kamparo, la
giganta etendiĝo de la industrio ĉirkaŭis la plej multajn de ili tiom per
fabrikoj kaj domoj, ke ili troviĝas meze de malpuraj kaj fumplenaj urboj de
20.000 ĝis 30.000 kaj pliaj loĝantoj; kio ne malhelpas la germanan burĝan
sciencon, reprezentatan de s-ro Sax, ankoraŭ hodiaŭ gurdi la malnovajn
anglajn laŭdkantojn de 1840, kiuj jam tute ne aplikeblas.

Kaj nun eĉ la maljuna Akroyd! Tiu bravulo ja estis ĝisosta filantropo. Li
amis siajn laboristinojn tiom ke liaj malpli homamaj konkurencantoj en
Jorkŝiro kutimis diri pri li, ke li funkciigas sian fabrikon ekskluzive per siaj
propraj idoj! Tamen s-ro Sax asertas, ke en tiuj florantaj kolonioj „ekster-
edzecaj naskoj fariĝas ĉiam pli maloftaj” (paĝo 118). Jes ja, eksteredzecaj
naskoj *ekster la edzeco*; ĉar la belaj knabino en la anglaj fabrikdistriktoj
edziniĝas tre junaj.

En Anglio la konstruado de laboristaj loĝejoj rekte apud ĉiu granda
kampara fabriko, kaj samtempe *kun* la fabriko, estis jam la regulo de 60
jaroj kaj pli. Kiel jam menciite, multaj el tiaj fabrikvilaĝoj fariĝis la kerno,

ĉirkaŭ kiu alkonstruiĝis tuta fabrikurbo, kun ĉiuj malbonaĵoj, kiujn fabrikurbo alportas kun si. Tiuj kolonioj do ne solvis la loĝejproblemon, en siaj lokoj ili *kreis* ĝin.

Male en landoj, kiuj postlamis al Anglio sur la kampo de la granda industrio kaj kiuj envere nur de 1848 spertis kia estas granda industrio, en Francio kaj speciale en Germanio, la afero estas tute alia. Ĉi tie estas nur kolosaj uzinoj kaj fabrikoj, kiuj post longa hezitado decidis konstrui kelkajn laborist-loĝejojn – kiel la entrepreno de Schneider en *Creusot* kaj tiu de Krupp en Eseno. La granda plimulto de la kamparaj industriuloj igas siajn laboristojn piedi en varmego, neĝo kaj pluvo en distanco de mejloj matene al la fabriko kaj vespere hejmen. Tio estas la kazo speciale en montaroj en la francaj kaj alzacaj Vozejoj, kiel ĉe la *Wupper*, *Sieg*, *Agger*, *Lenne* kaj aliaj rejnlandaj-vestfaliaj riveroj. En la Ercmontaro la situacio estas certe ne pli bona. Temas pri la sama etmensa avareco ĉe germanoj kiel ĉe francoj.

S-ro Sax scias tre bone, ke la multpromesa komenco kiel la florantaj kolonioj signifas malpli ol nenion. Li provas do nun pruvi al la kapitalistoj, kiajn brilajn rentojn ili povas tiri el la konstruado de laboristaj loĝejoj. Per aliaj vortoj, li provas indiki al ili novan vojon por trompi la laboristojn.

Unue li montras al ili la ekzemplon de serio da londonaj konstrusocietoj, kiuj, parte filantropiaj, parte spekulaj, ricevis netan enspezon de 4 ĝis 6 elcentoj kaj pli. Ke kapitalo, investita en laboristaj loĝejoj, estas bone profitiga, tion s-ro Sax ne bezonas pruvi al ni. La kialo, pro kio ne pli da kapitalo estas en ili investata ol okazas, estas tiu, ke pli multekostaj loĝejoj profitigas al la proprietulo ankoraŭ pli bone. La admono de s-ro Sax al la kapitalistoj signifas fine do nuran moralpredikon.

Koncerne tiujn londonajn konstrusocietojn, kies brilajn sukcesojn s-ro Sax tiom laŭte distrumpetas, ili laŭ lia propra elnombrado – kaj en ĝi estas ĉia ajn konstruspekulaĵo entenata – entute produktis loĝejojn por 2.132 familioj kaj por 706 unuopaj viroj, do por malpli ol 15.000 personoj! Kaj tiajn infanaĵojn oni kuraĝas prezenti en Germanio kiel grandajn sukcesojn, dum nur en la orienta parto de Londono vivas miliono da laboristoj en la plej mizeraj statoj de loĝejoj? Ĉiuj ĉi filantropaj strebaĵoj estas fakte tiom kompatinde nulaj, ke en la anglaj parlamentaj raportoj, kiuj okupiĝas pri la situacio de la laboristoj, ili estas neniam eĉ nur menciataj.

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

Ni tute ne parolu ĉi tie pri la ridinda nescio pri Londono, kiu en tiu tuta sekcio etendiĝas. Nur la jenon. S-ro Sax opinias, ke la loĝdomo por unuopaj viroj en Soho malaperis, ĉar en tiu regiono oni „ne povis esperi multnombrian klientaron”. Ĉar s-ro Sax imagas la tutan *Westend* de Londono kiel unu solan luksan urbon kaj ne scias, ke tuj malantaŭ la plej elegantaj stratoj troviĝas la plej malpuraj laboristaj kvartaloj, el kiuj ekz-e Soho estas unu. La modela loĝdomo en Soho, pri kiu li parolas kaj kiun mi konis jam antaŭ 23 jaroj, komence estis multe uzata, sed ĝi pereis, ĉar neniu homo povis elteni resti en ĝi. Kaj tamen ĝi estis unu el la plej bonaj.

Sed la laborista urbo de Mulhaŭzo¹⁶ en Alzaco – ĉu tiu ja estas sukceso?

La laborista urbo en Mulhaŭzo estas la granda paradĉevalo de la kontinentaj burĝoj, ĝuste kiel la iam florintaj kolonioj de Ashton, Ashworth, Greg kaj ceteraj estis tiu de la anglaj. Bedaŭrinde ĝi ne estas produkto de la „latenta” asociiĝo, sed de la malkaŝa asocio inter la dua franca imperio kaj la alzacaj kapitalistoj. Ĝi estis unu el la socialismaj eksperimentoj de Louis Bonaparte, al kiu la ŝtato antaŭpagis trionon de la kapitalo. Ĝi konstruis en 14 jaroj (ĝis 1867) 800 dometojn en mankhava sistemo, malebla en Anglio, kie oni scipovas tion pli bone, kaj transdonas ilin al la laboristoj kontraŭ monata pago de alta luprezo post 13 ĝis 15 jaroj kiel proprieton. Tia akiro de proprieto, jam delonge enkondukita en la anglaj kooperativaj konstru-kompanioj, kiel ni vidos, ne bezonis esti inventita de la alzacaj bonapartistoj. La kromaĵoj al la luprezoj por la aĉeto de la domoj estas, kompare kun la angla, sufiĉe altaj; la laboristo, ekz-e post esti iom post iom en 15 jaroj paginta 4.500 frankojn, ricevas domon, kiu antaŭ 15 jaroj valoris 3.300 frankojn. Se la laboristo volas transloĝiĝi aŭ se li eĉ nur per unu monata pago postrestas (en tiu kazo li povas esti eligita el la domo), oni kalkulas al li $6\frac{2}{3}$ elcentojn de la origina domvaloro kiel jaran lupagon (ekz-e 17 frankojn monate ĉe 3.000 frankoj da domvaloro), kaj elpagas al li la reston, *sed sen ajna groŝo da interezoj*. Ke ĉe tio la societo, sen konsideri la „ŝtatan helpon”, povas grasiĝi, tio evidentas; same evidentas, ke la loĝejoj liverataj en tiuj kondiĉoj, jam pro tio ke ili troviĝas antaŭ la urbo, duone kampare, estas pli bonaj ol la malnovaj kazernaj loĝejoj en la urbo mem.

16 Germane: *Mülhausen* [mülhaŭzen] (france: *Mulhouse* [milúz]), industria urbo en la suda Alzaco. -vl

Ni diras eĉ ne vorton pri la kelkaj mizeraj eksperimentoj en Germanio, kies lamentinto eĉ s-ro Sax rekonas, en la paĝo 157.

Kion pruvas ĉiuj ĉi ekzemploj? Simple, ke la konstruado de laboristaj loĝejoj, eĉ se ne ĉiuj leĝoj de la sanprizorgo estas piedpremitaj, kapitalisme rentiĝas. Sed tio estis neniam kontestita, tion ni sciis jam delonge. Ĉia kapitalinvesto, kiu kontentigas bezonon, rentiĝas ĉe racia mastrumado. La demando estas ĝuste: kial malgraŭ tio la loĝejmizero daŭras, kial *malgraŭ tio* la kapitalistoj ne zorgas pri sufiĉe sanfavoraj loĝejoj por la laboristoj? Kaj tie s-ro Sax ja ne scias ion alian ol direkti admonojn al la kapitalo kaj ne respondas al ni. La realan respondon al tiu demando ni vidis jam supre.

La kapitalo, tio estas nun definitive konstatita, *ne volas* forigi la loĝejmizeron, eĉ se ĝi povus tion. Restas nur du aliaj rimedoj: la memhelpo de la laboristoj kaj la ŝtata helpo.

S-ro Sax, entuziasta adoranto de la memhelpo, scias raporti pri ĝi mirindaĵojn ankaŭ surkampe de la loĝejproblemo. Bedaŭrinde li devas tuj komence koncedi, ke ĝi povas atingi ion nur tie, kie la *cottage*-sistemo ekzistas aŭ almenaŭ praktikeblas, do ree nur en la kamparo; en la grandaj urboj, ankaŭ en Anglio, nur en tre limigita mezuro. Krome, suspiras s-ro Sax,

„la reformo povas okazi per la memhelpo nur sur ĉirkaŭvojo, kaj do nur tre malperfekte, nome nur en la mezuro, laŭ kiu al la principo de la propra posedo atribuiĝas forto, kiu retroefikas al la kvalito de la loĝejo.”

Ankaŭ tio estus pridubenda; ĉiukaze „la principo de propra posedo” tute ne retroefikis reforme sur la stilon de nia aŭtoro. Spite al ĉio ĉi la memhelpo faris en Anglio tiajn miraklojn,

„ke per ĝi, ĉio okazinta tie por solvi la loĝejproblemon en aliaj direktoj, estas *ege preterpasata*. Tiuj estas la anglaj *building societies* [konstrusocietoj]”, kiujn s-ro Sax pritraktas pli detale, precipe ĉar „pri ilia estado kaj agado ĝenerale tre malsufiĉaj aŭ eraraj ideoj estas disvastiĝintaj. La anglaj *building societies* tute ne estas [...] konstrusocietoj aŭ konstrukooperativoj, sed en la germana pli ĝuste [...] nomendaj proksimume: 'domakirasocioj'; ili estas asocioj kun la celo per periodaj kontribuadoj de la membroj kolekti fonduson, kaj el tiu, ĝuste laŭ la mezuro de la rimed-

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

oj, doni al la membroj pruntaĵojn por aĉeti domon [...] La *building society* estas do por unu parto de siaj membroj ŝparasocio, por la alia parto antaŭpaga kaso. – La *building societies* estas do hipotekaj kredit-institucioj, kalkulitaj por la bezonoj de la laboristo, kiuj precipe [...] direktas la ŝparaĵojn de la laboristoj [...] al la samsocietanoj de la kontribuantoj por aĉeto aŭ konstruado de domo. Kiel necesa premiso, tiuj pruntoj okazas kontraŭ hipotekado de la koncerna realaĵo kaj en tiu maniero, ke ilia repago okazas en mallongaj partopagoj, kiuj kunigas en si interezojn kaj amortizon [...]. La interezoj ne estas pagataj al la kontribuantoj, sed estas ĉiam kalkulataj je interezaj interezoj [...]. La repostulo de la kontribuantoj kune kun la alkreskintaj interezoj [...] povas per monata denonco okazi en ĉiu momento.” (paĝoj 170-172) „En Anglio ekzistas pli ol 2.000 da tiaj asocioj [...], la en ili akumulita kapitalo estas proksimume 15.000.000 sterlingaj pundoj, kaj proksimume 100.000 laboristaj familioj per tiu vojo jam akiris sian propran hejmon; sociala atingo, kun kiu certe ne baldaŭ kompareblas iu alia.” (paĝo 174)

Bedaŭrinde ankaŭ ĉi tie la „Sed” tuj postlamas:

„Perfekta solvo de la problemo tamen estas per tio ankoraŭ tute ne atingita. Jam pro tio, ke la domakiro estas atingebla nur por la pli prosperaj laboristoj [...]. Precipe la sanitaraj konsideroj ofte ne estas sufiĉe respektataj.” (paĝo 176)

Sur la kontinento „tiaj asocioj [...] trovas nur malgrandan terenon por sia disvolviĝo”. Ili premisas la *cottage*-sistemon, kiu ĉi tie ekzistas nur en la kamparo; sed en la kamparo la laboristoj ankoraŭ ne estas sufiĉe evoluintaj por memhelpo. Aliflanke en la urboj, kie la veraj konstrukooperativoj povus formiĝi, kontraŭstaras al ili „tre konsiderindaj kaj seriozaj malfacilaĵoj de tre diversa speco”. (paĝo 179) Ili povas konstrui simple nur *cottages*, kaj tio ne eblas en la grandaj urboj. Mallonge, „al tiu formo de kooperativa memhelpo, laŭ la hodiaŭaj kondiĉoj – kaj ankaŭ en baldaŭa estonteco – la ĉefa rolo en la solvo de tiu ĉi demando verŝajne ne povas atribuiĝi”. Ĉar tiuj konstrukooperativoj troviĝas ankoraŭ „en la stadio de la unuaj, nedisvolvitaj komencoj”. „Tio validas eĉ por Anglio” (paĝo 181).

Do: La kapitalistoj *ne volas* kaj la laboristoj *ne povas*. Kaj per tio ni

povus fini tiun ĉi sekcion, se ne nepre necesus doni kelkajn klarigojn pri la anglaj *building societies*, kiujn la burĝoj kiel Schulze-Delitzsch ĉiam montr- as kiel modelojn al niaj laboristoj.

Tiuj *building societies* ne estas laboristaj societoj, nek estas ilia ĉefa celo havigi al la laboristoj proprajn domojn. Male, ni vidos, ke tio okazas nur tre esceptokaze. La *building societies* estas esence spekulcaj, la malgrandaj, kiuj estas la originalaj, ne malpli ol iliaj grandaj imitantoj. En drinkejo, kutime laŭ instigo de la drinkejestro, ĉe kiu poste okazas la ĉiusemajnaj kunvenoj, kuniĝas certa nombro da regulaj gastoj kaj ties amikoj, butikistoj, komizoj, vojaĝkomizoj, etmajstroj kaj cetera etburĝaro – ie kaj tie ankaŭ maŝinkonstruisto aŭ alia laboristo apartenanta al la aristokrataro de sia klaso – al konstruoperativo; la plej ofta instigo estas kutime, ke la gastejestro akiris relative bonpreze haveblan parcelon en la najbareco aŭ ie alie. La plej multaj membroj ne estas per sia aktiveco ligitaj al ia difinita regiono; eĉ multaj butikistoj kaj metiistoj havas en la urbo nur oficejon, ne loĝejon; ĉiu, kiu iel povas, preferas loĝi ekstere ol meze de la fumplena urbo. Oni aĉetas la konstruejon kaj konstruas sur ĝi la eblan kvanton da *cottages*. La kredito de la pli bonstatuloj ebligas la aĉeton, la semajnaj kontribuaĵoj, apud kelkaj malgrandaj depruntoj, kovras la semajnajn elspezojn por la konstruado. Tiuj membroj, kiuj spekulas je propra domo, ricevas per lotumado la pretiĝantajn *cottages*, kaj la respektiva luprez-kromaĵo amortizas la aĉetprezon. La restantaj *cottages* estas luataj aŭ vendataj. Sed la konstruoperativo, se ĝi faras bonajn negocojn, amasigas pli aŭ malpli grandan monkvanton, kiu restas al la membroj, tiom longe kiom ili pagas siajn kotizojn, kaj estas distribuataj de tempo al tempo aŭ ĉe la malfondo de la societo. Jen la biografio de naŭ el dek anglaj konstrusocietoj. La ceteraj estas pli grandaj societoj, kutime starigitaj sub politikaj aŭ homamaj pretekstoj, kies ĉefa celo tamen estas fine ĉiam, havigi al la ŝparaĵoj de la etburĝaro pli altan hipotekan investon kun bonaj interezoj kaj kun espero de dividendo per spekulado pri grundpropieto.

Pri kiaj klientoj tiuj societoj spekulas, tion pruvu la prospekto de unu el la plej grandaj, se ne la plej granda el ili. La *Birkbeck Building Society, 29 and 30, Southampton Buildings, Chancery Lane*, Londono, kies enspezoj ekde sia ekzisto sumiĝas je pli ol 10,5 milionoj da sterlingaj pundoj (70 milionoj da taleroj), kiuj disponas pri pli ol 416.000 pundoj en la banko kaj

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

en ŝtatpaperoj kaj havas aktuale 21.441 membrojn kaj deponantojn, anoncas sin al la publiko jene:

„La plej multaj homoj estas familiaraj kun la tiel nomata trijara sistemo de la pianofabrikistoj, laŭ kiu ĉiu, kiu luas pianon por tri jaroj, post la fino de tiu tempo fariĝas ĝia proprietulo. Antaŭ la enkonduko de tiu sistemo, por homoj kun limigitaj enspezoj estis preskaŭ same malfacila akiri bonan pianon kiel propran domon; oni pagis jaron post jaro por la luado de la piano kaj elspezis duoble aŭ trioble da mono ol la piano valoris. Sed kio taŭgas por piano, tio taŭgas ankaŭ por domo. [...] Sed ĉar domo kostas pli ol piano [...], necesas pli longa tempo por pagi la aĉetprezon per lupago. Pro tio la direktoroj faris kun domproprietuloj en diversaj partoj de Londono kaj ties antaŭurboj interkonsentojn, per kiuj ili kapablas proponi al la membroj de la *Birkbeck Building Society* kaj al aliaj grandan elekton da domoj en la plej diversaj urbopartoj. La sistemo, laŭ kiu la direktoroj intencas procedi, estas: ludoni la domojn por 12 jaroj kaj duono, post kiu tempo, se la luprezo estas regule pagita, la domo fariĝas la absoluta proprietulo de la lupreninto, sen plua pago de ajna speco [...]. La luprenanto povas kontrakti ankaŭ por pli mallonga fintempo ĉe pli alta lupago, aŭ por pli longa limtempo ĉe pli malalta luprezo. [...] *Homoj kun limigita enspezo, komercaj kaj butikaj helpantoj* kaj aliaj povas tuj sendependiĝi el ĉia ajn ludona domposedanto, per tio ke ili fariĝas membroj de la *Birkbeck Building Society*.”

Tio parolas sufiĉe klare. Pri laboristo nenia vorto, sed ja pri homoj kun limigita enspezo, komercaj kaj butikaj helpantoj ktp; kaj krome oni premisas, ke la kontraktantoj ĝenerale jam posedas pianon. Efektive, ĉi tie tute ne temas pri laboristoj, sed pri etburĝoj kaj pri tiuj, kiuj volas *kaj povas* fariĝi tiaj; homoj, kies enspezo, eĉ se ene de certaj limoj, ĝenerale iom post iom kreskas, kiel tiu de la komercaj komizoj kaj de similaj profesioj, dum tiu de la laboristo en la plej bona okazo restas same alta, sed en la realo falas en proporcio de kresko de lia familio kaj de ties kreskantaj bezonoj. Efektive, nur malmultaj laboristoj povas esceptokaze partopreni en tiaj socioj. Unuflanke ilia enspezo estas tro malalta, aliflanke tro malsekura ol ke ili povus transpreni devigojn por 12 jaroj kaj duono. La malmultaj esceptoj, por kiuj tio ne validas, estas aŭ la plej bone pagataj laboristoj aŭ fabrikkon-

trolistoj.¹⁷

Cetere ĉiu vidas, ke la bonapartistoj de la laborista urbo Mulhaŭzo estas nenio alia ol mizeraj imitantoj de tiuj etburgaj anglaj konstrusocietoj. Kun la escepto ke ili, malgraŭ sia ŝtata helpo, multe pli trompas siajn klientojn ol la anglaj konstrusocietoj. Iliaj kondiĉoj estas entute malpli liberalaj ol la mezume en Anglio validaj, kaj dum en Anglio oni kalkulas por ĉiu engago interezon kaj interezinterezon kaj post unumonata denonco ankaŭ repagas tion, la mulhaŭzaj fabrikistoj enpoŝigas la interezon kaj la interezinterezon kaj repagas nur la sumon pagitan per kontantaj kvinfrankaj taleroj. Kaj neniu miros pri tiu diferenco pli ol s-ro Sax, kiu havas ĉion ĉi en sia libro, sen scii tion.

Do, ankaŭ la memhelpo de la laboristoj ne estas la solvo. Restas la ŝtata helpo. Kion s-ro Sax povas tiurilate proponi al ni? Tri aferojn:

„Unue, la ŝtato devas zorgi por elimini aŭ tiurilate plibonigi en sia leĝaro ĉion, kio iel havas sekvojn por la subteno de la loĝejmizero de la laborantaj klasoj.” (paĝo 187)

Do: Revizio de la konstruleĝaro kaj liberigo de la konstruindustrio, por

17 Jen eta kontribuajo pri la entreprena funkciado speciale de la londonaj konstruasocioj. Kiel konate, la grundo de la preskaŭ tuta Londono apartenas al proksimume dekduo da aristokratoj, inter ili la plej eminentaj dukoj de *Westminster*, de *Bedford*, de *Portland* ktp. Tiuj origine ludonis la unuopajn konstruejojn je 99 jaroj kaj post tio ekposedas la grundon kun ĉio, kio staras sur ĝi. Ili nun ludonas la domojn kun pli mallongaj tempolimoj, ekz-e je 39 jaroj, per tiel nomata *repairing lease*, laŭ kiu la luprenanto devas ripari al domon kaj teni ĝin en bona stato. Ekde kiam la kontrakto estas ĝis tie interkonsentita, la grundproprietulo sendas sian arĥitekton kaj la distriktan policiston pri konstruado (*surveyor*) por inspekti la domon kaj konstati la necesajn riparojn. Tiuj estas ofte tre ampleksaj, ĝis renovigo de la tuta fronta muro, de la tegmento ktp. La luprenanto nun deponas la lukontrakton kiel sekurecon ĉe konstruasocio kaj ricevas de tiu la necesan monon – ĝis 1.000 sterlingajn pundojn kaj pli ĉe jara luprezado de 130 ĝis 150 pundoj – kiel antaŭpagon por la konstruado fareda lia kosto. Tiuj konstruasocioj fariĝis do grava peranta parto en sistemo, kiu celas senpene kaj surkoste de la publiko ĉiam denove rekonstrui kaj teni loĝeblaj la londonajn domojn, kiuj apartenas al la grandaj grundaristokratoj. Kaj tio estus solvo de la loĝejproblemo por la laboristoj! [Noto de Engelso al la eldono de 1887]

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

ke oni konstruu pli malmultekoste. Sed en Anglio la konstruleĝaro estas limigita al minimumo, la konstruindustrio estas libera kiel la birdo en la aero, kaj tamen la loĝejmizero ekzistas. Ĉe tio oni konstruas en Anglio nun tiom malmultekoste, ke la domoj ŝanceliĝas kiam ĉaro preterpasas, kaj ke ĉiutage iuj disfalas. Ankoraŭ hieraŭ, la 25-an de oktobro 1872, en Manĉestro ses disfalis samtempe kaj grave vundis ses laboristojn. Do, ankaŭ tio ne helpas.

„Due, la ŝtatpotenco devas malebligi, ke la unuopulo en sia limigita individuismo disvastigu aŭ kaŭzu la malbonaĵon.”

Do: san- kaj konstru-polica inspektado de la laboristaj loĝejoj, permeso al la instancoj fermi sandanĝerajn kaj kadukajn loĝejojn, kiel tio okazis en Anglio ekde 1857. Sed kiel tio okazis tie? La unua leĝo de 1855 (*Nuisances Removal Act*) restis, kiel s-ro Sax mem koncedas, „morta litero”, same la dua de 1858 (*Local Governmet Act*) (paĝo 197). Sed s-ro Sax kredas, ke la tria, la *Artisans' Dwelling Act*, kiu validas nur por urboj kun pli ol 10.000 loĝantoj, „certe donas favoran ateston pri la alta kompreno de la brita parlamento koncerne socialajn aferojn” (paĝo 199), dum tiu aserto siavice „donas favoran ateston pri” la totala nekono de s-ro Sax pri anglaj „aferoj”. Ke Anglio „koncerne socialajn aferojn” entute multe antaŭas la kontinenton, estas memkomprenebla; ĝi estas la patrujo de la moderna granda industrio, en ĝi la kapitalisma produktadmaniero evoluis plej libere kaj plej antaŭen, ĝiaj konsekvencoj ĉi tie plej akre vidiĝas kaj pro tio ankaŭ unue sekvigas reason en la leĝdonado. La plej bona pruvo de tio estas la fabrikleĝaro. Sed se s-ro Sax kredas, ke parlamenta leĝo bezonas nur akiri leĝan validon por ankaŭ esti tuj enkondukita praktike, tiam li ege eraras. Kaj tio ĝustas pri neniu parlamenta leĝo pli (eble kun la escepto de la *Workshops' Act*) ol ĝuste pri la *Local Government Act*. La realigo de la leĝo estis transdonita al la urbaj instancoj, kiuj preskaŭ ĉie en Anglio estas rekonataj centroj de ĉia korupto, de famili-favorado kaj de *Jobbery*.¹⁸ La agantoj de tiuj urbaj in-

18 *Jobbery* nomiĝas la uzado de publika ofico por privataj avantaĝoj por la oficisto aŭ lia familio. Se ekz-e la ĉefo de la ŝtata telegrafejo de lando fariĝas pasiva [„silenta”] kompaniano de paperfabriko, liveras al tiu fabriko lignon el siaj arboj kaj poste igas ĝin liveradi paperon al la telegrafejoj, tiam tio estas ja sufiĉe malgranda, sed tamen bela *job*, konsidere ke ĝi atestas perfektan komprenon de la principoj de la *jobbery*;* kio cetere ĉe Bismarko estis memkomprenebla kaj

stancoj, kiuj dankas siajn postenojn al diversaj familiaj konsideroj, estas ne kapablaj aŭ ne emaj plenumi tiajn socialajn leĝojn, dum ĝuste en Anglio la ŝtataj oficistoj taskitaj pri preparo kaj plenumado de la socia leĝaro plejparte elstaras per severa plenumado de siaj devoj – kvankam nuntempe en malpli granda mezuro ol antaŭ dudek, tridek jaroj. En la urbaj konsilantaroj la proprietuloj de malsanigaj kaj kadukaj loĝejoj estas preskaŭ ĉie rekte aŭ malrekte forte reprezentataj. La elekto de la urbaj konsilantaroj laŭ malgrandaj distriktoj dependigas la elektitojn de la plej etanimaj lokaj interesoj kaj influoj; neniu urba konsilanto, kiu volas esti reelektita, rajtas kuraĝi voĉdoni por aplikado de tiu leĝo en sia elektodistrikto. Oni do komprenas, kun kia malemo tiu leĝo estis preskaŭ ĉie akceptita de la lokaj instancoj, kaj ke ĝi ĝis nun estis aplikita nur al la plej skandalaj kazoj – kaj eĉ tie plej ofte nur pro jam disvastiĝanta epidemio, kiel lastan jaron en Manĉestro kaj *Salford* okaze de la variola epidemio. La alvoko al la ministro pri internaj aferoj ĝis nun efikis nur en tiaj okazoj, kiel la principo de ĉiu liberala registaro en Anglio estas, proponi socialajn leĝojn nur devige kaj laŭeble tute ne plenumi la ekzistantajn. La koncerna leĝo, kiel kelkaj aliaj en Anglio, gravas nur en tio, ke en la manoj de registaro regata aŭ devigata de la laboristoj, kiu fine vere aplikas ĝin, ĝi estos potenca armilo por breĉi la nunan socialan staton.

„Trie”, laŭ s-ro Sax la ŝtatpotenco „en plej ampleksa mezuro apliku ĉiujn por ĝi disponeblajn pozitivajn disponojn por malestigi la ekzistantan loĝejmizeron.”

Tio signifas, ke ĝi konstruu kazernojn, „verajn modelajn konstruaĵojn” por siaj „subalternaj oficistoj kaj servistoj” (sed tiuj ja ne estas laboristoj!) kaj „doni kreditojn al komunumaj reprezentantoj, societoj kaj ankaŭ privatuloj cele al plibonigo de la loĝejoj por la laborantaj klasoj” (paĝo 203), same kiel tio okazas en Anglio laŭ la Public Works Loan Act kaj kiel Louis Bonaparte faris en Parizo kaj Mulhaŭzo. Sed la Public Works Loan Act konsistas ja ankaŭ nur sur la papero, la registaro disponigas al la komisiitoj nur maksimume 50.000 sterlingajn pundojn, do la rimedojn por konstrui maksimume 400 cottages, do en 40 jaroj 16.000 cottages aŭ loĝejoj

atendebla. -fen

* En la *Volksstaat* la frazo finiĝas tie. -mew

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

por maksimume 80.000 homoj – guto ĉe sitelo! Eĉ se ni supozas, ke post dudek jaroj la rimedoj de la komisiono per repago duobliĝas, do en la lastaj 20 jaroj konstruiĝas loĝejoj por kromaj 40.000 homoj, tiam tio daŭre restas nur guto ĉe sitelo. Kaj ĉar la *cottages* daŭras mezume nur 40 jarojn, do post 40 jaroj ĉiujare la disponeblaj 50.000 aŭ 100.000 pundoj estas aplikendaj por anstataŭigi la disfalintajn plej malnovajn *cottages*. Tion s-ro Sax, sur la paĝo 203, nomas: plenumi la principon praktike ĝuste kaj „ankaŭ en nelimigita mezuro”! Kaj kun tiu koncedo, ke la ŝtato, eĉ en Anglio, „en nelimigita mezuro” faris praktike nenion, s-ro Sax finas sian libron per lanĉado de nur denova moralprediko al ĉiuj koncernatoj.¹⁹

Ke la nuntempa ŝtato nek povas nek volas forigi la loĝejan plagon, tio estas tute evidenta. La ŝtato estas nenio alia ol la organizita ĉiompotenco de la posedaj klasoj, de la grundposedantoj kaj kapitalistoj fronte al la ekspluatataj klasoj, la terkulturistoj kaj laboristoj. Kion la unuopaj kapitalistoj (kaj tiuj estas ĉi tie sole koncernataj, ĉar en tiu ĉi afero ankaŭ la koncernata grundposedanto aperas unue en sia eco kiel kapitalisto) ne volas, tion ankaŭ la ŝtato ne volas. Se do la unuopaj kapitalistoj ja plendas pri la loĝejmizero, sed apenaŭ moveblas por supraĵe vuali ĝiajn plej terurajn konsekvencojn, tiam la ĉiomkapitalisto, la ŝtato, ankaŭ ne faros multe pli. Li maksimume zorgos pri tio, ke la kutimiĝinta grado de supraĵa vualado estu praktikata ĉie egalece. Kaj ni vidis, ke tio okazas.

Sed, eblas objeti, ke en Germanio la burĝoj ankoraŭ ne regas, ke en Germanio la ŝtato estas ankoraŭ certgrade super la socio ŝvebanta potenco, kiu ĝuste pro tio reprezentas la ĉiomajn interesojn de la socio kaj ne tiujn de unuopa klaso. Tia ŝtato ja povas fari diversajn aferojn, kiujn burĝa ŝtato ne

19 Lastatempe en la anglaj parlamentaj leĝoj, kiuj donas al la londonaj konstruinstancoj la rajton je senproprietigo por novkonstruado de stratoj, oni iom konsideras la tiel elpelitajn laboristojn. Oni enmetis la klaŭzon, ke la nove estigotaj konstruaĵoj devas taŭgi por akcepti la klasojn de la loĝantaro, kiuj ĝis tiam loĝis en tiu loko. Oni konstruas do grandajn kvin- ĝis ses-etaĝajn lukazernojn por laboristoj sur la plej malmultekostajn konstrulokojn kaj tiel plenumas la leĝon laŭlitere. Oni devas atendi, kiel tiu institucio montriĝos, kiu estas tute nekutima al la laboristoj kaj meze de la londonaj kondiĉoj tute fremda al ili. Sed en la plej bona okazo oni tie loĝigos apenaŭ kvaronon de la laboristoj efektive elpelitaj de la novkonstruado. (Noto de Engelso al la eldono de 1887)

povas; de tiu oni rajtas ankaŭ atendi sur sociala kampo tute aliajn aferojn.

Tiu estas la lingvo de la reakciuloj. Sed en la realo ankaŭ en Germanio la ŝtato, tia kia ĝi ekzistas, estas la necesa produkto de la socia bazo, el kiu ĝi elkreskis. En Prusujo – kaj Prusujo estas nun decida – ekzistas apud daŭre forta, grundposeda nobelaro, relative juna kaj nome tre malkuraĝa burĝaro, kiu ĝis nun elbatalis nek la rektan politikan regadon, kiel en Francio, nek la pli aŭ malpli malrektan, kiel en Anglio. Sed apud tiuj du klasoj estiĝas rapide kreskanta, intelekto tre evoluinta kaj ĉiutage pli kaj pli organiziĝanta proletaro. Ni trovas do ĉi tie apud la baza kondiĉo de la malnova absoluta monarĥio – la ekvilibro inter la grundnobelaro kaj la burĝaro – la bazan kondiĉon inter burĝaro kaj proletaro. Sed en la malnova absoluta same kiel en la moderna bonapartisma monarĥio la reala regpovo troviĝas en la manoj de aparta oficira kaj oficista kasto, kiu en Prusujo kompletigas sin parte el si mem, parte el la malgranda majorata²⁰ nobelaro, pli malofte el la granda nobelaro, kaj malplejparte el la burĝaro. La memstareco de tiu kasto, kiu ŝajnas stari ekster kaj iel super la socio, donas al la ŝtato la ŝajnon de memstareco fronte al la socio.

La ŝtatformo, kiu en Prusujo (kaj laŭ ĝi en la nova imperia konstitucio de Germanio) evoluis kun necesa konsekvenco el tiu kontraŭdiraj sociaj kondiĉoj, estas la ŝajnkonstituciismo; formo, kiu estas samtempe la hodiaŭa dissolvoformo de la malnova absoluta monarĥio kiel la ekzistofomo de la bonapartisma monarĥio. En Prusujo la ŝajnkonstituciismo de 1866 ĝis 1870 nur kovris kaj peris la malrapidan forputradon de la absoluta monarĥio. Sed de 1866 kaj speciale de 1870 la transformiĝo de la sociaj kondiĉoj kaj per tio la dissolviĝo de la malnova ŝtato okazas antaŭ ĉies okuloj kaj en gigante kreskanta skalo. La rapida evoluo de la industrio kaj speciale de la borsa trompado tiris ĉiujn regantajn klasojn en la vorticon de la spekulado. La grandskala korupto, 1870 importita el Francio, evoluas kun nekredbla rapido. Strousberg kaj Péreire tiras la ĉapelon reciproke. Ministroj, generaloj, princoj kaj grafoj agas per akcioj malgraŭ la plej ruzegaj borsaj judoj, kaj la ŝtato agnoskas ilian egalecon per tio ke ĝi amase baronigas la borsajn judojn. La kampara nobelaro, delonge industriaj kiel betsukeraj fabrikistoj kaj brandfaristoj, havas la malnovajn solidajn tempojn jam malantaŭ si kaj

20 Majorata nobelaro nomiĝas tiu reĝimo de nobelaro, ĉe kiu la nobeltitolo kune kun la bieno herediĝas nur al la plej aĝa filo. -vl

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

ŝveligas per siaj nomoj la listojn de direktoroj de ĉiuj solidaj kaj malsolidaj akcikompanioj. La burokrataro pli kaj pli malestimas la kasan difekton kiel solan rimedon por plibonigi la salajron; ĝi fajfas pri la ŝtato kaj ĉasas la multe pli enspezigajn postenojn en la mastrumado de industriaj entreprenoj; tiuj, kiuj ankoraŭ restas en la ofico, sekvas la ekzemplon de siaj superuloj kaj spekuladas per akcioj aŭ igas sin „partopreni” ĉe fervojoj ktp. Oni eĉ rajtas supozi, ke ankaŭ la leŭtenantoj havas sian maneton en diversaj spekuladoj. Mallonge, la disfalo de ĉiuj elementoj de la malnova ŝtato, la transiro de la absoluta monarĥio en la bonapartisman, estas plene okazanta, kaj kun la venonta granda komerca kaj industria krizo ne nur la nuna trompado, sed ankaŭ la malnova prusa ŝtato disfalos.”²¹

Kaj tiu ŝtato, kies neburĝaj elementoj ĉiutage pli burĝiĝas, devas solvi „la socian demandon” aŭ eĉ nur la loĝejproblemon? Male. En ĉiuj ekonomiaj demandoj la prusa ŝtato pli kaj pli subiĝas al la burĝaro; kaj se la leĝaro ekde 1866 en la ekonomia kampo ne estis ankoraŭ pli adaptita al la interesoj de la burĝaro ol tio okazis, je kies kulpo? Ĉefe je tiu de la burĝaro mem, kiu unue estas tro malkuraĝa por energie agi por siaj interesoj kaj kiu due kontraŭas ĉian koncedon, se tiu koncedo samtempe donas al la minacanta proleto novajn armilojn en la manon. Kaj kiam la ŝtatpotenco, t.e. Bismarĝo, provas organizi por si propran apartan proletaron, por bridi per ĝi la politikan agadon de la burĝaro, kio alia estas tio ol necesa kaj bone konata bonapartista rimedeto, kiu donas al la laboristoj nenion alian ol kelkajn favorajn dirojn kaj maksimume iomete da ŝtata helpo ĉe la konstrusocietoj laŭ la maniero de Louis Bonaparte?

La plej bona pruvo de tio, kion la laboristoj povas atendi de la prusa ŝtato, troviĝas en la uzado de la francaj miliardoj, kiuj donis al la memstareco de la prusa ŝtatmaŝino fronte al la socio novan mallongan lastan prokraston. Ĉu eĉ nur unu talero el tiuj miliardoj estis uzita por meti sub tegmenton la berlinajn laboristajn familiojn pelitajn sur la straton? Male. Kiam alvenis la aŭtuno, la ŝtato igis malkonstrui eĉ la kelkajn mizerajn

21 Tio, kio ankaŭ hodiaŭ, 1886, ankoraŭ kuntenas la prusan ŝtaton kaj ĝian bazon, la aliancon de grundegposedo kaj industria kapitalo, sigelitan per la protektaj doganaĵoj, estas nur la timo antaŭ la proletaro, kiu de 1872 gigante kreskis je nombro kaj je klaskonscio. [Noto de Engelso al la eldono de 1887]

barakojn kiuj dum la somero servis al ili kiel urĝa tegmento. La kvin miliardoj iras sufiĉe flue la vojon de ĉia karno, en fortikaĵojn, kanonojn kaj soldatojn; kaj malgraŭ Wagner von Dummerwitz, malgraŭ la konferencoj de Stieber kun Aŭstrio, oni ne atribuos el la miliardoj al la germanaj laboristoj tiom, kiom Louis Bonaparte atribuis al la francaj el la miliardoj, kiujn li ŝtelis de Francio.

3

En la realo la burĝaro havas nur unu metodon siamaniere solvi la loĝejproblemon – tio signifas, solvi ĝin tiel, ke la solvo ĉiam denove produktas la problemon. Tiu metodo nomiĝas: „Hausmann”.

Mi komprenas ĉi tie sub „Hausmann” ne nur la specife bonapartistan manieron de la pariza Hausmann, rompi rektajn kaj larĝajn stratojn meze tra la dense konstruitajn laboristajn kvartalojn kaj ambaŭflanke meti grandajn luksajn konstruaĵojn, ĉe kio oni intencis apud la strategian efikon malfaciligi la barikad-batalon ankaŭ la elformadon de specife bonapartista konstruproletaro dependa de la registaro kaj la transformadon de la urbo en urbon de pura lukso. Mi komprenas sub „Hausmann” la ĝeneraliĝintan praktikon meti breĉojn en la laboristajn distriktojn, speciale en la centre situantajn de niaj grandaj urboj, instigitajn ĉu pro konsideroj al la publika sano kaj la plibeligo aŭ pro la postulo je grandaj centre situantaj komercejoj aŭ pro trafikaj bezonoj, kiel konstruado de fervojoj, stratoj ktp. La rezulto estas ĉie la sama, kvankam la instigo povas esti malsama: la skandalaj stratetoj malaperas sub granda memglorado de la burĝaro pro tiu giganta sukceso, sed – ili tuj reestiĝas aliloke kaj ofte en la rekta najbareco.

En la „Situacio de la laboranta klaso en Anglio” mi donis priskribon de Manĉestro, kia ĝis aspektis en 1843 kaj 1844. De tiam, per fervojoj irantaj meze tra la urbo, per konstruo de novaj stratoj, per starigo de grandaj publikaj kaj privataj domoj, kelkaj el la plej malbonaj tie priskribitaj distriktoj estas trarompitaj, nudigitaj kaj plibonigitaj, aliaj tute forigitaj; kvankam ankoraŭ multaj – sendepende de la sanpolica kontrolado, kiu de tiam fariĝis pli strikta – troviĝas en la sama aŭ eĉ en pli malbona konstrua stato ol tiam. Sed kompanse, danke al la eksterordinara etendiĝo de la urbo, kies loĝantaro de tiam kreskis je pli ol la duono, distriktoj, kiuj tiam estis ankoraŭ

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejonproblemon

aerumitaj kaj puraj, estas nun same miskonstruitaj, same malpuraj kaj troloĝataj de homoj kiel tiam la plej fifamaj urbopartoj. Jen nur ekzemplo: En mia libro mi priskribis (sur la paĝo 80 kaj sekvaj) domaron situantan en la valprofundo de la rivero *Medlock* kaj kiu sub la nomo Irlandeto (*Little Ireland*) jam de jaroj estis la hontejo de Manĉestro. Irlandeto jam delonge malaperis; en ĝia loko leviĝas nun fervoja stacidomo, sur alta subkonstruaĵo; la burĝaro fanfarone montris la feliĉan, definitivitan forigon de Irlandeto kvazaŭ grandan triumfon. Nun okazis en la pasinta somero grandega inundo, kiel ĝenerale la endigitaj riveroj en niaj grandaj urboj pro facile kompreneblaj kaŭzoj estigas de jaro al jaro pli grandajn inundojn. Tiam montriĝas, ke Irlandeto tute ne estas forigita, sed nur delokita de la suda flanko de *Oxford Road* al la norda flanko kaj daŭre floras. Ni aŭdu la „*Manchester Weekly Times*” de la 20-a de julio 1872, la organon de la radikalaj burĝoj de Manĉestro:

„La malfeliĉo, kiu atakis la loĝantojn de la valmalsupro de la rivero *Medlock* lastan sabaton, espereble havos bonajn sekvojn: ke la publika atento estu direktota al la palpebla primokado de ĉiuj leĝoj de sanprizorgo, kiu estis nun jam tiom longe tie tolerata antaŭ la nazo de la urbaj oficistoj kaj de la urba sankomisiono. Akra artikolo en nia hieraŭa taga eldono senmaskigis, sed ankoraŭ tro malforte, la hontan staton de kelkaj el la kelaj loĝejoj ĉe la *Charles Street* kaj *Brook Street*, kiuj estis atingitaj de la inundo. Preciza esplorado de unu el la kortoj nomitaj en tiu artikolo kapabligas nin konfirmi ĉiujn tie faritajn indikojn kaj deklari, ke la kelloĝejoj en tiu korto delonge devintus esti fermitaj: pli ĝuste, oni devintus neniam toleri ilin kiel homajn loĝejojn. *Squire's Court* konsistas el sep aŭ ok loĝdomoj ĉe la angulo de *Charles Street* kaj *Brook Street*, super kiuj la paŝanto, eĉ ĉe la plej malalta loko de *Brook Street*, sub la fervoja arko, povas ĉiutage paŝi sen supozoj, ke homaj estaĵoj loĝas profunde sub li en kavernoj. La korto estas kaŝita al la publika rigardo, alirebla nur por tiuj, kiujn la mizero devigas trovi tegmenton en ĝia tombosimila izoliteco. Eĉ kiam la plej ofte stagnantaj akvoj de *Medlock*, enfermitaj inter vejroj, ne transpaŝas sian kutiman nivelon, la planko de tiuj loĝejoj povas esti nur kelkajn colojn super la nivelo de la rivero: ĉia forta pluvo kapablas peli alten naŭze putran akvon el la profundigaj truoj aŭ el defluigaj tuboj kaj venenigi la loĝejojn per la pestaj gasoj, kiujn ĉiu inunda akvo postlasas kiel memoraĵon. [...] *Squire's Court* situas anko-

raŭ pli profunde ol la la neloĝataj keloj de la domoj ĉe la *Brook Street* [...], dudek futojn pli malalte ol la strato, kaj la putra akvo, elpelita sabate el la profundigaj truoj, atingis ĝis la tegmentoj. Ni sciis tion kaj pro tio pensis trovi la korton neloĝata aŭ nur okupata de la oficistoj de la sankomisiono por lavi kaj desinfecti la fetorajn vandojn. Anstataŭ tio ni vidis viron okupatan en la kelloĝejo de frizisto [...] ŝoveli sur puŝĉaron amason da putra koto, kiu kuŝis en angulo. La frizisto, kies kelo estis jam sufiĉe balaita, sendis nin ankoraŭ pli profunden al serio da loĝejoj, pri kiuj li diris: se li sciis skribi, li skribus al la gazetaro kaj insistus pri ilia fermo. Tiel ni fine atingis *Squire's Court*, kie ni trovis beletan, sane aspektan irlandaninon, kiu estis plene okupata de la tolaĵo. Ŝi kaj ŝia edzo, privata noktgardisto, loĝis de 6 jaroj en la korto, ili havis multnombrian familion [...]. En la domo, kiun ili ĵus forlasis, la inundo atingis preskaŭ ĝis la tegmento, la fenestroj estis rompitaĵoj, la mebloj amaso de ruinaĵoj. La loĝantoj, diris li, povis teni la domon en eltenebla odora stato nur per tio ke ili ĉiujn du monatojn kalkis ĝin. [...] En la interna korto, kien nia raportisto nun penetris, li trovis tri domojn, kun la malantaŭa muro konstruita al tiu de la ĵus priskribita, el kiuj du estis loĝataj. La fetoro estis tie tiom naŭza, ke la plej sana homo post kelkaj minutoj devis sveni. [...] Tiu naŭza truo estis loĝata de familio el sep personoj, kiuj ĵaŭde vespere (la tagon de la unua inundo) ĉiuj dormis en la domo. Aŭ pli ĝuste, kiel la virino korektis sin, ne dormis, ĉar ŝi kaj ŝia edzo pro la fetoro dum la plej granda parto de la nokto vomadis. Sabate ili devis, paŝante tra la akvo ĝis la brusto, elporti siajn infanojn. Ŝi ankaŭ opiniis, ke la truo estas por porko tro malbona, sed pro la malmultekosta luprezo – 1 ŝilingo kaj duono (15 groŝoj) semajne – ŝi prenis ĝin, ĉar ŝia edzo pro malsano estis lastatempe ofte sen enspezo. La impresoj, kiun faras tiu korto kaj la loĝantoj en ĝi enpremitaj kvazaŭ en tro fruan tombon, estas tiu de ekstrema senhelpeco. Ni devas cetere diri, ke laŭ faritaj observoj *Squire's Court* estas nur kopio – eble troigita – de diversaj aliaj lokoj de tiu regiono, pri kies ekzisto nia sankomisiono ne povas respondecigi. Kaj se oni permesas ke tiuj lokoj estos daŭre prilokataj, tiam la komisiono prenas sur sin respondecon kaj la najbareco la danĝeron de kontaĝaj epidemioj, kies pezon ni ne volas detale esplori.”

Tio estas frapanta ekzemplo de la maniero, en kiu la burĝaro solvas la loĝejproblemon en la praktiko. La kovejoj de la epidemioj, la plej fiaj

Dua sekcio: Kiel la burĝaro solvas la loĝejproblemon

kavernoj kaj truoj, en kiujn la kapitalisma produktadmaniero enfermas niajn laboristojn nokton post nokto, ili ne estas forigataj, ili estas nur – *delokataj*²²! La sama ekonomia neceso, kiu produktis ilin ĉe la unua loko, produktas ilin ankaŭ ĉe la dua. Kaj tiom longe, kiom la kapitalisma produktadmaniero ekzistas, tiom longe estas stultaĵo voli unuope solvi la loĝejproblemon aŭ ian alian socian problemon, kiu koncernas la sorton de la laboristoj. La solvo troviĝas en la forigo de la kapitalisma produktadmaniero, en la alproprigo de ĉiuj viv- kaj labor-rimedo fare de la laborista klaso mem.

22 Vortludo en la germana: *verlegt* signifas samtempe delokita, translokita, prokrastita, barita, mislokita (ekz-e okulvitrojn, tiel ke oni ne povas ilin retrovi), sed ankaŭ eldonita (ekz-e pri libroj). -vl

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

1

En la n-ro 86 de la „*Völkstaat*” A. Mülberger konatigas sin kiel la aŭtoro de la artikoloj, kiujn mi kritikis en n-roj 51 kaj sekvaj de la gazeto. Li superŝutas min en sia respondo per tia serio da riproĉoj kaj ĉe tio tiom tordas ĉiujn vidpunktojn pri kiuj temas, ke mi vole aŭ nevole devas respondi al tio. Mi volas provi doni al mia respondo, kiu bedaŭrinde devas moviĝi plejparte sur la tereno de persona polemiko, kiun Mülberger trudis al mi, ĝeneralan intereson per tio, ke mi disvolvas la ĉefajn punktojn ree kaj laŭeble pli klare ol antaŭe, eĉ riskante ke Mülberger ree instruas al mi, ke ĉio ĉi entenas „essence nenion novan, nek por li nek por la ceteraj legantoj de la '*Völkstaat*'”.

Mülberger plendas pri formo kaj enhavo de mia kritiko. Koncerne la formon, sufiĉas respondi, ke mi en tiu tempo tute ne sciis, de kiu la koncernaj artikoloj estis verkitaj. Do, pri persona „antaŭjuĝo” kontraŭ la aŭtoro ne eblas paroli: kontraŭ la solvo de la loĝejproblemo disvolvita en la artikoloj mi estis ja „antaŭjuĝa” en la mezuro, en kiu mi delonge konis ilin el Prudono kaj mia opinio pri tio estis jam firma.

Pri la „tono” de mia kritiko mi ne volas disputi kun amiko Mülberger. Se oni estis tiom longe en la movado kiel mi, oni ricevas sufiĉe malmolan haŭton kontraŭ atakoj kaj pro tio pensas, ke ankaŭ aliaj havas ĝin. Por kompensi Mülberger-on, mi volas ĉi-foje provi meti mian „tonon” en ĝustan proporcion kun la delikateco de lia epidermo (supra haŭto).

Mülberger plendas aparte amare pri tio, ke mi nomis lin prudsonisto, kaj li asertas, ke li ne estas tia. Mi devas kompreneble kredi lin, sed mi pruvos, ke la koncernaj artikoloj – kaj nur pri tio mi devis okupiĝi – enhavas nenion alian ol puran prudsonismon.

Sed ankaŭ Prudonon mi kritikis, laŭ Mülberger, „facilanime” kaj faras al li gravan maljustaĵon:

„La instruo pri la etburĝo Prudono ĉe ni en Germanio fariĝis dogmo, kiun eĉ multaj proklamas, sen esti legintaj de li eĉ nur linion.”

Kiam mi bedaŭras, ke la latinide parolantaj laboristoj de dudek jaroj ne havis alian spiritan nutraĵon ol la verkojn de Prudono, tiam Mülberger

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

respondas, ke ĉe la latinidaj laboristoj „la principoj, tiaj kiaj Prudono formulis ilin, estas preskaŭ ĉie la movanta animo de la movado”. Tion mi devas nei. Unue, la „movanta animo” de la laborista movado troviĝas nenie en la „principoj”, sed ĉie en la evoluo de la granda industrio kaj ties efikoj, la akumulado kaj koncentrado de la kapitalo ĉe unu flanko kaj de la proletaro ĉe la alia flanko. Due ne ĝustas, ke la prudentaj tiel nomataj „principoj” ludas ĉe la latinidlingvanoj la decidan rolon, kiun Mülberger atribuas al ili; ke la „principoj de la anarĥio, de la organizado de la ekonomiaj fortoj, de la socia likvidado ktp tie fariĝis la veraj portantoj de la revolucia movado”. Por tute ne paroli pri Hispanio kaj Italio, kie la la prudentismaj ĉion kuracaj rimedoj akiris ian influon nur en la formo plu fuŝita de Bakunin, por ĉiu, kiu konas la internacian laboristan movadon, estas konata fakto, ke en Francio la prudentistoj estas sekto kun malmultaj membroj, dum la amaso de laboristoj volas nenion scii pri la sociaj reformplanoj skizitaj de Prudono sub la titolo „Socia likvidado kaj organizado de la ekonomiaj fortoj”²³. Tio montriĝis interalie en la Pariza Komunumo. Kvankam la prudentistoj estis forte reprezentitaj en ĝi, oni tamen faris eĉ ne la plej etan provon likvidi la malnovan socion laŭ la proponoj de Prudono aŭ organizi la ekonomiajn fortojn. Male. La Komunumo havas la plej altan honoron, ke ĉe ĉiuj ĝiaj ekonomiaj disponoj ne iaj principoj konsistigis ĝian „movantan animon”, sed – la simpla praktika bezono. Kaj pro tio tiuj disponoj – la forigo de la noktlaboro de la bakistoj, la malpermeso de monpunoj en fabrikoj, la konfiskado de haltigitaj fabrikoj kaj laborejoj kaj ilia transdono al laboristaj asocioj – estis tute ne laŭ la spirito de Prudono, sed ja laŭ tiu de la germana scienca socialismo. La sola socia dispono, kiun la prudentistoj trudis, estis – ne konfiski la Bankon de Francio, kaj parte pro tio la Komunumo pereis. Same la tiel nomataj blankiistoj, ekde kiam ili provis transformiĝi el nur politikaj revoluciuloj en socialisman laboristan frakcion kun certa programo – kiel tio okazis en Londono fare de la blankiistaj rifuĝintoj en ilia manifesto „*Internationale et Révolution*” – proklamis ne la „principojn” de la prudenta plano savi la socion, sed jes ja, kaj preskaŭ laŭlitere, la opiniojn de la germana scienca socialismo pri la neceso de politika agado de la proletaro kaj de ĝia diktatoreco kiel transiro al forigo de la klasoj kaj, kun ili, de la ŝtato – kiel

23 Originale: "*Liquidation sociale kaj Organisation des forces économiques*". -v1

tiuj estis eldiritaj jam en la „Komunista manifesto”²⁴ kaj de tiam sennombrajn fojojn. Kaj se Mülberger el la malestimo de Prudono ĉe la germanoj eĉ deduktas mankon de kompreno de la latinida movado „ĝis la Komunumo de Parizo”, tiam li nomu kiel pruvon de tiu manko tiun latinidan skribaĵon, kiu eĉ nur proksimume ĝuste komprenis kaj prezentis la Komunumon kiel la „Mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro de la Internacio pri la interna milito en Francio”²⁵, verkita de la germano Markso.

La sola lando, en kiu la laborista movado staras rekte sub la influo de la prudonaj „principoj”, estas Belgio, kaj la belga movado ĝuste pro tio, kiel Hegelo diras, venas „de nenio tra nenio al nenio”.

Se mi opinias malfeliĉo, ke la latinidaj laboristoj, rekte aŭ malrekte, de dudek jaroj spirite nutris sin nur el Prudono, tiam mi opinias tion ne en la tute mita regado de la prudona reformrecepto – kiun Mülberger nomas la „principoj” –, sed en tio, ke ilia ekonomia kritiko de la ekzistanta socio estis infektita de la tute malĝustaj prudonaj turnoj kaj ilia politika agado fuŝita de la prudona influo. Ĉu post tio la „prudonigitaj latinidaj laboristoj” aŭ la germanaj, kiuj ĉi-kaze senfine pli bone komprenas la sciencan germanan socialismon ol la latinidlingvanoj komprenas sian Prudonon, „staras pli en la revolucio”, ni povos respondi nur kiam ni scios, kio signifas tio: „stari en la revolucio”. Oni aŭdis paroli pri homoj, kiuj „staras en la kristanismo, en la vera kredo, en la favoro de Dio” ktp. Sed ĉu „stari” en la revolucio, en la plej perforta movado? Ĉu „la revolucio” estas dogma religio, je kiu oni devas kredi?

Krome, Mülberger riproĉas al mi, ke mi, kontraŭ la klare esprimitaj vortoj de lia laboraĵo, asertas, ke li deklaras la loĝejproblemon ekskluzive laborista problemo.

24 Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908) (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo (librofina librolisto n-ro 52);

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio, kun antaŭparolo de Eric Hobsbawm, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano (librofina librolisto n-ro 100). -vl

25 Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871) (La Pariza Komunumo), kun enkonduko de Frederiko Engelso, Mondial, Novjorko, 2006, 137 paĝoj, ISBN 1-59569-025-5, paĝoj 47-100. -vl

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

Ĉi-foje Mülberger efektive pravas. Mi pretervidis la koncernan tekston. Pretervidis senrespondece, ĉar ĝi estas unu el la plej karakterizaj por la tuta tendenco de lia traktado. Mülberger diras efektive per sekaj vortoj:

„Ĉar oni faras al ni tiel ofte kaj multe la ridindan riproĉon, ke ni faras klasan politikon, ke ni strebas al klasa regado ktp, tial ni emfazas unue kaj klare, ke la loĝejproblemo tute ne ekskluzive koncernas la proletaron, sed male – ĝi interesas *en plej elstara maniero la veran meztavolon*, la etmetion, la etburĝaron, la tutan burokrataron [...] la loĝejproblemo estas ĝuste tiu punkto de la socialaj reformoj, kiu pli ol ĉiuj aliaj ŝajnas taŭga por malkovri la *absolutan internan identecon de la interesoj de la proletaro* unuflanke kaj tiun de la *veraj mezaj klasoj* de la socio aliflanke. La mezaj klasoj suferas same forte, *eble ankoraŭ pli forte* sub la prema kateno de la luloĝejo ol la proletaro [...]. La veraj mezaj klasoj de la socio staras hodiaŭ antaŭ la demando, ĉu ili [...] trovos la forton [...], lige kun la junecforta kaj energi plena laborista partio, interveni en la transformprocezon de la socio, *kies benaĵoj utilos ĝuste al ili antaŭ ĉiuj.*”

Amiko Mülberger konstatas do la jenon:

1. „Ni” ne faras „klasan politikon” kaj strebas al nenia „klasa regado”. La germana Socialdemokrata Laborista Partio, ĝuste ĉar ĝi estas *laborista partio*, tamen ja necese faras „klasan politikon”, la politikon de la laborista klaso. Ĉar ĉiu politika partio celas konkeri la regadon en la ŝtato, la germana Socialdemokrata Laborista Partio necese alstrebas *sian* regadon, la regadon de la laborista klaso, do, „klasan regadon”. Cetere ĉiu vere proleta partio, ekde la anglaj ĉartistoj, ĉiam prezentis la klasan politikon, la organizadon de la proletaro kiel memstara politika partio, kiel unuan kondiĉon, kaj la diktatorecon de la proletaro kiel plej proksiman celon de la batalo. Per tio, ke Mülberger deklaras tion „ridinda”, li poziciigis ekster la proletara movado kaj ene de la etburĝa socialismo.

2. La loĝejproblemo havas la avantaĝon, ke ĝi ne estas ekskluzive laborista demando, sed „interesas la etburĝaron en tute elstara maniero”, ĉar la „veraj mezaj klasoj suferas same forte, eble ankoraŭ pli forte” sub ĝi ol la proletaro. Se iu klarigas, ke la etburĝaro suferas, eĉ nur en unu sola rilato, „eble ankoraŭ pli forte ol la proletaro”, li certe ne povos plendi, se oni

alkalkulas lin inter la etburĝaj socialistoj. Ĉu Mülberger havas kialon por malkontento, se mi diras:

„Estas precipe tiuj suferoj de la laborista klaso komunaj kun tiuj de aliaj klasoj, speciale de la etburĝaro, pri kiuj la etburĝa socialismo, al kiu ankaŭ Prudono apartenas, kun prefero okupiĝas. Kaj tute ne estas hazardo, ke nia germana prudonisto okupiĝas antaŭ ĉio pri la loĝejproblemo, kiu, kiel ni vidis, tute ne estas ekskluzive laborista problemoj.”

3. Inter la interesoj de la „veraj mezaj klasoj de la socio” kaj tiuj de la proletaro ekzistas „absoluta interna identeco”, kaj estas ne la proletaro, sed tiuj veraj mezaj klasoj, al kiuj la „benaĵoj” de la estonta transformprocezo de la socio „utilos ĝuste kaj antaŭ ĉiuj”.

Do, la laboristoj faros la estontan socian revolucion „ĝuste antaŭ ĉiuj” en la intereso de la etburĝoj. Kaj krome ekzistas absoluta interna identeco de la interesoj de la etburĝoj kun tiuj de la proletaro. Se la interesoj de la etburĝoj estas interne identaj kun tiuj de la laboristoj, tiam tiuj de la laboristoj kun tiuj de la etburĝoj. La etburĝa starpunkto estas do en la movado same prava kiel la proleta. Kaj la aserto de tiu egalrajteco estas ĝuste tio, kion oni nomas etburĝa socialismo.

Pro tio estas ankaŭ tute konsekvenca, kiam Mülberger, en la paĝo 25 de la aparta presaĵo celebras la „etindustriion” kiel la „veran ĉefpilieron de la socio”, „ĉar laŭ sia vera eco unuigas en si la tri faktorojn: laboro – akiro – posedo, ĉar en la kuniĝo de tiuj tri faktoroj metas nenian limon al la evolukapablo de la individuo”; kaj kiam li riproĉas al la moderna industrio precipe ke ĝi neniigas tiun bredejon de normalaj homoj kaj faris „el vivkapabla, ĉiam denove reproduktiĝanta klaso senkonscian *amazon* da homoj, kiu ne scias kien direkti sian angorplenan rigardon”. La etburĝo estas do por Mülberger la modela homo kaj la etindustrio la modela produktadmaniero de Mülberger. Do, ĉu mi kalumniis lin, alkalkulante lin inter la etburĝaj socialistoj?

Ĉar Mülberger rifuzas ĉian respondecon pri Prudono, estus superflue ĉi tie plu diskuti la demandon, kiel la reformplanoj de Prudono celas transformi ĉiujn membrojn de la socio en etburĝojn kaj etbienulojn. Same ne necesos okupiĝi pri la supozita identeco de la interesoj de la etburĝoj kun tiuj de la laboristoj. La necesa [respondo] troviĝas jam en la „Komunista

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

Manifesto” (lepsika eldono de 1872, p. 12 kaj 21).²⁶

La rezulto de nia esplorado estas do tiu, ke apud la „miton de la etburĝo Prudono” paŝas la realo de la etburĝo Mülberger.

2

Ni venas nun al ĉefpunkto. Mi riproĉis al la mülberg-aj artikoloj, ke ili, laŭ la prudona maniero, falsas ekonomiajn kondiĉojn per traduko en juran esprimmanieron. Kiel ekzemplon de tio mi elprenis la sekvan frazon de Mülberger:

„La jam konstruita domo servas kiel eterna jurtitolo pri certa ono de la socia laboro, kvankam la reala valoro de la domo estis jam pli ol sufiĉe pagita en la formo de lupago al la posedanto. Tiel okazas, ke domo konstruita ekz-e antaŭ kvindek jaroj dum tiu tempo en la enspezo de ĝia lupago kovris du-, tri-, kvin-, dek-oble ktp la originan kostprezon.”

Mülberger nun plendas:

„*Tiu simpla, sopra konstato de fakto* instigas Engelson regali min per la kritiko, ke mi devintus klarigi, *kiel* la domo fariĝas 'jura titolo' – afero kiu estis tute ekster la sfero de mia tasko [...]. Io estas *priskribo*, io alia *klarigo*. Se mi diras laŭ Prudono, ke la ekonomia vivo de socio estu

26 „De ĉiuj klasoj starantaj hodiaŭ vidalvide al la burĝaro, nur la proletaro estas vere revolucia klaso. La aliaj klasoj degeneras kaj malaperas kun la grandindustrio, kies plej esenca produkto estas la proletaro.

La mezaj klasoj, la etindustriisto, la etkomercisto, la metiisto, la kamparano – ili ĉiuj batalas kontraŭ la burĝaro, por savi sian ekziston kiel mezaj klasoj antaŭ la pereco. Sekve ili ne estas revoluciaj sed konservativaj. Eĉ pli, ili estas reakciaj, ili klopodas retroturni la radon de la historio. Se ili estas revoluciaj, tiam nur rilate la por ili antaŭstarantan transiron al la proletaro. Pro tio ili defendas ne siajn aktualajn sed siajn estontajn interesojn, tiel forlasante sian propran starpunkton por transiri al tiu de la proletaro.” (Karlo Markso kaj Frederiko Engelson: Manifesto de la Komunista Partio (librofina librolisto n-ro 52), p. 55. -v1

trapenetrata de *jura ideo*, tiam mi per tio *priskribas* la hodiaŭan socion kiel tian, en kiu mankas ja ne ĉia *jura ideo*, sed la *jura ideo de la revolucio*, fakto, kiun Engelso mem koncedos.”

Ni restu unue ĉe la jam konstruita domo. La domo, se luita, alportas al sia konstruinto grundrenton, riparkostojn kaj interezon por lia investita konstrukapitalo inkluzive de la per tio farita profito en la formo de lupago, kaj laŭ la kondiĉoj la iom post iom pagata lusumo povas esti la du-, tri-, kvin-, dek-oblo de la origina kostprezo. Tio, amiko Mülberger, estas la „simpla, sobra konstato” de la „fakto”, kiu estas ekonomia; kaj se ni volas scii, kiel „okazas tiel”, ke ĝi ekzistas, tiam ni devas fari la esploradon sur ekonomia kampo. Ni do rigardu la fakton iom pli proksime, por ke neniu infano povu plu miskompreni ĝin. La vendo de varo konsistas, kiel konate, en tio, ke la posedanto fordonas ĝian uzvaloron kaj enpoŝigas ĝian interŝanĝvaloron. La uzvaloroj de la varoj distingiĝas interalie ankaŭ en tio, ke ilia konsumado bezonas diversajn tempospacojn. Bulo da pano konsumiĝas en unu tago, pantalono foruziĝas en jaro, domo eble en cent jaroj. Ĉe varoj de longa daŭro de foruziĝo do aperas la ebleco vendi la uzvaloron popece, ĉiufoje por difinita tempo, t.e. ludoni ĝin. La popeca vendo do realigas la interŝanĝvaloron nur iom post iom; por tiu rezigno pri tuja repago de la antaŭpagita kapitalo kaj de la per tio akirita profito la vendanto estas kompensata per prezkromaĵo, interezo, kies alteco estas determinata de la leĝoj de la politika ekonomio, kaj tute ne arbitre. Fine de la cent jaroj la domo estas konsumita, foruzita, fariĝis neloĝebla. Se ni tiam dekalkulas de la pagita lusumo: 1-e la grundrenton apud la eventuala altiĝo, kiun ĝi ricevis dum tiu tempo, kaj 2-e la elspezitajn kurantajn riparkostojn, tiam ni trovos, ke la resto mezume konsistas 1-e el la originala konstrukapitalo de la domo, 2-e el la profito el tiu, kaj 3-e el la interezoj de la kapitalo kaj profito, kiuj iom post iom atingis sian limdaton. Fine de tiu tempospaco la luprenanto ne havas domon, sed la domposedanto ankaŭ ne. Tiu havas nur la parcelon (se ĝi apartenas al li) kaj la sur ĝi troviĝantajn konstrumaterialojn, kiuj tamen ne plu estas domo. Kaj se la domo intertempe „kovris kvin- aŭ dek-oble la originan kostprezon”, tiam ni vidos, ke tio ŝuldiĝas nur al kromaĵo de la grundrento; tio estas sekreto por neniu en lokoj kiel Londono, kie grundposedantoj kaj domposedantoj estas plej ofte du diversaj personoj. Tiaj kolosaj kromaĵoj al la luprezoj okazas en rapide kreskantaj urboj, sed ne en kampkultura vilaĝo, kie la grundrento por konstruejoj restas preskaŭ sen-

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

ŝanĝa. Estas ja konata fakto, ke, sen konsideri la altiĝojn de la grundrento, la luprezado de la domo alportas al la domposedanto mezume ne pli ol 7 elcentojn de la investita kapitalo (inkluzive de la profito) jare, el kiuj la riparkostoj ktp estas ankoraŭ pagendaj. Mallonge, la lukontrakto estas tute ordinara varnegoco, kiu havas por la laboristo teorie ne pli kaj ne malpli da intereso ol ĉiu alia varnegoco, escepte de tiu, en kiu temas pri aĉeto kaj vendo de laborforto, kvankam ĝi alpaŝas lin praktike kiel unu el la mil formoj de burĝa trompado, pri kiuj mi parolas en la paĝo 4 de la aparta presaĵo²⁷, sed kiuj ankaŭ, kiel mi tie pruvis, estas submetitaj al ekonomia regulado.

Mülberger, male, vidas en la lukontrakto nenion ol puran „arbitrecon” (p. 19 de la aparta presaĵo), kaj se mi pruvas al li la malon, tiam li plendas, ke mi diras al li „plene da aferoj”, kiujn li bedaŭrinde jam sciis mem”.

Sed per ĉiuj ekonomiaj esploradoj pri la doma luprezado ni ne povas eviti transformi la forigon de la luloĝejo en „unu el la plej fruktodonaj kaj plej grandiozaj strebadoj, kiu devenas el la sino de la revolucia ideo”. Por sukcesi tion, ni devas traduki tiun simplan fakton el la sobra ekonomio en la jam multe pli ideologian juran lingvon. „La domo servas kiel eterna jurtitolo” pri domluado – „tiel okazas”, ke la valoro de la domo pageblas en formo de luprezado du-, tri-, kvin-, dek-oble. Por ekscii, kiel tio „okazas”, la „jurtitolo” helpas nin eĉ ne colon antaŭen; kaj pro tio mi diras, ke Mülberger nur per esplorado de tio, kiel la domo fariĝas jurtitolo povintus ekscii, kiel tio „okazas”. Tion ni ekscias nur, se ni, kiel mi faris, esploras la *ekonomian* naturon de la doma luprezado, anstataŭ koleri pri la jura esprimo, per kiu la reganta klaso ĝin sankcias. – Kiu proponas ekonomiajn paŝojn por forigi la doman luprezon, tiu estas ja certe devigata scii iomete pli pri la doma luprezado, ol ke ĝi estas „la tributo, kiun la luprenanto pagas al la eterna rajto de la kapitalo”. Al tio respondas Mülberger: „Io estas priskribo, io alia, klarigo.”

Ni do transformis la domon, kvankam ĝi tute ne estas eterna, en eternan jurtitolon pri doma luprezado. Ni trovas, ne gravas kiel tio „okazas”, ke pro tiu jurtitolo la domo enspezigas sian valoron en la formo de luprezado pluroble. Danke al la traduko en la juran lingvon, ni feliĉe tiom malproksimiĝis de la ekonomio, ke ni jam vidas nur la aperformon, ke domo en malneta luprezado

27 Temas pri la paĝoj 7 kaj 8 de tiu ĉi libro. -vl

povas iom post iom pluroble redoni la elspezojn. Ĉar ni pensas kaj parolas jure, ni metas al tiu fenomeno la mezurilon de la juro, de la justeco, kaj trovas, ke ĝi estas *maljusta*, ke ĝi ne kongruas kun la „jura ideo de la revolucio”, kio ajn tio povas esti, kaj ke la jurtitolo pro tio ne taŭgas. Ni trovas krome, ke la samo validas pri la interezporta kapitalo kaj pri la farme kulturata kampo, kaj nun havas la pretekston distingi tiujn klasojn de kapitalo disde la ceteraj kaj submeti ilin al escepta traktado. Tiu konsistas en la postulo: 1-e forpreni al la proprietulo la rajton je denonco, la rajton repostulian proprieton; 2-e allasi senpage al la luprenanto, pruntanto aŭ farmisto la fruktodonan uzadon de la objekto transdonita, sed ne apartenanta al li, kaj 3-e repagi al la proprietulo en pli longaj partopagoj sen interezoj. Kaj per tio ni elĉerpis la tiurilatajn prudonajn „principojn”. Tio estas la „socia likvidado” de Prudono.

Preterpase: Ke tiu tuta reformplano estas utila preskaŭ ekskluzive al la etburĝoj kaj etkampanoj, tiel ke ĝi *firmigas* ilin en ilia pozicio kiel etburĝoj kaj etkampanoj, estas evidenta. La laŭ Mülberger mita figuro de la „etburĝo Prudono” do ĉi tie ricevas subite tre palpeblan historian ekziston.

Mülberger daŭrigas:

„Se mi diras laŭ Prudono, ke la ekonomia vivo de socio estu trapenetrita de *jura ideo*, tiam mi per tio *priskribas* la hodiaŭan socion kiel tian, en kiu mankas ja ne ĉia jura ideo, sed la *jura ideo de la revolucio*, fakto, kiun Engelso mem koncedos.”

Bedaŭrinde mi ne kapablas pri tio komplezi Mülberger-on. Mülberger postulas, ke la socio estu trapenetrita de jur-ideo, kaj nomas tion priskribo. Se tribunalo per ekzekutisto venigas al mi postulon pagi ŝuldon, tiam ĝi faras, laŭ Mülberger, nenion alian ol ke ĝi *priskribas* min kiel homon, kiu ne pagas siajn ŝuldojn! Io estas priskribo, io alia estas impertinentaĵo. Kaj ĝuste ĉi tie troviĝas la esenca diferenco de la germana scienca socialismo disde Prudono. Ni priskribas – kaj ĉiu reala priskribo estas, malgraŭ Mülberger, samtempe la klarigo de la afero – la ekonomiajn kondiĉojn, tiaj kiaj ili estas kaj kiel ili evoluas, kaj strikte ekonomie pravas, ke tiu ĝia evoluo estas samtempe la evoluo de la elementoj de socia revolucio: la evoluo – unuflanke, de klaso, kies vivkondiĉo necese pelas ĝin al socia revolucio, de la proletaro – aliflanke, de produktadfortoj, kiuj, elkreskintaj el la kadro de

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

la kapitalisma socio, devas nepre krevigi ĝin kaj kiuj samtempe donas la rimedojn forigi la klasajn diferencojn unufoje por ĉiam en la intereso de la socia progreso mem. Prudono, male, postulas de la hodiaŭa socio transformiĝon ne laŭ la leĝoj de sia propra ekonomia evoluo, sed laŭ la preskriboj de la justeco (la „*jurideo*” ne apartenas al li, sed al Mülberger). Kie ni provas, tie Prudono *predikas* kaj lamentas, kaj kun li Mülberger.

Kio estas la „jurideo de la revolucio”, tion mi absolute ne povas diveni. Prudono tamen faras por si el „*la revolucio*” ian diinon, la portantinon kaj plenumantinon de lia „justeco”; ĉe kio li falas en la strangan eraron reciproke konfuzi la burĝan revolucion de 1789-1794 kaj la estontan proletaran revolucion. Tion li faras en preskaŭ ĉiuj siaj verkoj, speciale ekde 1848; mi citu nur kiel ekzemplon: „*Idée générale de la Révolution*”, eld. 1868, p. 39 kaj 40. Sed ĉar Mülberger rifuzas ĉian respondecon pri Prudono, mi ne rajtas klarigi la „jurideon de la revolucio” el Prudono, kaj mi restu en egipta mallumo.

Krome, Mülberger diras:

„Sed nek Prudono nek mi alvokas 'eternan justecon', por per tio klarigi la ekzistantajn maljustajn kondiĉojn aŭ eĉ, kiel Engelso imputas al mi, atendi la plibonigon de tiuj kondiĉoj de la alvoko al tiu justeco.”

Mülberger devas bazi sin sur tio, ke „Prudono entute en Germanio estas kvazaŭ ne konata”. En ĉiuj siaj skribaĵoj Prudono mezuras ĉiujn sociajn, jurajn, politikajn, religiajn frazojn laŭ la mezurilo de la „justeco”, rifuzas aŭ agnoskas ilin, laŭ tio ĉu ili kongruas aŭ ne kun tio, kion li nomas „justeco”. En la „*Contradictions économiques*” tiu justeco nomiĝas ankoraŭ „eterna justeco”, *justice éternelle*. Poste li prisilentas la eternecon, sed ĝi restas implicite. Ekz-e en: „*De la Justice dans la Révolution et dans l'Église*”, 1858, la sekva teksto estas la teksto de la tuta trivoluma prediko (vol. 1, paĝo 42):

„Kiu estas la baza principo, la organika, regulanta, suverena principo de la socioj, la principo kiu, subordigante al si ĉiujn aliajn, regas, protektas, repuŝas, punas, se necese eĉ subpremas ĉiujn ribelajn elementojn? Ĉu ĝi estas la religio, la idealo, la intereso? [...] Tiu principo, laŭ mia opinio, estas la *justeco*. – Kio estas la justeco? *La esenco de la homaro mem*. Kio ĝi estis depost la komenco de la mondo? Nenio. – Kio ĝi estu? Ĉio.”

Justeco, kiu estas la esenco de la homaro mem, kio estas tio alia ol la *eterna* justeco? Justeco, kiu estas la organika, regulanta, suverena baza principo de la socioj, kiu ĝis nun malgraŭ tio estis nenio, sed kiu devas esti ĉio – kio alia ĝi estas ol la mezurilo, laŭ kiu ĉiuj homaj aferoj mezurendas, al kiu ĉe ĉia kolizio oni devas apelacii kiel al la decida juĝisto? Kaj ĉu mi asertis ion alian, ol ke Prudono kovras sian ekonomian nescion kaj senhelp-econ per tio ke li juĝas ĉiujn ekonomiajn kondiĉojn ne laŭ la ekonomiaj leĝoj, sed laŭ tio, ĉu ili kongruas aŭ ne kun lia imago de tiu eterna justeco? Kaj en kio Mülberger distingiĝas disde Prudono, se Mülberger postulas, ke „ĉiuj transformoj en la vivo de la moderna socio [...] estu trapenetritaj de jurideo, t.e. ĉie „realigotaj laŭ la striktaj postuloj de la justeco”? Ĉu mi ne scias legi, aŭ ĉu Mülberger ne scias skribi?

Mülberger diras plu:

„Prudono scias same bone kiel Markso kaj Engelso, ke la vera movanto en la homa socio estas la ekonomiaj, ne la juraj kondiĉoj, ankaŭ li scias, ke la respektivaj jurideoj de popoloj estas nur la esprimo, la premspuro, la produkto de la ekonomiaj, speciale de la produktadaj kondiĉoj [...]. La juro estas por Prudono, per unu vorto – historie fariĝinta ekonomia produkto.”

Se Prudono tion (mi ne konsideru la malklaran esprimmanieron de Mülberger kaj akceptu la bonan intencon kvazaŭ faron), se Prudono ĉion ĉi „same bone scias kiel Markso kaj Engelso”, kiel ni tiam povas ankoraŭ disputi? Sed la scienco de Prudono estas io iom alia. La ekonomiaj kondiĉoj de donita socio prezentiĝas unue kiel *intereso*. Nu, Prudono diras en la ĵus citita teksto de sia ĉefverko per sekaj vortoj, ke la „regulanta, organika, suverena baza principo de la socioj, kiu subordigas al si ĉiujn aliajn”, ne estas la *intereso*, sed la *justeco*. Kaj li ripetas la samon en ĉiuj siaj skribaĵoj en ĉiuj decidaj lokoj. Tio ne malhelpas Mülberger-on daŭrigi:

„[...] ke la ideo de la ekonomia juro, tia kia ĝi estas de Prudono plej profunde disvolvita en '*La Guerre et la Paix*', komplete koincidas kun tiuj bazaj ideoj de Lasalo, kiuj estas tiel bele donitaj en lia antaŭparolo al la 'Sistemo de la akiritaj rajtoj.'”

„*La Guerre et la Paix*” estas eble la plej lernejeca el la multaj lernejecaj verkoj de Prudono, sed ke oni citas ĝin kiel pruvon por lia laŭdira kompreno

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

de la germana materiisma koncepto pri historio, kiu klarigas ĉiujn historiajn okazintaĵojn kaj imagojn, ĉian politikon, filozofion, religion, el la materiaj, ekonomiaj, vivkondiĉoj de la koncerna historia periodo, tion mi ne povis atendi. La libro estas tiom malmulte materiisma, ke ĝi eĉ ne povas sukcesi sian konstruadon de la milito sen alvoki por helpo la *Kreinton*:

„Tamen la Kreinto, kiu elektis por ni tiun vivmanieron, havis siajn celojn” (vol. 2, p. 100 de la eldono de 1869).

Sur kia kono de la historio ĝi baziĝas, tio videblas el tio, ke ĝi kredas je la historia ekzisto de la ora epoko:

„En la komenco, kiam la homaro estis ankoraŭ maldense semita sur la terglobo, la naturo zorgis senpene por ĝiaj bezonoj. Tiu estis la ora epoko, la epoko de abundo kaj de paco” (saml., p. 102)

Lia ekonomia starpunkto estas tiu de la plej maldelikata maltusianismo:

„Se la produktado estas duobligita, tiam la loĝantaro baldaŭ estos ankaŭ duobligita” (p. 106)

Kaj en kio konsistas la maltusianismo de la libro? En tio, ke ĝi asertas, ke la kaŭzo de la milito estas de ĉiam kaj ankoraŭ nun: „la paŭperismo” (ekz-e paĝo 143). Onklo Bräsig²⁸ estis same sukcesa materiisto, kiam li en sia parolado de 1848 senemocie eldiris la grandan vorton: La kaŭzo de la granda malriĉeco estas la granda *pauvreté* [malriĉeco].

La „Sistemo de la akiritaj rajtoj” de Lasalo estas implikita ne nur en la tuta iluzio de la juristo, sed ankaŭ en tiu de la malnovhegelano. Lasalo deklaras klare (p. VII), ke ankaŭ „en la ekonomia kampo la nocio de la akirita rajto estas la movanta fonto de ĉia plua evoluo”, li volas „pruvi „la rajton/juron²⁹ kiel racian organismon, kiu evoluas el si mem”, do ne el ekonomiaj antaŭkondiĉoj (p. XI); por li temas pri deduktado de la rajto/juro, ne el ekonomiaj kondiĉoj, sed el la „volnocio mem, kaj la jurfilozofio estas nur ĝia disvolviĝo kaj prezentiĝo (p. XII). Kial mi citas la libron ĉi tie? La diferenco inter Prudono kaj Lasalo estas nur tiu, ke Lasalo estis vera juristo

28 Romanfiguro de Fritz Reuter [fríc rójter] (verkisto en la malaltgermana, aŭ platdiĉa, 1810-1874). -vl

29 En la germana, la vorto *Recht* signifas samtempe rajton kaj juron. -vl

kaj hegelano kaj Prudono pri la jura sfero kaj pri filozofio, kiel en ĉiuj aliaj aferoj, pura diletanto.

Mi scias tre bone, ke Prudono, kiu, kiel konate, konstante kontraŭdiras sin mem, ankaŭ jen kaj jen esprimas ion, kio aspektas, kvazaŭ li klarigus ideojn el faktoj. Sed tiaj esprimoj estas sen graveco vide al la seninterrompa pensdirekto de la homo, kaj kie ili aperas, ili estas krome ekstreme konfuzaj kaj en si mem malkonsekvencaj.

Sur certa, tre praa evoluŝtupo de la socio aperas la bezono preni la ĉiutage reajn agojn de produktado, de distribuado kaj de interŝanĝo de la produktoj sub komunan regulon, zorgi por tio, ke la unuopulo submetiĝu al la komunaj kondiĉoj de la produktado kaj de la interŝanĝo. Tiu regulo, unue moro, baldaŭ fariĝas leĝo. Kun la leĝo necese estiĝas organoj taskitaj pri ĝia respektado – la publika forto, la ŝtato. Kun la plua socia evoluo la leĝo plu evoluas al pli aŭ malpli ampleksa leĝaro. Ju pli tiu leĝaro komplikiĝas, des pli ĝia esprimmaniero malproksimiĝas de tiu, en kiu la ordinaj ekonomiaj vivkondiĉoj de la socio esprimiĝas. Ili aperas kiel memstara elemento, kiu prenas sian ekzistorajton kaj la pravigon de sia pluevoluado ne el la ekonomiaj kondiĉoj, sed el propraj, internaj kialoj, ekzemple el la „volnocio”. La homoj forgesas la devenon de sia rajto/juro el la ekonomiaj vivkondiĉoj, same kiel ili forgesis sian devenon el la animala regno. Kun la pludisvolvado de la leĝaro al komplika, ampleksa tutaĵo aperas la neceso de nova socia labordivido; estiĝas tavolo de profesiaj jurkleruloj, kaj kun tiuj estiĝas la jurscienco. Tiu komparas en sia plua evoluo la jursistemojn de diversaj popoloj kaj de diversaj epokoj, ne kiel premspurojn de la respektivaj ekonomiaj kondiĉoj, sed kiel sistemojn, kiuj trovas sian pravigon en si mem. La komparo premisas ion komunan: tio troviĝas per tio, ke la juristoj kunmetas la pli aŭ malpli komunajn elementojn de ĉiuj ĉi jursistemoj kiel *naturrajton*. Sed la mezurilo, laŭ kiu oni mezuras kio estas kaj kio ne estas naturrajto, estas ĝuste la plej abstrakta esprimo de la rajto/juro mem: la *justeco*. De tiam la disvolvado de la juro estas por la juristoj kaj por tiuj, kiuj kredas ilin laŭlitere, jam nur la strebado ĉiam pli proksimigi la homajn kondiĉojn – laŭ tio, en kio ili esprimiĝas jure – al la idealo de la justeco, de la *eterna* justeco. Kaj tiu justeco estas ĉiam nur la ideologiita, ĉieligita esprimo de la ekzistantaj ekonomiaj kondiĉoj, jen laŭ iliaj konservativa, jen laŭ ilia revolucia flanko. La justeco de la antikvaj grekoj kaj romanoj opiniis la

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

sklavismon justa: la justeco de la burĝoj de 1789 postulis la forigon de la feŭdismo, ĉar ĝi estas maljusta. Por la prusaj junkroj eĉ la putra distrikt-ordo estas rompo de la eterna justeco. La imago de la eterna justeco do ŝanĝiĝas ne nur tempe kaj loke, sed eĉ ĉe la personoj, kaj ĝi apartenas al la aferoj, sub kiuj, kiel Mülberger ĝuste rimarkas, „ĉiu komprenas ion alian”. Se en la ordinara vivo ĉe la simpleco de la aferoj kiuj estas tie juĝataj, esprimoj kiel *justa*, *maljusta*, *justeco*, *jursento* ankaŭ rilate al sociaj aferoj estas akceptataj sen miskompreno, ili tamen en sciencaj esploradoj pri ekonomiaj kondiĉoj, kiel ni vidis, kaŭzas la saman katastrofan konfuzon, kiu ekz-e en la nuntempa ĥemio estiĝus, se oni volus konservi la esprimmanieron de la flogisma teorio. La konfuziĝo fariĝas ankoraŭ pli grava, se oni, kiel Prudono, kredas je tiu sociala flogo³⁰, la „justeco”, aŭ, kiel Mülberger asertas, la flogo ne malpli ol la oksigeno estas perfekte pruvitaj.

3

Mülberger plendas krome, ke mi nomas lian „emfazan” eldiron pri tio,

„ke ne ekzistas pli terura moko pri la tuta kulturo de nia glorata jarcento ol la fakto, ke en la grandaj urboj 90 elcentoj kaj pli de la loĝantaro ne havas hejmon, kiun ili povas nomi sia propraĵo”

reakcia lamentaĵo. Tamen, se Mülberger estus sin limiginta, kiel li asertas,

30 Flogo (germane: *Phlogiston*) fluaĵo supozita de la antikvaj ĥemiistoj por klarigi la brulon; *flogismo* tiu teorio, *flogisto* ties teoriulo. -vl
– Antaŭ la malkovro de la oksigeno la ĥemiistoj klarigis al si la brulon de la korpoj en atmosfera aero per la supozo de propra brulaĵo, de flogo, kiu eskapas ĉe la brulado. Ĉar ili trovis, ke brulintaj simplaj korpoj post la brulado pezis pli ol antaŭe, ili klarigis, ke la flogo havas negativan pezon, tiel ke korpo sen sia flogo pezas pli ol kun ĝi. Tiel oni atribuis al la flogo iom post iom la ĉefajn ecojn de oksigeno, sed ĉiujn inverse. La malkovro, ke la brulado konsistas en la kombinado de la brulanta korpo kun alia, la oksigeno, kaj la prezentado de tiu oksigeno ĉesigis tiun supozon – tamen nur post longa rezistado de la pli maljunaj ĥemiistoj. -mew

priskribi la „hororaĵojn de la nuntempo”, tiam mi certe dirintus nenian malicaĵon „al li kaj al liaj modestaj vortoj”. Sed li faras ion tute alian. Li priskribas tiujn „hororaĵojn” kiel efikon de tio, ke la laboristoj „*ne havas lokon, kiun ili povas nomi sia propraĵo*”. Ĉu oni priplendas „la hororaĵojn de la nuntempo” pro la kaŭzo ke la domproprietulo de la laboristoj estas forigita, aŭ, kiel faras la junkroj, el tiu, ke la feŭdismo kaj la korporacioj estas forigitaj – en ambaŭ kazoj povas rezulti nenio ol reakcia lamento, plorkanto pri la enrompiĝo de la neeviteblaĵo, de la historie necesa evento. La reakcieco troviĝas ĝuste en tio, ke Mülberger volas restarigi la individu-an domproprieton de la laboristoj – aferon, kiun la historio jam delonge forviŝis el la tabulo; ke li povas pensi la liberiĝon de la laboristoj ne alie ol tiel ke ĉiu refariĝos proprietulo de sia domo.

Plue:

„Mi diras plej klare: La vera batalo estas kontraŭ la kapitalisma produktadmaniero, kaj *nur el ĝia transformado* espereblas pliboniĝo de la loĝejkondiĉoj. Engelso vidas nenion pri ĉio ĉi [...] mi premisas la tutan solvon de la socia demando, por povi alpaŝi la kvitigon de la ludomo.”

Bedaŭrinde ankaŭ hodiaŭ mi ankoraŭ vidas nenion pri ĉio ĉi. Mi ja tute ne povas scii, kion iu, kies nomon mi eĉ ne konis, en la sekreta ĉambreto de sia cerbo premisas. Mi povas konsideri nur la presitajn artikolojn de Mülberger. Kaj tie mi trovas ankoraŭ nun, ke Mülberger (paĝo 15 kaj 16 de la aparta presaĵo), por povi alpaŝi la kvitigon de la luloĝejo, premisas nenion alian ol – la luloĝejon. Nur sur la paĝo 17 li kaptas „la produktivon de la kapitalo ĉe la kornoj”, pri kio ni ankoraŭ revenos. Kaj en sia respondo li konfirmas tion, kiam li diras:

„Pli ĝuste necesis montri, kiel *el la ekzistantaj kondiĉoj* eblas trudi kompletan ŝanĝon en la loĝejproblemo.”

El la ekzistantaj kondiĉoj, kaj el la ŝanĝo (li celas forigon) de la kapitalisma produktadmaniero, estas ja tute kontraŭaj aferoj.

Ne mirigas, ke Mülberger plendas, ke en la homamaj strebaĵoj de la s-roj Dollfus kaj aliaj fabrikistoj havigi al la laboristoj proprajn domojn mi vidas la sole eblan praktikan realigon de liaj prudonismaj projektoj. Se li komprenus, ke la prudona plano por savi la socion estas fantaziaĵo kiu moviĝas

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

tute sur la bazo de la burĝa socio, tiam li kompreneble ne kredus je ĝi. Mi ja neniam kaj nenie pridubis lian bonan volon. Sed kial li laŭdas d-ron Reschauer pro tio ke li proponas al la viena urba konsilantaro imiti la projektojn de Dollfus?

Krome Mülberger deklaras:

„Kio speciale koncernas la kontraston³¹ inter urbo kaj kamparo: apartenas al la utopioj voli nuligi ĝin. Tiu kontrasto estas natura, pli ĝuste dirite, ĝi fariĝis historia [...]. La tasko ne estas *nuligi* tiun kontraston, sed trovi politikajn kaj sociajn formojn, en kiuj ĝi estas *ne malutila* kaj eĉ *fruktodona*. Tiamaniere oni povas atendi pacan kvitiĝon, iom-post-ioman ekvilibron de la interesoj.”

Do, la nuligo de la kontrasto inter urbo kaj kamparo estas utopio, ĉar tiu kontrasto estas natura, pli ĝuste dirite, historie fariĝinta. Ni apliku tiun logikon al aliaj kontrastoj de la moderna socio, kaj ni vidu, kien ni tiam venas. Ekz-e:

„Kio speciale koncernas la kontraston inter” kapitalistoj kaj dunglaboristoj, „tiu apartenas al la utopioj voli nuligi ĝin. Tiu kontrasto estas natura, pli ĝuste dirite, ĝi fariĝis historia. La tasko ne estas *nuligi* tiun kontraston, sed trovi politikajn kaj sociajn formojn, en kiuj ĝi estas *ne malutila* kaj eĉ *fruktodona*. Tiamaniere oni povas atendi pacan kvitiĝon, iom-post-ioman ekvilibron de la interesoj.”

Ĉe tio ni ree alvenis ĉe Schulze-Delitzsch.

La nuligo de la kontrasto inter urbo kaj kamparo estas ne pli kaj ne malpli utopio ol la nuligo de la kontrasto inter kapitalistoj kaj dunglaboristoj. Ĉiutage pli ĝi fariĝas praktika postulo de la industria kiel de la kampkultura produktado. Neniu postulis ĝin pli laŭte ol Liebig³² en siaj skribaĵoj pri la ĥemio de la kampkulturo, en kiu ĉiam lia unua postulo estas, ke la homo redonu al la kampo, kion li ricevas de ĝi, kaj en kiu li pruvas, ke nur la ekzisto de la urboj, speciale de la grandaj urboj, malebligas tion. Se oni

31 Mi tradukis la germanan „Gegensatz” jen kiel *kontraŭecon*, jen kiel *kontraston* sinonime. -vl

32 Justus von Liebig (1803-1873), germana ĥemiisto, progresigis la organikan ĥemion en Germanio kaj alportis utilajn sciojn pri sterkado en la kampkulturo. -vl

vidas, kiel ĉi tie nur en Londono pli granda kvanto da sterkaĵo ol la tuta reĝlando Saksujo produktas, ĉiutage, kun pago de gigantaj kostoj – estas ŝutata en la maron, kaj kiaj kolosaj instalaĵoj necesas por malebligi ke tiu sterkaĵo ne venenigu la tutan Londonon, tiam la utopio de forigo de la kontrasto inter urbo kaj kamparo ricevas rimarkinde praktikan bazon. Kaj eĉ la relative signifa Berlino de almenaŭ tridek jaroj dronas en la fetoro de sia propra koto. Aliflanke temas pri pura utopio, se oni, kiel Prudono, volas transformegi la nunan burĝan socion kaj konservi la kampulon kiel tian. Nur kiom eble plej egala distribuado de la loĝantaro tra la tuta lando, nur densa interrilato de la industria kun la kampkultura produktado, apud la per tio necesiganta etendo de la komunikadrimedoj – kun la premiso de forigo de la kapitalisma produktadmaniero – kapablas eltiri la kamparan loĝantaron el la izoliteco kaj malklereco, en kiuj ĝi vegetas de jarmiloj preskaŭ senŝanĝe. Ne estas utopio aserti, ke la liberigo de la homoj el la katenoj forĝitaj de sia historia pasinteco fariĝas kompleta nur kiam la kontrasto inter urbo kaj kamparo estas forigita; la utopio estiĝas nur tiam, kiam oni kapricas „el la ekzistantaj formoj” preskribi la *formon*, en kiu tiu aŭ ia ajn kontrasto de la ekzistanta socio estu solvota. Kaj tion faras Mülberger, per tio ke li alproprigas al si la prudonan formulon por solvi la loĝejproblemon.

Krome Mülberger plendas, ke mi iel respondecigas lin pri „la monstraj ideoj de Prudono pri kapitalo kaj interezoj”, kaj diras:

„Mi *premis* la ŝanĝon de la produktadkondiĉoj *kiel donitan*, kaj la transira leĝo regulanta la interezkvoton ne celas la produktadkondiĉojn, sed la sociajn realigojn, la cirkuladkondiĉojn [...]. La ŝanĝo de la produktadkondiĉoj, aŭ kiel la germana skolo pli precize diras, la forigo de la kapitalisma produktadmaniero, tamen ne rezultas, kiel Engelso *malĝuste atribuas al mi*, el transira leĝo kiu nuligas la interezon, sed el la *fakta ekposedo de ĉiuj laborinstrumentoj*, el la ekposedo de la tuta industrio flanke de la laboranta popolo. Ĉu la laboranta popolo ĉe tio pli omaĝos (!) la akiron per kompensa kvitigo³³ aŭ la tujan senproprietigon, tion devas decidi nek Engelso nek mi.”

Mi frotas al mi la okulojn pro miro. Mi relegas la traktaĵon de Mülberger

33 Germane: *Ablösung*, „kompensa kvitigo”, resp. „kvitiĝo”, en la sekvo ankaŭ tradukita kiel „kompensaĵo”, „kompensado”. -vl

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

de la komenco ĝis la fino por trovi la teksteron, kie li klarigas, ke lia akiro de la luloĝejo per kompensa kvitigo premisas kiel faritan „la faktan ekposedon de ĉiuj laborinstrumentoj, la ekposedon de la tuta industrio flanke de la laboranta popolo”. Mi ne trovas la teksteron. Ĝi ne ekzistas. Pri „fakta ekposedo” estas nenie parolite. Sed en la paĝo 17 ja tekstas:

„Ni nun supozu, ke la produktivo de la kapitalo *estas vere kaptita ĉe la kornoj*, kiel tio pli aŭ malpli frue devas okazi, ekz-e *per transira leĝo*, kiu *fiksas la interezon de ĉiaj kapitaloj al unu procento*, atentu bone, kun la tendenco ankaŭ tiun procentaĵon ĉiam pli proksimigi al nulo [...]. Kiel ĉiuj ceteraj produktoj, kompreneble ankaŭ domo kaj loĝejo troviĝas en la kadro de tiu leĝo [...]. Ni vidas do el tiu flanko, ke la akiro de la luloĝejo per kompensa kvitigo *rezultas kun neceso kiel sekvo de la forigo de la produktivo de la kapitalo entute.*”

Ĉi tie, tute en kontraŭdiro al la plej afabla esprimo de Mülberger, estas do dirite per sekaj vortoj, ke la produktivo de la kapitalo (per tiu konfuzo frazo, kiel li mem koncedas, li celas la kapitalisman produktadmanieron) per la leĝo foriganta la interezon estas ja „kaptita ĉe la kornoj” kaj ke ĝuste sekve al tiu leĝo la akiro de la luloĝejo rezultas kun neceso kiel sekvo de la forigo de la produktivo de la kapitalo entute. Tute ne, diras Mülberger nun, tiu transira leĝo „ne celas la *produktadkondiĉojn*, sed la *ĉirkuladkondiĉojn*”. En tiu kompleta kontraŭdiro, kiu laŭ Goeto³⁴ estas „same mistera por saĝuloj kiel por malsaĝuloj”, restas al mi nur la supozo, ke mi rilatas kun du diversaj Mülberger-oj, el kiuj unu prave plendas, ke mi „malĝuste atribuis” al li tion, kion la alia presigis.

Ke la laboranta popolo demandos nek min nek Mülberger-on, ĉu ĝi ĉe la fakta ekposedo „pli omaĝos la kompensan akiron aŭ pli la tujan senproprietigon”, tio certe ĝustas. Plej verŝajne ĝi preferos tute ne „omaĝi”. Sed pri fakta ekposedo de ĉiuj laborinstrumentoj fare de la laboranta popolo ja tute ne estis parolita, sed nur pri la aserto de Mülberger (p. 17), ke „la tuta enhavo de la solvo de la loĝejproblemo estas donita per la vorto: *akiro per kompensaĵo*”. Se li nun deklaras tiun akiron per kompensaĵo ekstreme dubinda, kial do kaŭzi al ni ambaŭ kaj al la legantoj ĉion ĉi senutilan

34 Germane: Johann Wolfgang Goethe [jóhan vólfgang géte] (1749-1832), unu el la plej famaj germanaj poetoj kaj verkistoj. -vl

penon?

Cetere necesas konstati, ke la „fakta ekposedo” de ĉiuj laborinstrumentoj, la ekposedo de la tuta industrio flanke de la laboranta popolo, estas la ĝusta malo de la prudonisma „akiro per kompensaĵo”. Ĉe tiu ĉi lasta, la unuopa laboristo fariĝas proprietulo de la loĝejo, de la bieno, de la laborinstrumento; ĉe la unua la „laboranta popolo” restas ĉiomproprietulo de la domoj, fabrikoj kaj laborinstrumentoj, kaj transdonas ilian uzadon, almenaŭ dum transira tempo, apenaŭ sen kompensado de la kostoj al unuopuloj aŭ societoj; ĝuste kiel la forigo de la grundproprietulo ne estas la forigo de la grundrento, sed ĝia transdono, kvankam en modifita maniero, al la socio. La fakta ekposedo de ĉiuj laborinstrumentoj fare de la laboranta popolo do tute ne ekskludas la konservadon de la lurilato.

Entute ne temas pri la demando, ĉu la proletaro, kiam ĝi enpotenciĝas, simple perforte ekposedas la produktadinstrumentojn, krudmaterialojn kaj vivrimedojn, ĉu ĝi tuj pagas por tio kompensaĵon aŭ ĉu ĝi akiras la proprieton je tio per malrapida po-parta pago. Voli respondi tian demandon anticipe kaj por ĉiuj okazoj, tio signifus fari utopiojn, kaj tion mi lasas al iuj aliaj.

4

Tiom da skribado necesis, por tra la diversaj elturniĝoj kaj volviĝoj de Mülberger fine veni al la afero mem, kiun tuŝi Mülberger en sia respondo zorge evitas.

Kion pozitivan Mülberger diris en sia traktaĵo?

Unue, „la diferenco inter la origina kostprezo de domo, konstruejo ktp kaj ĝia hodiaŭa valoro” apartenas laŭrajte al la socio. Tiu diferenco nomiĝas en la ekonomia lingvo grundrento. Tiun Prudono volas ankaŭ proprietiigi al la socio, kio legeblas en „*Idée générale de la Révolution*”, 1868, p. 129.

Due, la solvo de la loĝejproblemo konsistas en tio, ke ĉiu, anstataŭ esti luprenanto, fariĝu proprietulo de sia loĝejo.

Trie, tiu solvo okazas per tio, ke oni per leĝo transformas la pagadojn de luprezo en partopagojn je la aĉetprezo de la loĝejoj. – Tiuj punktoj 2 kaj 3 estas ambaŭ pruntitaj el Prudono, kiel ĉiu povas legi en „*Idée générale de la*

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

Révolution”, p. 199 kaj sekvaj, kaj kie, en la paĝo 203, eĉ la koncerna leĝpropono troviĝas prete redaktita.

Kvare, ke oni kaptas la produktivon de la kapitalo ĉe la kornoj per transira leĝo, per kiu la interezkvoto estas fiksita provizore al 1 procento, kun la opcio de posta plua malaltigo. Tio estas ankaŭ pruntita el Prudono, kie oni povas detale legi ĝin en „*Idée générale* ktp”, p. 182-186.

Mi citis ĉe ĉiu el tiuj punktoj la teksteron ĉe Prudono, kie troviĝas la originalo de la Mülberger-a kopio, kaj mi nun demandas, ĉu mi rajtis aŭ ne rajtis nomi la aŭtoron de vere prudonisma artikolo – kaj kiu entenas nenion ol prudonismajn ideojn – prudonisto? Kaj tamen Mülberger plendas pri nenio pli amare ol ke mi nomas lin tia, ĉar mi trafis „sur kelkajn *esprimojn*, kiuj estas apartaĵoj de Prudono”! Male. La „*esprimoj*” apartenas ĉiuj al Mülberger, la *enhavo* apartenas al Prudono. Kaj kiam mi poste kompletigas lian prudonisman traktaĵon el la verkoj de Prudono, tiam Mülberger plendas, ke mi atribuas al li la „monstrajn ideojn” de Prudono!

Per kio mi nun respondis al tiu prudonisma plano?

Unue, ke transdono de la grundrento al la ŝtato estas samsignifa kun forigo de la individua grundproprietio.

Due, ke la akiro per kompensado de la luloĝejo kaj la transigo de la proprietio de la loĝejo al la ĝisnuna luprenanto tute ne tuŝas la kapitalisman produktadmanieron.

Trie, ke tiu propono ĉe la nuna evoluo de la granda industrio kaj de la urboj estas same absurda kiel reakcia kaj ke la reenkonduko de la individua proprietio de ĉiu unuopulo je sia loĝejo estus malprogreso.

Kvare, ke la deviga malaltigo de la kapitalinterezo tute ne atakas la kapitalisman produktadmanieron, male, kiel la uzurleĝoj pruvas, estas same malnovega kiel malebla.

Kvine, ke per la nuligo de la kapitalinterezo la lumono por domoj tute ne estas forigita.

Pri la punktojn 2 kaj 4 Mülberger nun konsentis. Al la ceteraj punktoj li tute ne respondas. Kaj tamen tiuj estas ĝuste la punktoj pri kiuj temas en la diskuto. Sed la respondo de Mülberger ne estas refuto; ĝi zorge ĉirkaŭiras la

ekonomiajn punktojn, kiuj tamen estas la decidaj; ĝi estas persona plendaĵo, nenio pli. Ekz-e li plendas, kiam mi anticipas lian anoncitan solvon de aliaj problemoj, ekz-e ŝtatŝuldoj, privatŝuldoj, kredito, kaj kiam mi diras: la solvo estas ĉie tiu, ke – kiel ĉe la loĝejproblemo – la interezo estas forigota, la interezpagoj transformotaj al partopagoj je la kapitalo kaj la kredito farota senkosta. Malgraŭ tio mi ŝatus eĉ hodiaŭ veti, ke, kiam tiuj artikoloj de Mülberger enmondiĝos, ilia esenca enhavo kongruos kun la prudona „*Idée générale*”: kredito p. 182, ŝtatŝuldoj p. 186, privatŝuldoj p. 196 same kiel tiu pri la loĝejproblemo kun la cititaj teksteroj de la sama libro.

Ĉe tiu ĉi okazo Mülberger instruas al mi, ke tiuj demandoj, kiel impostoj, ŝtatŝuldoj, privatŝuldoj, kredito, al kiu aldoniĝas nun ankaŭ la aŭtonomeco de la komunumo, estas por la kampulo kaj por la propagando en la kamparo plej gravaj. Mi grandparte konsentas; sed 1-e ĝis nun la kampuloj estis eksteremaj, kaj 2-e la prudonaj „solvoj” de ĉiuj ĉi problemoj estas same ekonomie absurdaj kaj same esence burĝaj kiel lia solvo de la loĝejproblemo. Kontraŭ la aludo de Mülberger, kvazaŭ mi miskonus la neceson enpreni la kampulojn en la movadon, ne *mi* bezonas defendi *min*. Tamen mi konsideras malsaĝa rekomendi por tiu celo al la kampuloj la prudonan miraklokuracon. En Germanio ankoraŭ ekzistas tre multe da granda grundproprietulo. Laŭ la prudona teorio ĉio ĉi devus esti dispartigota en malgrandajn kampulajn bienetojn, kio ĉe la nuntempa nivelo de la kampkultura scienco kaj laŭ la spertoj faritaj en Francio kaj okcidenta Germanio pri la parcela grundproprietulo estus rekte reakcia. La ankoraŭ ekzistanta granda grundproprietulo, male, donos al ni bonvenan okazon por igi asociiĝintajn laboristojn funkciigi la kampkulturon en granda skalo, kiu sole povas apliki ĉiujn modernajn rimedojn, maŝinojn ktp, kaj per tio evidentigi al la etkampulo la avantaĝojn de la granda entrepreno per asociiĝo. La danaj socialistoj, tiurilate antaŭaj al ĉiuj, tion delonge komprenis.

Mi same ne bezonas defendi *min* kontraŭ tio, kvazaŭ la hodiaŭaj fiaj loĝkondiĉoj de la laboristoj estus por mi „signifiva detalo”. Kiom mi scias, mi estis la unua, kiu en la germana priskribis tiujn kondiĉojn en ilia klasike evoluinta formo, tiaj kiaj ili ekzistas en Anglio; ne, kiel Mülberger opinias, ke ili „frapas al mia justosento en la vizaĝon” – kiu volus transformi en librojn ĉiujn faktojn, kiuj frapas en la vizaĝon de onia justosento, tiu havus multon por fari –, sed, kiel legeblas en la antaŭparolo de mia libro, por doni

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

al la germanaj socialistoj, kiuj tiam vagadis per senenhavaj frazoj, faktan bazon per la priskribo de la sociaj kondiĉoj kreitaj de la moderna granda industrio. Sed voli solvi la tiel nomatan loĝejdemandon, tion mi tamen ne kapricas, same kiel mi ne okupiĝas pri la detaloj de la solvo de la ankoraŭ pli grava manĝdemando. Mi estas kontenta, se mi povas pruvi, ke la produktado de nia moderna socio estas sufiĉa por havigi al ĉiuj socioj sufiĉe por manĝi, kaj ke ekzistas sufiĉe da domoj por doni al la laborantaj amasoj provizore sufiĉe spacan kaj sanfavoran restadon. Kiel estonta socio regulos la distribuadon de la manĝaĵo kaj de la loĝejo, pri tio spekulante kondukas rekte en la *utopion*. Ni ne povas pli ol konstati, el la kompreno de la bazaj kondiĉoj de ĉiuj ĝisnunaj produktadmanieroj, ke per la falo de la kapitalisma produktado certaj formoj de alproprigo de la ĝisnuna socio fariĝas maleblaj. Eĉ la transiraj disponoj devos ĉie orientiĝi laŭ la en la momento ekzistantaj kondiĉoj, en landoj kun malgranda grundproprietulo ili estos esence aliaj ol en landoj kun granda grundposedo ktp. Kie oni alvenas, se oni serĉas detalajn solvojn por tiuj tiel nomataj praktikaj demandoj, kiel la loĝejproblemo ktp, tion pruvas al ni neniu pli bone ol Mülberger mem, kiu unue sur 28 paĝoj klarigas, kiel „la tuta enhavo de la solvo de la loĝejdemando estas donita en la vorto: akiro per kompensaĵo”, por poste, ekde kiam oni alpaŝas lin, embarasite balbuti, ke estas efektive tre dubinde, ĉu ĉe la fakta ekposedo de la domoj „la laboranta popolo pli omaĝos la akiron per kompensaĵo” aŭ ian alian formon de senproprietigo.

Mülberger postulas, ke ni fariĝu *praktikaj*, „fronte al la realaj praktikaj kondiĉoj” ni ne uzu „nur mortintajn abstraktajn formulojn”, sed ni „elpaŝu el la abstrakta socialismo kaj *alpaŝu la certajn konkretajn kondiĉojn de la socio*”. Se Mülberger farintus tion, li eble akirintus grandajn meritojn pri la movado. La unua paŝo ĉe la alpaŝado al la certaj konkretaj kondiĉoj de la socio konsistas ja en tio, ke oni ekkonas ilin, ke oni esploras ilin kun ilia ekzistanta ekonomia kunteksto. Kaj kion de tio ni trovas ĉe Mülberger? Nur du frazojn, nome:

1. „Kio la dunglaboristo estas fronte al la kapitalisto, tio estas la luprenanto kontraŭ la domposedanto.”

En la paĝo 6 de la aparta presaĵo mi pruvis, ke tio estas komplete malĝusta, kaj Mülberger ne povas respondi al tio.

2. „La virbovo, kiu” (ĉe la socia reformo) „estas kaptenda ĉe la kornoj, estas *la produktivo de la kapitalo*, kiel la liberala skolo de la nacia ekonomio nomas ĝin, kiu *envere ne ekzistas*, sed kiu *en sia ŝajnekzisto* servas kiel preteksto de ĉia malegaleco, kiu pezas sur la hodiaŭa socio.”

La virbovo kaptenda ĉe la kornoj do „*envere ne ekzistas*”, do ankaŭ ne havas „kornojn”. Ne ĝi mem, sed ĝia *ŝajna* ekzisto estas la malbono. Malgraŭ tio la „tiel nomata produktivo” (de la kapitalo) „kapablas elsorĉi el la grundo domojn kaj urbojn”, kies ekzisto estas ĉio alia ol „ŝajna” (p. 12). Kaj homo, kiu, kvankam la marksa „Kapitalo” „ankaŭ al li estas bone konata”, en tiu senhelpe balbuta maniero galimatias pri la rilato de kapitalo kaj laboro, volas montri novan kaj pli bonan vojon al la germanaj laboristoj kaj nomas sin la „arĥitekto”, kiu „havas klaran ideon pri la arĥitekta strukturo de la estonta socio almenaŭ en ĝiaj grandaj trajtoj”?

Neniu pli proksimen „alpaŝis la certajn konkretajn kondiĉojn de la socio” ol Markso en la „*Kapitalo*”. Li dediĉis dudek kvin jarojn al ĝia ĉiufanka esplorado, kaj la rezultoj de lia kritiko entenas ĉie ankaŭ la ĝermojn de la tiel nomataj solvoj, en la mezuro, en kiu tiaj estas nuntempe entute eblaj. Sed tio ne sufiĉas al la amiko Mülberger. Ĉio tio estras abstrakta socialismo, mortintaj abstraktaj formuloj. Anstataŭ studi la „certajn konkretajn kondiĉojn de la socio”, la amiko Mülberger kontentiĝas per la legado de kelkaj volumoj da Prudono, kiuj ja donas al li preskaŭ nenion pri la certaj konkretaj kondiĉoj de la socio, sed kompanse tre certajn konkretajn miraklokuracojn por ĉiuj sociaj malbonaĵoj, kaj li portas tiun pretan socian savplanon, tiun prudentan *sistemon*, antaŭ la germanajn laboristojn sub la preteksto, ke *li* volas „adiaŭi la *sistemojn*”, dum mi „elektas la inversan vojon”! Por kompreni tion, mi devas supozi, ke mi estas blinda kaj Mülberger surda, tiel ke ĉia interkompreniĝo inter ni estas tute malebla.

Sufiĉas. Se tiu ĉi polemiko servas al nenio pli, ĝi havas ĉiukaze la bonaĵon, ke ĝi liveris la pruvon, kio envere estas la praktiko de tiuj socialistoj kiuj nomas sin „praktikaj”. Tiuj praktikaj proponoj por forigi ĉiujn sociajn malbonaĵojn, tiuj sociaj ĉiomrimedoj, estis ĉiam kaj ĉie la fabrikaĵo de sektistoj, kiuj aperis en tempo, kiam la proleta movado troviĝis ankoraŭ en sia infanaĝo. Ankaŭ Prudono apartenas al ili. La evoluo de la proletaro baldaŭ dejetas tiujn infanvindaĵojn kaj kreas en la laborista klaso mem la komprenon, ke nenio estas pli malpraktika ol tiuj „praktikaj solvoj” anticipe

Tria sekcio: Aldonaĵo pri Prudono kaj la loĝejproblemo

elkovitaj kaj aplikeblaj al ĉiuj kazoj, kaj ke la praktika socialismo konsistas, male, en ĝusta ekkono de la kapitalisma produktadmaniero en ties diversaj flankoj. Laborista klaso, kiu estas informita kaj sperta pri tio, en donita kazo *neniam* troviĝos en embaraso por decidi, kontraŭ kiaj sociaj institucioj kaj kiamaniere ĝi devas direkti siajn ĉefajn atakojn.

La Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto *Le Monde diplomatique* en Esperanto (<http://eo.mondediplo.com>) – reta, laŭokaze ankaŭ papera – volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro „Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen en la vico de ilia apero:

1. – C. F. Ramuz: Aline (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2

2. – Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

3. – Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

4. – Kubaj infanrakontoj, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, MAS, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

5. – GBEGLO Koffi: Esperantujismo, MAS, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

6. – Johano Besada: Eseoj, MAS, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

7. – [Karlo Markso] Markso hodiaŭ - Nerefuteblaj citaĵoj, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8

7a. -- [Karlo Markso] Markso hodiaŭ - Nerefuteblaj citaĵoj, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2-a eldono, MAS, 2010, p. 98 p., ISBN 978-2-918300-29-8

8. – Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, MAS, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

9. – Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949, elfrancigis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

10. – Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsultaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj – trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

11. – Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

12. – Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

13. – Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-03-8

13a. – Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2-a eldono, MAS, 2010, 41 p., ISBN 978-2-918300-21-2)

14. – Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo, MAS, 2009, 103 p., ISBN 978

-2-918300-05-2 (2-a eldono vd la n-ron 79)

15. – Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

16. – Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj. François Jullien: Ĉinscienco en sakstrato – Ĉinio en la spegulo de Okcidento; Manfred Szameitaj: Sukcesa, sed ne socialisma; Ingo Nentwig: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; Barry Sautman: Protestoj kaj separismo en Tibeto; Michael Parenti: La mito de Tibeto; Enfu Cheng: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; Jian Xinhua: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; Theodor Bergmann: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; Rolf Berthold: Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; Li Bingyan: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; Helmut Peters: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; Jean-Louis Rocca: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

17. – Karlo Markso: La mizero de la filozofio, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero“; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono.** Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

18. – Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1, Jörg Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, Horst Hensel: La nomoj de la mono – kontribuado al karakterizo de la nuna kapitalismo, Harald Werner: Notoj pri la psikologio de la krizo, Sarah Wagenknecht: Brulfaristoj kiel fajrobregado – Kritiko de la krizmastumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

19. – Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo, Howard Zinn: La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, **Noam Chomsky:** Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, **William Blum:** La nepardonebla revolucio, **Michael Parenti:** Agresso kaj propagando kontraŭ Kubo, **Piero Glejeses:** Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, **Ignacio Ramonet:** Miamo, nesto de teroristoj, **Salim Lamrani:** La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, **Leonard Weinglass:** La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, **Wayne Smith:** Trista paĝo en la historio de usona juro, **Saul Landau:** Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, **Michael S. Smith:** Raporto pri du procesoj, **James Petras:** La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, **Jitendra Sharma:** Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, **Ricardo Alarcón de Quesada:** La kazo de la Kvin –pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, **Gianni Miná:** Historio kiun la amas-komunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, **Nadine Gordimer:** La homaro kiel reflektado de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, MAS, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

20. – Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolando-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, MAS, 2009, 91 p., ISBN 978-2-918300-11-3

21. – Oktobra Revolucio kaj la sekvoj. Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetocio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

22. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2, Joachim Bischoff: La financkrizo kaj alternativoj, Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio, Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio, Manfred Lauer mann: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

23. – La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj. Lucien Sève: Ĉu la homo? – La marka antropologio kaj ĝiaj bazaj kon

-ceptoj, Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potenc-reproduktado, Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsihosocia unuo homo – kogna cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

24. – **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7

25. **Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

26. – **Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8

27. – **Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto”**, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-19-9

28. – **Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3** (2010), Werner Seppmann: Riskokapitalismo;, Richard Sorg: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon;, Christina Kaindl: Subjektiveco en la krizo; Harald Werner: La krizo en la ordinara konscio; Christoph Butterwegge: Mondekonomiakrizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

29. – **Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kōlsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭe; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo?** Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

30. – **Adjévi ADJE: El togolanda saĝosako**, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-20-5

31. – **Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilklo kaj sambo**. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete)

32. – **Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo**, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 403 p., ISBN 978-2-918300-24-3

33. – **Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

34. – **Maritza Gutiérrez: José Martí – de kie kreskas la palmo**, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1

35. – **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj deka ĝis dektria**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4

36. – **Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj, Alexis Passadakis kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago; Hans-Jörg Schimmel: La ideologia dimensio de la CO₂ diskuto; Karl Hermann Tjaden: Kapitalmoviĝo kaj klimata okaziĝo; raportoj**, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-928300-31-1

37. – **Georgo Plehanov: Pri rolo de la persono en la historio**, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 59 p., ISBN 978-2-918300-36-6

38. – **Karlo Markso: Pri la juda demando**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8

39. – **Eddy Raats: Post la pluvo, pluvego, Travivaĵoj de junulo**, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2

40. – **Adebayo AFOLARANMI: Ronke, la ĵaluzulino**, MAS, 2010, 85 p., ISBN 978-2-918300-35-9

41. – **Jozefo Ŝlejŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4

42. – Ivan Efremov: **La Horo de Bovo**. Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 573 p., ISBN 978-2-918300-37-3
43. – Roger Martelli: **La komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES**, elfrancigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p. ISBN 978-2-918300-36-6
44. – Karlo Markso: **Kontribuajo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuajo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo**. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 36 p., ISBN 978-2-918300-38-0
45. – Miriam Rodríguez; ALVERA: **Desegni la parkon**, elhispanigis Jozefo de Jesús Campos Pacheco (porinfana pentrolibro), 28 p., ISBN 978-2-918300-23-6
46. – Kien Afriko en la 21-a jarcento? *Le Monde diplomatique en Esperanto*, MAS, 2010, 157 p., ISBN 978-2-918300-39-7
47. – Paŭlo Popo: **Ĉu sekso subfosas? Maldekstraj teorioj de seksa liberiĝo kaj de malkonstruo de seksa identeco**. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p., ISBN 978-2-918300-41-0
48. – Ŝtejgervaldo, Roberto: **Komunistaj star- kaj disput-punktoj**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 151 p., ISBN 978-2-918300-40-3
49. – Jürgen Albohn: **Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo – Kritiko de la Wertkritik**. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 27 p., ISBN 978-2-918300-42-7
50. – V. I. Lenin: **Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio**. Tradukis el la rusa G. Demidjuk, redaktis Jurij Finkel, MAS, 2011, 181 p., ISBN 978-2-918300-43-4
51. – Unuigintaj Nacioj: **Internacia Konvencio pri la protekto de la rajtoj de ĉiuj migraj laboristoj kaj de iliaj familianoj**. Tradukita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-44-1
52. – Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: **Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo**, komp. Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 289 p., ISBN 978-2-918300-45-8
53. – Karlo Markso: **La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 359 p., ISBN 978-2-918300-30-4
54. **Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn**, tradukita de Jeanne Marie Cash, desegnaĵoj de la tradukinto, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 15 p., ISBN 978-2-918300-47-2
55. Miriam Rodríguez: **Profiloj de Suno kaj Luno**, elhispanigita de Jozefo de Jesús Campos Pacheco, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez, MAS, 2011, 30 p., ISBN 978-2-918300-46-5
56. Frederiko Engelso: **Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-48-9
57. Georgo Dimitrofo: **Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio; Harald Neubert: La Kominterno en la 1930-aj jaroj kaj la koncepto de unueco; kun enkonduko de Günther Judick**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 113 p., ISBN 978-2-918300-49-6

58. José María Arguedas: Yawar-festo (Sangofesto). Esperantigita de Franklin Montenegro, MAS, 2011, 256 p., ISBN 978-2-918300-51-9

59. Ekonomia krizo n-ro 4. Joachim Becker: EU – de la ekonomia al la integriĝa krizo. Jörg Goldberg: La mondo de la du rapidoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-52-6

60. Frederiko Engelso en aktualaj diskutoj. Werner Seppmann: Privilegia loko por rigardi en la laborejon de la marksisma pensado. Notoj pri la korespondado inter Markso kaj Engelso; Erwin Marquit: Engelso kaj logikaj kontraŭdiroj; Karl Hermann Tjaden: Kial ne estiĝis vera engelsismo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 p., ISBN 978-2-918300-50-2

61. V. I. Lenino: Tri fontoj kaj tri partoj de la marksismo; Anarĥiismo kaj socialismo; Pri la slogano de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo; La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a internacio; La diferencoj en la eŭropa laborista movado; Antaŭparolo al la broŝuro de N. Buĥarin: „Mondekonomio kaj imperiismo“; elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 40 p., ISBN 978-2-918300-53-3

62. Daŭrigo de la Manifesto, Moderna poziciigo de komunista partio, La programo de la Germana Komunista Partio DKP, kun antaŭparolo de Helmut Dunkhase, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 63 p., ISBN 978-2-918300-54-0

63. Lode Van de Velde: Epizodoj, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-55-7

64. Jasuo HORI: Tertrema katastrofo de Japanio. Taglibro, MAS kaj SAT, 2011, 165 p., ISBN 978-2-918300-56-4

65. Werner Seppmann: La malkonfesata klaso.. Pri la laborista klaso hodiaŭ, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 176 p., ISBN 978-2-918300-57-1

66. Roberto Ŝteĝervaldo: Sen laborista klaso okazas nenio esenca, sed sole kun ĝi – ankaŭ ne; Werner Seppmann: Remalkovro de la klasoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 paĝoj, ISBN 978-2-918300-58-8

67. Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-60-1

68. Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-59-5

69. Kien la klimato? N-ro 2, MAS, 2011, 61 p., ISBN 978-2-918300-61-8

70. Berto Breĥto: Historioj pri S-ro Kojno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 43 p., ISBN 978-2-918300-62-5 (ekskluzive kiel materialo por seminario ĉe MAS)

71. Ivan Efremov: Rakontoj pri neordinaraĵoj, tradukitaj el la rusa de Jurij Finkel, MAS, 2011, 604 p., ISBN 978-2-918300-63-2

72. Alfredo Bauer: Kritika historio de la judoj, vol. 1, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 459 p., ISBN 978-2-918300-64-9

73. Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasuliĉ, kun Klaus Giettinger: La miskompreno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 59 p., ISBN 978-2-918300-71-7

- 74. Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco,** elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 65 p., ISBN 978-2-918300-65-6
- 75. Georgo Fulberto: „La kapitalo” koncize. Kun recenzo de Lucas Zeise.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 98 p., ISBN 978-2-918300-72-4
- 76. Ivan Efremov: Tais el Ateno.** El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2012, 533 p., ISBN 978-2-918300-73-1
- 77. Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, en: Vilhelmo Lutermano: Materialo por la seminario de MAS: „Berto Breĥto kaj klasa moralo en liaj verkoj «Historioj pri S-ro Kojno» kaj «Me-ti, libro de turnoj», Parto 2-a: «Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj»”, MAS, 2012, 147 p., ISBN 978-2-918300-74-8
- 78. Eddy Raats: Pasio, defio, amikeco. Spertoj de montgrimpisto.** MAS, 2012, 95 p., ISBN 978-2-918300-70-0
- 79. Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo.** 2-a eld., MAS, 2012, 99 p., ISBN 978-2-918300-76-2
- 80. V. I. Lenin: Imperiismo, kiel la plej alta stadio de kapitalismo.** (populara eseo) El la rusa tradukis Jurij Finkel. Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 125 p., ISBN 978-2-918300-77-9
- 81. Yoandry Martínez Rodríguez: Tri en la montaro.** Tri infanteatraĵoj kun desegnaĵoj de Adrián Armas González. Elhispanigita de Jozefo de J. Campos Pacheco, MAS, 2012, 54 p., ISBN 978-2-918300-79-3
- 82. Kien la klimato? N-ro 3 (2012) Pri la roloj de kresko kaj de merkato en la tasko protekti la klimaton,** Kvin eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 62 p., ISBN 978-2-918300-80-9
- 83. Rolfo Lotero: Ĉu evolucio aŭ kreado?** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 22 paĝoj, ISBN 978-2-918300-81-6
- 84. Hans' Magno Encensbergo: Defendo de la lupoj kontraŭ la ŝafidoj. Poemoj.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 118 p., ISBN 978-2-918300-75-5
- 85. Domeniko Losurdo: Libereco kiel privilegio. Kontraŭhistorio de la liberalismo.** Esperantigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 379 p., ISBN 978-2-918300-82-3
- 86. Franco Kafka: Letero al la patro.** Kun akompanaj tekstoj kaj postparolo de Michael Müller. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano. MAS, 2012, 81 p., ISBN 978-2-918300-83-0
- 87. Aleksandro Grin: Skarlataj veloj. La ora ĉeno. Kuranta sur ondoj. Mallongaj rakontoj.** El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2013, 418 p., ISBN 978-2-918300-84-7
- 88. Lothar Peter: Postmoderna maldekstra radikalismo – ĉu vojo al nova estonteco?** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 25 p., ISBN 978-2-918300-85-4
- 89. Ontologio kaj fremdiĝo nuntempe. Domeniko Losurdo: Hegelo, Markso kaj la Ontologio de la socia esto; Claudius Vellay: Fremdiĝo el la vidpunkto de la ontologio de Lukaĉo. Materiisma etiko ĉi-flanke de religio kaj kredo.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 61 p., ISBN 978-2-918300-86-1
- 90. Roberto Ŝteĝervaldo: Postmoderno estas nova melodio al malnova teksto.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 28 p., ISBN 978-2-

918300-87-8

91. Heinz Dieterich: Transiroj al la socialismo en la 21-a jarcento, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 22 p., ISBN 978-2-918300-88-5

92. Frederiko Engelso: Enkonduko al Karlo Markso: Klasbataloj en Francio 1848 ĝis 1850 (1895), elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 23 p., 2013, ISBN 978-2-918300-89-2

93. Máté Zalka: Doberdo. Romano tradukita el la hungara de János Petik, MAS, 2013, 317 p., ISBN 978-2-918300-90-8

94. Jean-Guy Allard: Teroristoj de Usono kontraŭ Latinameriko. Artikoloj tradukitaj de Norberto Díaz Guevara kaj de ceteraj MAS-anoj, MAS, 2013, 445 p., ISBN 978-2-918300-78-6

95. Bartolomeo Laskaso: Raporto pri la detruado de Indio, kun Hans' Magno Encensbergo: Retrorigardo en la estontecon. Tradukitaj el la hispana de Ludoviko Serrano Pérez kaj el la germana de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 107 p., ISBN 978-2-918300-66-3

96. V. Adoratskij: Kio estas marksismo kaj leninismo. El la rusa lingvo tradukis F. Robiček, lingve kontrolis E. Drezen. Reeldono de la verko aperinta ĉe EKRELO laŭ vortrekona skano de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 36 p., ISBN 978-2-918300-92-2

97. Lenino: Pri religio. Du artikoloj. Socialismo kaj religio, trad. M. Lapin kaj G. Demidjuk; **Pri rilato de laborista partio al religio**, trad. G. Demidjuk; redaktitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 28 p., ISBN 978-2-918300-96-0

98. Instituto Markso-Engelso-Lenino: La instruo de Karlo Markso. El la rusa lingvo tradukis P. Gavrilov, N. Incertov, V. Polakov, E. Ŝvedova. Lingve kontrolis V. Polakov. EKRELO, Amsterdamo, 1933. Reeldono fare de MAS laŭ vortrekona skanado de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 39 p., ISBN 978-2-918300-93-9

99. Ignacio Ramonet: La eksplodo de la ĵurnalismo. De la amaskomunikiloj al la amaso de komunikiloj. Tradukita de Maria Julia Cárdenas Cápiro kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 104 p., ISBN 978-2-918300-95-3

100. Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio, kun enkonduko de Eric Hobsbawm, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, ISBN 978-2-918300-91-5 (aperonta en 2014)

101. Frederiko Engelso: La libro de revelacio (La apokalipso de Johano). Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 28 p., ISBN 978-2-918300-97-7

102. Karlo Radeko: Kapitalisma sklaveco kaj socialisma labor-organizo, EKRELO, Lepsiko, 1931, reeldonita de MAS, laŭ vortrekona skanado de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 43 p., ISBN 978-2-918300-94-6

103. Frederiko Engelso: Pri la loĝejproblemo. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 80 p., ISBN 978-2-918300-98-4 (tiu ĉi libro)

Frederiko Engelso

Pri la loĝejproblemo

Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

2014

ISBN 978-2-918300-98-4

Enpaĝigita de MAS per LibreOffice 3.4.3 kaj litertiparoj Liberation Serif 10 kaj 9 pt sub Mandriva Linukso 2011

Prestita en Germanio en la jaro 2014